

FOR RECENZO

BELARTO

ALDONO AL LA REVUO ESPERANTO

Enhavo


Neniam plu lundon. <i>Eric Knight (Auld)</i>	1
La vorto. <i>Albert Samyn</i>	7
Plej malnova bildgalerio en la mondo. <i>Věra Richtrová (Čichová)</i>	8
Zodiako. <i>Henri Vatré</i>	11
Dumtage. <i>Anna Blaman (Vermaas)</i>	12
Logos. <i>Sándor Szathmári</i>	17
En naturo. <i>Vilho Setälä</i>	19
Aŭtune. <i>Josip Velebit</i>	20
Antaŭmaja nokto. <i>Jan Filip</i>	20
Statistikisto. <i>K. Etlí (Stanimirova)</i>	21
Pri literatura arto kaj Esperanto (Diskuto)	22
Arto de la penso. <i>Sándor Szathmári</i>	28
Konferansejo. <i>Vasil Conev (Pančev)</i>	30
Banala en amo. <i>Vlatko Pavletić (Lapenna)</i>	32
La poeto. <i>Frigyes Karinthy (Szathmári)</i>	33
Du judoj. <i>L. N. M. Newell</i>	34
El la estona epopeo Kalevipoeg (Kalevido) (<i>Dresen</i>)	36
Kalevala: la trezoro de la finna popolo. <i>Vilho Setälä</i>	38
Vespero en boato. <i>Clelia Conterno</i>	40
Dimanĉa mateno. <i>Edwin de Kock</i>	40
Reveno. <i>Zan Ke-Cia (Su)</i>	40
La lojaleco. <i>Akutagawa Ryunosuke (Miyamoto)</i>	41
Laŭlonge de la vojo. <i>Ilio Calabresi</i>	49
Malnova historio. <i>Mihail Sadoveanu (Pragano)</i>	50
Kun fido. <i>F. Szilágy</i>	52
Juĝisto. <i>Rabindranath Tagore (Petrov)</i>	53
Tercinoj kun cirkelo. <i>Hjalmar Gullberg (Carlsson)</i>	55
Tri poemoj. <i>Guillaume Apollinaire (Bernard)</i>	56
Kiel lerni novan lingvon. <i>Vilho Setälä</i>	57
Mallonga interparolo kun ĵetio. <i>Witold Holcgreber (Grum)</i>	59
La Persa Versio. <i>Robert Graves (Auld)</i>	60
Min la gepatroj gardis. <i>Stephen Spender (Auld)</i>	60
Norvega literaturo vivas ankoraŭ. <i>Johan Hammond Rosbach</i>	61
Pudrita peruko. <i>Willy Smit</i>	63
Sir Patrick Spens. (<i>Dinwoodie</i>)	66
La sankta akvo. <i>Henri Baupierre</i>	68

REDAKTORO: WILLIAM AULD

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

EENDRACHTSWEG 7 - ROTTERDAM-2 - NEDERLANDO



Eric Knight

NENIAM PLU LONDON

**Ho, estas tre agrable,
Jes, vere tre agrable,
Matenmanĝi en la lit'
Dimanĉmate-e-e-ene.**

La unua, kiu tion rimarkis, estis maljuna Kaper Vombli. Kaj Kaper estis tre grava persono. Li estis la vekisto en la vilaĝo Polkintorpo-Ponto — nome, li ĉiumatene vekigis frue kaj ĉirkaŭiris frapante per sia stango la litĉambrajn fenestrojn kaj vekante la homojn ĝustatempe, por ke ili iru al la laboro. Kaj tiun apartan matenon, maljuna Kaper sciis ke io ne estas en ordo.

Li unue sentis tion, kiam li elpaŝis el sia dometo kaj tuis en la mallumo por malŝargi siajn pulmojn, kaj alrigardis la ĉielon por vidi, kia estas la vetero. Li sentis, ke io pri la tago ne estas en ordo, kaj poste li decidis, kio estas tio. Estis ankoraŭ dimanĉo.

Dum kelkaj momentoj li estis tre konsternita pro tio, ĉar li memoris, ke ankaŭ la hieraŭa tago estis dimanĉo.

"Al kukolo", li diris al si, "jen afero rimarkinda, efektive. Sendube io estas farenda".

Nu, oĉjo Kaper Vombli estis tre maljuna, sekve li sidiĝis sur la randon de la trotuaro, kaj post kelka tempo li konkludis, ke farende estas pripensi la aferon. Do li komencis pripensi la tre strangan okazintaĵon.

"Vidu", li diris al si, "ne ŝajnas racie kaj konvene, ke ni havu du dimanĉojn sinsekve. Ni klopodu kompreni la aferon. Nu, por provi ĝin, oni devas decidi, kio estas la diferenco inter dimanĉa mateno kaj labortaga mateno".

Oĉjo Kaper pensis, pensadis, kaj li konstatis, ke la sola diferenco inter la du estas tio, ke en labor-taga mateno li vekas la homojn kaj dimanĉmatene li ne vekas ilin.

"Sekve se mi ne vekas la vilaĝanojn hodiaŭ matene, hodiaŭ estas dimanĉo", li diris al si.

Kompreneble, oĉjo Kaper bezonis longan tempon por fincerbumi tion, ĉar evidente ne temis pri malgravaĵo. Jen estis unu homo, oni povus diri, kiu tenis en siaj manoj la kalendaron. Temis pri tre grava decido. Sed kiam li fine estis decidinta, li sciis, ke li nepre pravos, ĉar li estis jorkŝirano (1).

"Tial ke mi nenium vekas, devas esti dimanĉmateno. Kaj tial ke estas dimanĉmateno, mi devas nenium veki. Do, negrave de kiu vidpunkto oni rigardas la aferon, sekvas nepre, ke hodiaŭ estas dimanĉo".

Sed, decidinte ke temas pri dimanĉo, Kaper konstatis, ke eble ne sufiĉos ne veki la homojn. "Kelkaj el ili eble vekigis proprainiciate", li pensis, "kaj, ne sciante ke hodiaŭ estas dua dimanĉo sinsekve, marŝos al la fabriko. Kaj Dio scias, ke ili jam sufiĉe ofte devas fruleviĝi, kaj estus tre bedaŭrinde se ili ne ĝuus tiun ĉi kromporcion da ripozo, kiu estas tiel mirakle donita".

Do oĉjo Kaper leviĝis malrapide de sur la trotuarrando, kaj plandadis laŭ la strato, kaj haltis ĉe sia unua klientejo, kiu estis la hejmo de Johano Vilĉjo Bretveto, la hejtisto en la fabriko. Oĉjo Kaper ekkaptis sian longan bastonon kun la triangula drato ĉefine, kaj ĝin levante tiel, ke la drato apogiĝis kontraŭ la supretaĝa fenestrovitro, komencis kirligi kaj tordigi la bastonon per la manplatoj, tiel ke la drato klakis kaj frapetis sufiĉe laŭte por veki la plej profunde dormanton.

Baldaŭ malfermiĝis la fenestro, kaj la kapo de Johano Vilĉjo Bretveto ekaperis.

"Mi estas vekita", Johano Vilĉjo diris. "Kioma horo estas?"

Nu, oĉjo Kaper komprenis, ke Johano Vilĉjo ne estas vekiginta sed nur sin movas dormante, kiel la homoj faras pro laco kaj elĉerpiteco kaŭzitaj de ellitiĝo antaŭaŭrora. Sed li sciis, ke tio ne gravas hodiaŭ matene.

(1) Jorkŝiro estas provinco de nordorienta Anglujo.

"Mi vekis vin nur por sciigi al vi, ke hodiaŭ estas alia dimanĉmateno", oĉjo Kaper diris. "Do vi povas reenlitiĝi kaj dormi trankvile".

Post tio, Johano Vilĉjo Bretveto fermis la fenestron kaj reenlitiĝis apud sian edzinon eĉ sen vere vekigi. Dume oĉjo Kaper daŭrigis sian ĉirkaŭradon, trairante diligente la vilaĝon en la ankoraŭne-aŭroro, frapante kaj batetante kontraŭ la fenestroj de ĉiuj siaj klientoj kaj informante ilin, ke ili ne bezonas leviĝi ĉar estas ankoraŭ dimanĉo.

Kompreneble la novaĵo kaŭzis ne malmulte da ekscitiĝo. Kelkaj personoj ĝoje redormis, sed aliaj vekigis kaj vestis sin, rememorante, ke la hieraŭa tago estis dimanĉo. Ili pakis siajn matenmanĝojn kaj surmetis siajn lignoŝuojn kaj siajn kitelojn kaj siajn ŝalojn kaj klakmarŝis laŭ la stratoj ĝis ili atingis la vilaĝan herbejon, kaj tie ili vidis oĉjon Kaper Vombli.

"Nu knabo", ili diris, "kion signifas via informo, ke hodiaŭ estas alia dimanĉo?"

"Nu, tiel estas", li diris.

"Kiel vi scias, ke tiel estas?" demandis al li Goliker Pirsen.

"Mi ne povas klarigi, sed mi estas tre certa, ke okazis io tre mirinda, kaj tiel estas", oĉjo Kaper informis ilin.

Kelkaj emis lin kredi, aliaj ne.

"Nu vidu, Kaper", Goliker diris, "mi ne volas ne konsenti, ke hodiaŭ ŝajnas iom dimanĉeca, ĉu ne, sed kiel ni povas esti certaj pri tio?"

Oĉjo Kaper pensis kelkan tempon. Poste li ekhavis la respondon.

"Nu, jen kiel ni povas certigi", li diris. "Se hodiaŭ estas labortago, la fabrika fajfilo sonorigos por doni la dekkvinminutan averton, ĉu ne?"

"Jes", ili konsentis.

"Sed se hodiaŭ estas dimanĉo, kiel mi asertas, la fabrika fajfilo ne donos la dekkvinminutan averton, ĉu?"

Ĉiuj konsentis, ke tio estas vera. Do ili ĉirkaŭstaris oĉjon Kaper, kiu posedis unu el la malmultaj poŝhorloĝoj en la vilaĝo, kaj ili atendis. Ili ĉiuj rigardis lian poŝhorloĝon, kaj vidis, ke estas dudek antaŭ la sesa, poste deknaŭ antaŭ la sesa, poste dekok kaj deksep kaj dek ses. Kaj la sekundmontrilo ĉirkaŭiris, kaj fine montriĝis kvarono antaŭ la sesa. Sed neniu fajfilo sonis — plejparte ĉar Johano Vilĉjo Bretveto, kiu devis alveni je duono post la kvina por altigi la vaporpremon kaj tiri la fajfilŝnureton, ankoraŭ estis hejme, dormante varme apud sia edzino.

"Jen", oĉjo Kaper diris, "tio pravas, ke hodiaŭ estas ankoraŭ unu dimanĉo, kaj nun ni ĉiuj povas hejmeniri kaj dormi ankoraŭ horeton".

Do ili ĉiuj hejmeniris, ĝojaj pri alia dormohoreto kaj plenaj je laŭdoj pri oĉjo Kaper ĉar li estis tiel lerta rimarki, ke hodiaŭ estas ankoraŭ unu dimanĉo anstataŭ lunda mateno.

Oĉjo Kaper mem hejmeniris, kaj ĝuste pretigis

al si iomete da matenmanĝo, kiam envenis Raŭli Helikero.

"Kaper", li diris, "mi aŭdas, ke vi rimarkis, ke hodiaŭ estas nova dimanĉo".

"Jes, tio estas vera", Kaper respondis.

"Nu", Raŭli daŭrigis, "ĉu du dimanĉoj sinsekve ne estas nur iomete neregule, kiel oni povus diri?"

"Vere, tiel estas, knabo", Kaper sciigis lin. "Sed vi devas memori, ke ni vivas dum tre nekutima epoko".

"Efektive jes", Raŭli konsentis. "Kaj mi ĝojas, ke vi rimarkis ĝin ĝustatempe. Ĉar, se ne, mi estus sonoriginta la lernejan sonorilon, kiel granda stultulo, pensante, ke hodiaŭ estas lundo. Sed nun, sciante, ke ĝi estas dimanĉo, mi devas iri sonorigi la preĝejan sonorilon".

"Laŭ mi, tio ŝajnas ĝusta kaj justa", oĉjo Kaper konsentis.

"Ankaŭ laŭ mi", Raŭli diris. "Kaj mi dankas vin pro tio, ke vi malhelpis stultan eraron miaflanke".

"He, nedankinde, knabo", oĉjo Kaper diris modeste.

Do Raŭli foriris, kaj Kaper sin dediĉis al la manĝado, sed baldaŭ oni lin denove interrompis. Kelkaj el la vilaĝanoj, bele vestitaj en siaj dimanĉaj vestaĵoj, alvenis, kaj sciigis al li, ke homoj el aliaj vilaĝoj, kiuj laboris en la Briga fabriko, staras antaŭ la fabriko kaj insistas, ke hodiaŭ estas lundo. Do li ekprenis pecon da haringo por manĝi survoje, kaj iris tien kaj informis la homojn, ke hodiaŭ estas dimanĉo.

"Sed se hodiaŭ estas dimanĉo en Polkintorpo-Ponto, kiu tago estas en Vaksli-Verdejo?" demandis iu.

"Jes, kaj en Rombek kaj Hóldersli kaj Tánarli", aldonis alia.

"Nu, verŝajne estas dimanĉo ankaŭ tie", li sciigis al ili. "Nur, vi ne rimarkis tion. Kiam okazas du dimanĉoj sinsekve, oni apenaŭ povus kulpigi la homojn, se ili erare supozus la duan lundo. Do mi konsilas al vi reiri kaj ĝui dimanĉon".

"Nu", diris Eĉjo Modersolo, "mi tre ĝojas havi duan ripoztagon; sed mi bedaŭras, ke mi ne sciis tion antaŭ ol mi eliris, ĉar mia Maria-Alica ĉiam alportas al mi mian matenmanĝon en la liton dimanĉmatene".

"Aŭskultu, se vi rapidas, vi povas ankoraŭ ĝustatempe hejmeniri kaj enlitiĝi denove", Kaper atentigis. "Tiam, kiam via edzino vidos vin tie, ŝi scios, ke estas dimanĉo, kaj ŝi leviĝos kaj metos pecon da lardo en la paton tujtuje".

Ili estis ĝuste forirontaj, kiam s-ro Blogz alvenis. S-ro Blogz malfruis, sed tio efektive ne gravis, ĉar li loĝis en alia urbo, kaj estis la fabrikposedanto.

"Hej, hej, hej, miaj homoj", li diris. "Pri kio temas, hej? Pro kio vi ne estas ĉiuj en la fabriko?"

Do ili klarigis al li, ke dua dimanĉo estas alveninta.

"Ta, kia sensencaĵo", li diris. "Kiam mi lasis mian hejmon, estis lundo. Kiel povas esti dimanĉo ĉi tie,

dum estas lundo en Puterslio?"

"Mi ne scias", oĉjo Kaper diris. "Krom se", li aldonis malrapide, "okaze estas dimanĉo ankaŭ en Puterslio, kaj vi tion ne rimarkis".

"Estas lundo, mi certigas vin. Venu tuj al la laboro", s-ro Blogz kriis. "Kiel povas okazi du dimanĉoj sinsekve?"

"Estas dimanĉo", ili diris.

"Ne estas. Estas lundo. Kaj ĉiu homo, kiu ne estos en la fabriko post kvin minutoj, estos maldungita".

"Estas dimanĉo", ili diris.

"Kiel povas esti dimanĉo?" li kriis. "Estas neeble".

Li fikse rigardis ilin, kaj ĝuste tiam ili aŭdis la lang—lang—lang de la preĝeja sonorilo, kiu anoncis la matenan diservon.

"Tio pruvas", ili diris, "ke estas dimanĉo, kaj estus peke, labori dimanĉe".

Do ili ĉiuj sin turnis kaj reiris al siaj hejmoj, lasante s-ron Blogz sola antaŭ la fabrikaj pordegoj. Li staris tie, skuante la kapon, kaj fine li klakmarŝis supren kaj mem malfermis la oficejon kaj sidigis tutsola ĉe sia skribotablo por pripensadi la tutan aferon.

Dume, en la domoj de la vilaĝo la homoj sciis, ke, ĉar estas dimanĉo, ili devas fari ĉiujn aferojn, kiujn oni faras dimanĉe. La viroj ripozis hejme sur komfortaj seĝoj, kaj la virinoj komencis miksi jorkŝirajn pudingojn por la granda tagmeza manĝo. La infanoj estis vestitaj en siaj plej belaj vestaĵoj, kaj anstataŭ iri al la lernejo, ili iris al la preĝejo por dimanĉlernado. Etela Njulgeto, kiu instruis en la dimanĉlernejo, akompanis ilin. S-ro Simz, la lerneja instruisto, aŭdante la preĝejan sonorilon, sciis, ke devas esti dimanĉo kaj ekiris por ludi la orgenon. Raŭli Helikero jam estis tie por pumpi la balgaĵon. La komuniantoj iris kaj staris en la viclokoj. Do maljuna Pastro Stoninghorno surmetis siajn sutanon kaj surplison. Li iom malcertis, ĉu nun estas la Kvina Dimanĉo antaŭ Epifanio aŭ la Kvara, sed li kompromisis donante la saman servon kiel en la antaŭa tago kaj prononcante la saman predikon. Kaj multaj el la komuniantoj diris, ke la prediko efikis multe pli bele la duan fojon ol la unuan, ĉar oni povis antaŭvidi, kien ĝi iras, por tiel diri.

La tutan tempon, kompreneble, la fabriko restis malfermita, sed s-ro Blogz ne maldiligentis. Li levis la mikrofonon de sia telefono, kiu estis la sola en la vilaĝo, kaj petis la deĵoristinon kontaktigi lin kun la Grenviĉa Observatorio. Li ĉiam ŝatis esti preciza. Kiam li kontaktigis, li demandis, kiu tago estas, kaj ili sciigis al li, ke estas lundo.

Armite per tiu fakto, li eliris kaj renkontis la homjn ĝuste kiam ili forlasis la preĝejon.

"Nu, aŭskultu", li diris. "Ne utilas preteksti. Hodiaŭ estas lundo".

Sed ili atentigis, ke ili ĝuste forlasis la preĝejon, do kiel povus esti lundo?

Pro tio, s-ro Blogz tiel koleriĝis, ke li laŭtkriis

kontraŭ ilin, kaj la bruo kondukis Pastron Stoninghorno al la preĝeja ŝtuparo.

"Vi devas ne profani la sanktan tagon", li diris, aspektante tre bela en sia blanka surpliso, kun siaj longaj blankaj haroj kiel leontodo semŝprucanta.

S-ro Blogz komencis konstati, ke kontraŭ jorkŝiranoj li atingos nenion per minacado, do li entreprenis alian taktikon. Li atentigis la pastron, ke, kvankam tio eble estas dimanĉo, oni devas konfesi, ke estas iomete nekutime havi du dimanĉojn sinsekve. S-ro Stoninghorno tion konfesis, kaj li konsentis, ke oni devus voki kunvenon por esplori la aferon.

Do estis anoncote tra la vilaĝo, ke okazos kunveno en la lernejo je la kvara posttagmeze. Oni petis, ke Pastro S-ro Stoninghorno prezidu, sed tial, ke li ne estis certa, ĉu aŭ ne la tago estis dimanĉo, li rifuzis. S-ro Polkibio, alia instruisto, konsentis preni la gvidmartelon kaj prezidi kunvenon, ĉe kiu ĉiu havos okazon prezenti sian vidpunkton pri tio, ĉu estas aŭ ne estas dimanĉo.

Je la kvara horo eĉ ne unu seĝo estis neokupita, kaj kiam s-ro Polkibio estis frapinta per la martelo s-ro Blogz starigis kaj deklaris, ke estas lunde kaj li povas tion pruvi, ĉar li telefonis al la Grenviĉa Observatorio.

Poste Tejlor Haklo, la drinkejestro, ekstaris kaj diris, ke estas lunde, ĉar hieraŭ estis dimanĉo kaj la tago post dimanĉo ĉiam estis lundo, jam de jaroj, tiel longe kiel li povis memori kiel knabo kaj kiel viro.

Post tio okazis paŭzo, ĉar neniu volis stariĝi antaŭ tiom da personoj por aŭdigi sian manplenan da vortoj; tamen multaj el ili deziregis tion fari, ĉar ili sciis, ke Haklo favoras lundon, tial ke, se estus dimanĉo, li devus fermi la butikon pli frue.

Do okazis longa atendado, ĝis iu diris: "Kie estas Sam Etulo?"

"Jen mi", aŭdiĝis voĉo en la fono de la halo, kaj ĉiuj ekparolis dirante, "Ek! Sam, ni aŭdu vian opinion".

Nu Sam estis persono, kies opinio estis ĉiam aŭskultinda pri ĉiu temo, ne nur ĉar li inventis la Sam-Etulo-Memhaltan-Spindelton, sed ankaŭ ĉar li estis multe vojaĝinta, ne nur ĝis Londono kaj aliaj regionoj, sed ankaŭ ĝis fremdaj landoj dum feria ŝipvojaĝado. Do ili ĝentile atendis dum Sam marŝis laŭ la trairejo kaj grimpis sur la podion.

"Nu, knaboj", li diris, "jen la situacio. Tago estas tago, sed samtempe ĝi ne estas, por tiel diri. Kiam mi vojaĝis ĉirkaŭ la mondon, iun tagon estis mardo, kaj la postan matenon la ŝipestro diris, ke estas ĵaŭde — kaj li pravis, ĉar mi neniam retrovis tiun perditan tagon. Kaj aliflanke, knabo en la ŝipo informis min, ke, se ni estus irintaj ĉirkaŭ la mondon en la kontraŭa direkto, ni estus havintaj du mardojn. Do, se ni povas havi du mardojn kiam ni vojaĝas ĉirkaŭ la mondon, mi opinias, ke ni povus same facile havi du dimanĉojn kiam la mondo ĉirkaŭiras nin, kion ĝi faras, kiel scias ĉiu scien-

cisto".

"Stultajo", diris s-ro Blogz.

"Ĉu vere?" demandis Sam, ekkoleriĝante. "Ĉu vi povas diri al mi, kiu tago estas nun en Japanujo?"

"Estas lundo", s-ro Blogz diris.

"Ho, pardonu, s-ro Blogz", la instruisto diris. "Nur kiel afero de teoria precizeco..." kaj jen li tre zorge studis sian horloĝon... "sed en Japanujo nun estas marde".

"Marde?" kriegis s-ro Blogz.

"Jen, vi vidas", Sam diris. "Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi tag-afero ne havas sencon. Se estas lunde, kiel vi diras, tie en Grenviĉo; kaj se estas marde, kiel la instruisto diras, en Japanujo; tiam mi diras, ke tiel same facile povas esti dimanĉo ĉi tie".

"Sensencaĵo", kriis s-ro Blogz. "Mi scias, kio estas la afero. Vi ĉiuj estas maldiligentaj kaj vi deziris ankoraŭ unu liberan tagon. Sekve vi nomis ĝin dimanĉo".

"Ne, knabo", Sam respondis. "Estas ses ordinaraj tagoj kontraŭ unu dimanĉo, do ŝajnas al mi ke temis pri ses kontraŭ unu je via avantaĝo, ke ni havu kroman labortagon anstataŭ kroma ripoztago. Kvankam vi perdis, vi ne devas esti malbonhumora pri tio".

Je tio la ĉeestantaro aplaudis, kaj rimarkante, ke venis taŭga momento por eksilenti li foriris de sur la podio.

"Blago", s-ro Blogz diris, jam tute kolera. "Se hodiaŭ estas dimanĉo, do kio estos morgaŭ? Ĉu lundo aŭ mardo? Aŭ ĉu ni perdas unu tagon?"

"Eble mi estas la ĝusta persono por klarigi tion", Kaper diris, ekstariĝante. "Ni tute ne perdas unu tagon. La afero estas, ke la semajntagoj laciĝis je la turniĝado, sekve nun ili paneis, por tiel diri, kaj ne iros pluen, ĉu ne".

"Kiel stulte", s-ro Blogz indigniĝis. "Se estus tiel, ni ne plu progresus kaj ankaŭ, morgaŭ estus dimanĉo ĉu ne?"

Kaper gratis al si la kapon kaj pensis momente. Poste li eklevis la kapon.

"Al kukolo, knabo", li diris. "Vi trafis. Morgaŭ ja verŝajne estos dimanĉo".

Je tio la kunveno finiĝis, kaj ĉiuj ekiris hejmen. Ili amase ĉirkaŭstaris maljunan Kaper kaj pride-mandis lin rilate la proksiman tagon.

"Mi estas tute certa, ke estos dimanĉe, knaboj", li diris. "Sed kiam mi alvenos por vekti vin, mi informos vin definitive".

"Ne, mi havas pli bonan ideon", Johano Vilĉjo Bretveto diris. "Se estos dimanĉe, estos bedaŭrinde rompi iomete da bona kromdormo. Tio preskaŭ farus ĝin tiel malbona, kiel labortago. Do se efektive estos alia dimanĉo, ne faru al vi la zorgon alveni nin — kaj kiam vi ne alvenos, ni scios certe, ke estas dimanĉe".

"Jes, tre bone", oĉjo Kaper diris, "sed tiel mi perdos ĉiujn miajn kolektaĵojn".

Ĉiuj konstatis, ke tio estas vera, sed ili interkonsentis, ke eĉ se daŭre estos dimanĉo ili pagos

oĉjon Kaper tiel same, kvazaŭ denove fariĝus la ĉirkaŭirado de la labortagoj kaj li estus farinta sian veklaboron.

"Ne, mi ne povus akcepti ĝin", li protestis.

"Ne, tio plaĉus al ni", ili protestis.

"Nu, se vi volas", Kaper konsentis. "Sed kio pri la knaboj en la aliaj vilaĝoj? Estas domaĝe, ke ili pensu ĝin labortago kaj promenu la tutan vojon ĉi tien nur por ekscii, ke estas dimanĉo".

"Nu", Johano Vilĉjo diris, "ni starigos komitaton, ĉu ne, jam nun, kaj la komitatanoj prenos po unu vilaĝon kaj iros tuj tien por sciigi al la homoj, ke nuntempe restadas dimanĉo — ke la labortagoj paneis".

Ĉiuj opiniis tion bona kaj ordema ideo, kaj tiel fariĝis.

La proksiman matenon homoj en la vilaĝo vekigis, kaj ili kuŝis en la lito kaj aŭskultis. Sed ili aŭdis neniun triangulan draton klaketanta tra la grizo de la mateno, ankaŭ ne la voĉon de oĉjo Kaper spirblovanta: "Duono post la kvara, ĉu vi leviĝis?" Ili atendis, sed ili ne aŭdis lignoŝuojn klakantaj laŭ la vojŝtonoj, nek fajfilon de la fabriko anoncanta, ke, se ili ne alvenos post dekkvin minutoj, oni forbaros ilin.

Do ili sciis, ke nepre estas denove dimanĉo, kaj ili reendormiĝis, kaj poste ili aŭdis nur, ke la preĝeja sonorilo denove sonoras. Pro tio ili certiĝis, ke estas dimanĉe.

Kaj en la aliaj najbaraj urboj la homoj ne iris al la laboro, kaj sekve ili sciis, ke estas dimanĉe. Ili surmetis la plej bonajn vestaĵojn, kaj faris iomete en la ĝardeno kaj la viroj riparis aferojn en la domo kaj la infanoj ne iris al la lernejo, kaj ĉiu ĝuis belan ripozon, tiel ke iliaj laborlacaĵoj komencis ĝojiĝi kaj fieriĝi denove.

La postan tagon la informo, ke la semajntagoj haltis ĉe dimanĉo estis disvastiĝinta tra la tuta Jorkŝiro, kaj enŝteliĝis ĝis la tajna regiono (*) kie estas la ŝipkonstruistoj, kaj en Lankaŝiron kie la junuloj laboris je la katunteksiloj, kaj en la nigran regionon kie la homoj tiregis je ŝtalo kaj mal-supreniris en la minejojn, kaj en Stafordŝiron, kie ili laboris en la potfarejoj kaj la aŭtomobilfabrikoj.

La ĵurnaloj sendis raportistojn por trovi, kio okazis pri la perditaj semajntagoj, kaj unu el ili venis al la vilaĝo kaj elserĉis oĉjon Kaper. En la komenco li ridis, ĝis alvenis Jano Koper. Jano nur petis pencon de la ĵurnalisto, kaj poste li premkurbigis la moneron, kaj la ĵurnalisto ĉesis ridi.

"Nu, knabo", Jano diris. "Verŝajne vi volas telefoni al via ĵurnalo, ke hodiaŭ estas dimanĉo.

"Efektive jes, kompreneble", ja junulo diris, tre dankeme.

Nu, kvankam la mirindaĵo, ke ankoraŭ estas dimanĉe, multe ĝojigis la korojn de ĉiuj homoj, kiuj laboris dum longaj horoj pri ŝtalo kaj ligno kaj katuno kaj fero kaj vitro kaj ŝtofoj kaj papero kaj

(*) Tajno estas rivero en nordorienta Anglujo; Lankaŝiro kaj Stafordŝiro estas provincoj de Anglujo.

silko, antaŭ fornejoj kaj forĝejoj kaj fandejoj kaj teksiloj kaj ŝpinoj kaj premejoj kaj torniloj kaj truiloj kaj konstrurimenoj, tamen ekzistis homoj, kiuj estis maltrankviligitaj per la mirakla okazaĵo. Kaj malgraŭ tio, ke ĉiuj aliaj en la lando nun konstatis, ke okazas bela serio da dimanĉoj, tiuj homoj senĉese klopodis persvadi la homojn, ke ili estas nur ordinaraĵoj semajntagoj, kiujn la homoj nur *supozas* dimanĉoj.

Tiuj homoj baldaŭ konstatis, ke se daŭre estos dimanĉe ili neniam povos konstruigi pliajn milit-ŝipojn kaj bombojn kaj aŭtomobilojn kaj aeroplanojn kaj radiaparatojn kaj tenisludilojn kaj ĉiujn aliajn objektojn, kiuj civilizigite influas la mondon. Kaj, ankoraŭ pli, se ili ne farigus tiujn objektojn, ili ne povus daŭre enspezadi ĉiam pli da mono, ol ili jam posedis.

Tio estis vere abomena situacio. Do ili iris al la Ĉefministro pri ĝi.

"Neniu pli multe respektas la religion, tute aparte la anglikanan ritaron, ol mi", diris unu el ili. "Fakte, mi tute akordiĝas kun la religio — po unu tago en ĉiu semajno".

"Jes, jes", la aliaj diris.

"Sed, Sinjoro Ĉefministro, pensu pri miaj akcuroj! Multaj estas orfoj. Multaj estas vidvinoj. Se mia fabriko ne enspezas monon, tiuj kompatindaj homoj estos senhavaj — ĉar, ĉiam vivinte per la pocentaĵoj, ili neniam devis lerni, kiel labori. Ni ne povas permesi, ke ili suferu".

"Sinjoroj", diris la Ĉefministro, "vi povas esti certaj, ke la registaro de lia reĝa moŝto faros ĉion eblan por gardi tiun industriaron kaj komercadon kiu estas la spino de nia nacio — efektive, de nia Imperio".

Poste la Ĉefministro foriris kaj pripensis. Estante Ĉefministro, li ne pensis tiel, kiel vi aŭ mi. Vi aŭ mi, en la sama situacio, verŝajne dirus al ni mem: "Atentu, ĉu ne. Ĉu hodiaŭ estas dimanĉo aŭ ĉu ĝi ne estas: jen kion ni devas decidi". Verŝajne pro tio vi kaj mi neniam estos ĉefministroj.

Tiu ĉi Ĉefministro pensis pri multaj aferoj samtempe. Subite li alvokis sian sekretarion kaj diris:

"Karrington-Smejt. Hodiaŭ estas dimanĉo, mi aŭdis, kaj morgaŭ denove estos dimanĉo. Paku mian valizon. Ni foriros dum la semajnfino".

"Sed, sinjoro", diris la sekretario, "kio pri la Internacia Krizo? Ni havas du ultimatojn, kiujn ni devas tuj respondi".

"Ho ve", diris la Ĉefministro. "Tre ĝene; sed la tuta mondo scias, ke la brita semajnfino estas netuŝebla, kaj se hodiaŭ estas dimanĉo, kiel laŭ mia opinio ĝi devas esti, mi sekve ne povos respondi ĝis post la semajnfino".

"Sed kiam ĉesos esti dimanĉe, sinjoro?"

"Nu, Karrington-Smejt, kiom longe nia plej rapida militŝiparo bezonos por atingi tiun maltrankvilan mondparton?"

"Ho, proksimume ankoraŭ tridek-ses horojn, sinjoro".

"Ĉu-u-u-u-u! Do laŭ mia opinio ĉesos esti dimanĉo post proksimume tridek-ses horoj".

Kaj tion dirinte, la Ĉefministro trafis vagonaron je la 5a 15 kaj iris en kamparon. Kaj kiam la ĵurnaloj aŭdis pri tio ili presigis ĝin, kaj ĉiuj homoj en Anglujo — fakte, en la tuta mondo — sciis, ke estas oficiale dimanĉo.

Kaj tie en Polkintorpo-Ponto la homoj tre fieris pri oĉjo Kaper Vombli. Ĉar ĉu li ne estis la unua persono en la tuta lando, kiu rimarkis, ke la semajntagoj haltis kaj ĉiu tago montriĝas dimanĉo?

Kaj tra la tuta lando laborlaculoj suspiris ĝoje pro sia liberiĝo el la industriaj katenoj. Ili ripozigis siajn lacajn korpojn. Iuj iris ĉiutage en preĝejon. La viroj promenis kun siaj hundoj, aŭ faris tasketojn en la domo, martelante kaj prizorgante la ĝardenon kaj ŝuriparante kaj alfikante bretojn. En la urbegoj la homoj iris per aŭtobuso en la kamparon kaj piknikis. La plenaĝuloj kuŝis sub la suno kaj la infanoj ludis en la kampoj, kaj la gejunuloj promenis laŭ la flankvojoj kaj amindumis. Ekzistas nur unu malbonaĵo. La trinkejoj devis observi la dimanĉon leĝon, kiu permesas al neniu aĉeti duonlitron da biero, krom se ili estas laŭleĝa vojaĝanto, kiu veturis certan nombron da mejloj. Sed eĉ tio rezultis iel bone, ĉar multaj viroj promenis la laŭleĝan nombron da mejloj, kaj tiel ili vidis partojn de sia lando, kiujn ili neniam estus vidintaj alimaniere, kaj ili vidis, kiel aspektas aliaj urboj kaj vilaĝoj.

Kaj dum ĉio ĉi la Ĉefministro sidis en sia ĝardeno kaj legis detektivromanojn, aŭ dormetis sub la suno kun duo da ŝatataj ĉashundoj apud la piedoj, ĝis venis radia informo.

"Subskribu ĉi tie", diris la knabo.

Do la Ĉefministro subskribis, kaj poste li elserĉis kodlibron kaj deĉifris la mesaĝon. Tuj poste li vokis sian sekretarion kaj diris:

"Karrington-Smejt, kiu tago estas hodiaŭ?"

"Dimanĉo, sinjoro", la sekretario diris.

"Sensencaĵo", diris la Ĉefministro. "Mi laciĝas de tiu ĉi senkohera politiko kun ĝia nedecidemo. Se tio daŭros, okazos Konstitucia Krizo!"

"Ĉu Konstitucia Krizo, sinjoro?"

"Jes, Karrington-Smejt. Do paku la valizojn kaj ni reiru al la metropolo. Ni devas agi tuj. Mi publikigos deklaron, ke la registaro de lia reĝa moŝto oficiale nomas hodiaŭ vendredo, kaj morgaŭ estos oficiale sabato, kaj la semajntagoj de nun devas sinsekvi oficiale laŭ sia normala kaj kutima ordo".

"Sed ĉu ne vere estas dimanĉo, sinjoro? Ĉu ne okazis ia miraklo, kiu haltigis la semajntagojn?"

"Mi ne scias, mia knabo. Sed tion ĉi mi ja scias. Eĉ se estas dimanĉo, kaj ni ĉiuj, ĉie, decidus nomi ĝin lundo aŭ mardo, tiam estas lundo aŭ mardo, ĉar ni ĉiuj kredas, ke estas lundo aŭ mardo".

"Jes, mi komprenas, sinjoro".

Do la sekretario pakis la valizojn, kaj la Ĉefministro reiris al Londono, kie li nun povis respondi tute fortece al la ultimato, kaj ĉiuj gazetoj

de la lando portis la informon, ke hodiaŭ estas vendredo kaj morgaŭ estos sabato — oficiale.

Tiu informo ne atingis ĝis Polkintorpo-Ponto, kie la tuta afero estis komenciĝinta, ĝis la posta mateno. S-ro Blogz la unua ricevis la informon, kompreneble, kaj li ordinis sonorigi la signalfajfilon ĉe la fabriko. Do ĉiu rapidis al la fabriko, ĉar se vi ne alvenis dekkvin minutojn post la signalo oni forbaris vin kaj vi perdis duontagan salajron.

Sed dum ili amase eniris la fabrikkorton, oĉjo Kaper haltigis ilin.

"Atendu momenton, amikoj", li diris. "Precize kiu tago estas?"

"Ja venu labori", s-ro Blogz alvokis. "Estas sabato".

"Ne", Kaper diris. "Hieraŭ estis dimanĉo, sekve hodiaŭ devas esti lundo, krom se ni komencis glitfali kaj ni nun havos la tagojn en inversa ordo".

Tiu komento de Kaper denove konfuzigis la homojn, kaj iuj diris, ke estas sabato, kaj iuj, ke lundo, dum iuj loĵalis al dimanĉo.

La findecido estis, ke ili revoku Sam Etulon por aŭdi lian opinion. Sam alvenis post proksimume duonhora kaj aŭskultis ĉies opinion. Poste li ĉirkaŭrigardis, kaj parolis laŭ la voĉo de iu, kiu kutimas ordigi tiajn aferojn.

"Ekzistas nur unu ebleco, knaboj", li diris. "Kaj mi estas tiu, kiu ekiras fari ĝin".

Tion dirinte li marŝis en la oficejon kaj, levinte la telefonon, li diris:

"Kontaktigu min kun Lia Reĝa Moŝto".

Palpebrumrapide oni kontaktigis lin.

"Ĉu Lia Reĝa Moŝto?" Sam demandis.

"Hej, Samivelo Etulo, knabo!" diris la reĝo, rekonante la voĉon. "Vere ĝojigas mian koron aŭdi vian voĉon denove. Kiel vi, Sam, knabo?"

"Tre bone, Via Moŝto", Sam diris.

"Kaj kiel fartas tiu tre bela via edzino, Minjo?" demandis la reĝo, kiu tre flue parolis laŭ la dialektoj. Tiaj detaletoj faras bonan reĝon. Malgrav-aĵojn, kiel la kreadon de leĝoj, oni povas lasi al knaboj, kiuj posedas nenion krom cerboj.

"Minjo fartas bonege", Sam diris. "Kaj kiel viaj edzino kaj infanoj, se ne ĝenas vin la demando?"

"Ne, Sam, knabo, mi ĝojas, ke vi demandis", la reĝo diris. "Mia plej malgranda estis iom malsana la pasintan semajnon. Kreskas la dentoj, vi komprenas. Sed ŝi jam sentas sin bone".

"Nu, mi ĝoje aŭdas tion", Sam respondis.

"Dankon", la reĝo diris. "Nu, Sam, supozeble vi ne vokis min nur por iom da babilado. Kiel mi povas servi vin, knabo?"

"Nu, jen la afero, Via Moŝto", Sam diris. "Esperable vi ne supozos min stulta pro la demando, sed ĉu vi volas diri al mi, kiu tago estas laŭ via opinio?"

"Nu, Sam", la reĝo diris, "mi ne enmiksiĝas en tiajn aferojn. Mi lasas ĉion similan al miaj ministroj kaj tiel plu. Sed mi ĵus ricevis de ili oficialan informon, ke hodiaŭ estas sabato".

"Via Moŝto", diris Sam, "se sabato taŭgas por vi,

jam ne estas argumento. Mi tre dankas vin".

"Nedankinde, Sam", la reĝo diris. "Kaj cetere, Sam Etulo, estas nia reĝa deziro, ke vi ne atendu tiel longe antaŭ ol denove telefoni al mi. Okazis lastatempe pluraj aferoj, pri kiuj mi estus ŝatinta havi vian opinion. Kiam vi intencas veni al Londono?"

"Nu, Via Moŝto, mi rezignis pri la vojaĝado", Sam respondis.

"Bedaŭrinde, Sam. Bedaŭrinde. Nu, telefonu baldaŭ, ĉu ne?"

"Volonte, knabo".

"Nu, ĝis la", diris la reĝo.

"Ĝis la, Via Moŝto", diris Sam.

Dum la tuta konversacio, kompreneble, la vilaĝanoj senspire staris ĉirkaŭ la oficeja pordo, aŭskultante al Sam. Kaj tuj antaŭe staris s-ro Blogz.

"Li diris", diris Sam, "ke hodiaŭ estas sabato".

"Jen, ĉu mi ne diris?" s-ro Blogz kriis. "Nu, ĉu tio ne konfirmas, ke estas sabato?"

Ĉiuj opiniis, ke jes, sed ili ne estis tute certaj. Ili pripensis la aferon dum kelka tempo, kaj poste Johano Vilĉjo Bretveto diris:

"Sola malfacilaĵo estas, ke mi ne sentas ĝin kiel sabaton".

"Sed ĉu vi ne komprenas, ke estas oficiale sabate", s-ro Blogz kriis.

"Atendu momenton, knaboj", Sam Etulo almetis. "Nu, mi ne laboras ĉi tie, do mi estas senpartieca. Sed mi povas diri al vi, kiel vi povos scii tute certe, ke hodiaŭ estas sabato".

"Kiel ni povos scii?" ili demandis.

"Nu, tre simple", Sam respondis. "Vi ĉiuj scias, ke ĉiun sabatmatenon je kvarono antaŭ tagmezo vi ricevas unusemajnan salajron. Do se efektive hodiaŭ estas sabato, s-ro Blogz komencos pagi al ĉiu homo unusemajnan salajron post dek minutoj. Kaj, aliflanke, se li ne komencos pagi semajnsalajrojn post dek minutoj — ne povas esti sabato, kaj tre verŝajne daŭre estos dimanĉo dum sufiĉe longa tempo".

"Netolereble!" s-ro Blogz kriis.

Li argumentis kaj kriis, sed ili simple staris kaj skuis la kapon kaj diris, ke se estas sabato ili ricevos unusemajnan salajron je precize kvarono antaŭ tagmezo, kiel ĉiam okazis sabate. Kaj fine s-ro Blogz, ne vidante alian rimedon por ĝuste ekirigi la semajntagojn, cedis kaj pagis ĉiun viron, virinon, knabinon kaj knabon.

Kiam la elpago finiĝis, estis sabato tagmeze, kaj sekve ili ĉiuj malsupreniris kiel kutime en la korton por iri hejmen. Kaj tie maljuna Kaper haltigis ilin.

"Sed se hodiaŭ estas sabato, geknaboj, kiu tago estos morgaŭ?"

"Estos dimanĉo", ili ĉiuj kriis.

"Nu, ĉu tio ne estas bonega", oĉjo Kaper ridegigis. "Se estos dimanĉo, ni povos kuŝi malfrue en la lito kaj havi escepte iom da kromdormo".

el la angla: **William Auld**

La Vorto

Sankta Johano

Vi frato mia
glora beata
aristokrata

Vi kiu konis la Vorton
— (laŭdire)
Origino Komenco
la Kvintesenco
(de ĉio) —

aŭskultu!

Alvokas Vin povra poet' demokrata
vane strebanta tra mond' intriganta
pro tiu Vorto via

 simpla sankta
 liberiganta

Ĉar:

al soldato nepras pafon
al pastro kapro ŝafon
al bankestro kambion
al poeto genion

 kaj la Vorto
 la simpla la sankta la liberiganta

Sed ve! antaŭ ol mi naskiĝis
jam longe jam longe la Vorto perdiĝis
en mondevolua kanalo
ĉu sorto? ĉu fato? ĉu eble fatalo?

Kaj kiu perdis ĝin ja kiu
ĉu iu? neniu? ĉiu?

Nun MI poeto ĉion

 fervore spontane
 aĵon ulon econ umon
 traserĉas esploras
 eĉ inkvizitoras

 KIE?

 sed vane

Ho freneziga serĉo terura ŝarado
en epoko atoma mi atoma nomado

Kaj kie kaŝiĝas la Vorto kaj kie?

Ĉu en paŝtista kant' ĉe krepuska ripozo
ĉu en grasa bovin' ĉu en lili' kaj rozo?

Ĉu en amoro kruda libido
karno brila nudo de l'Virin'
nesaturanta tortura avido
en brusto — ventro — kruro — halucin'?

Ĉu en maŝino konstruo laboro
en proletara marŝo en popola ĥoro?

Aŭ ĉu en interplaneda trafiko
en Venus — Mars — metafiziko
en Am' platona abstrakta ide'?

 Ja pro ĉio ĉi tio mi ĝuas
 poste iomete enuas
 ĉar enestas la Vorto ne
 ho ve!

Tamen retrovi la Vorton mi devas
en ĥaosa ĉi-jarcento
ie inter Orient' Okcidento

Doloras la koro premiĝas ekkrevas
trafluas fajra febro min:
Ho vortojn mi vipos kaj tordos kaj skuos
ĝis kern' elŝeliĝos ĝis sango elfluos
ĝis karambolos kaj batos strangolos sin
vorto silabo kaj sono

 Eble tiam klarione
 elsaltos la Vorto!

Sed ne:

 dum sono post sono pereas sur klifo
 ŝrumpas en man' la malviva signifo

Kruela farso Mallerta mi ĵonglisto!

Ĉu do rezigni pri poetekzisto
ĉu nur fiburĝe vivi reale
pale ĝoji suferi banale?

Min duboj kaj timoj, malesperado alsieĝas
kaj el abisma fundo mi preĝas
por kompato

 al Vi Sankta Johano
 glora beata
 aristokrata
 Vi mia frato



VĚRA RICHTROVÁ

PLEJ MALNOVA BILDGALERIO EN LA MONDO

Multo el pasinteco de la homaro estas ankoraŭ nekonata, vualita per sekreto. Kaj tial — kvankam epoko de grandaj geografiaj kaj arĥeologiaj malkovroj jam forpasis — la kuraĝaj kaj aŭdacaj esploristoj ankoraŭ dum longa tempo havos sufiĉe da laboro.

Unu el tiuj, kiuj sian vivon dediĉis al malkovrado de homara pasinteco, estas franca esploristo Henri Lhote. Dum 30 jaroj li science esploras Saharon. Travojaĝinte ĝin ĉiudirekte, surdorse de kameloj li tie jam elrajdis 80.000 kilometrojn. La verkaro diversfaka — pri geografio, etnologio, arĥeologio — atestas lian grandan konaĵon.


Liaj lastaj ekspedicioj arĥeologie esploraj, en la sahara teritorio Tasili-n-Ajer plue malkovris postrestaĵojn da pratempaj desegnoj kaj gravuraĵoj. Pro sia signifo tiuj ĉi esploroj sendube apartenas al bazaj malkovroj, kiuj al ni donas imagon pri pratempa estinteco de la homaro. Kune kun la malkovroj de surmuraj pentraĵoj en hispanaj kaj francaj grotoj ili donas eĉ unikan atestaĵon pri la vivo kaj kulturo de homoj en antaŭlongtempe pasintaj epokoj.

Nur en jaro 1933 montriĝis, ke en Saharo estas amasigita granda riĉaĵo da pratempaj desegnoj. Unuajn malkovrojn en la teritorio Tasili faris leŭtenanto Brenans. Relative baldaŭ vico da geografoj kaj arĥeologoj — inter ili Lhote — komencis kun pli detalaj esploroj. Sed la milito ĉesigis ilin je longa tempo. Nur en 1956 Lhote povis organizi grandan Tasili-karavanon por sistema esplorado de tuta teritorio kaj por kopiado de desegnoj por parizaj galerioj.

Tasili-n-Ajer — meze de Saharo, borde de montarmasivo Hogar, proksimume je duonvojaĝo inter maroka montaro Atlas kaj Ĉad-lago — estas malfacile alirebla ŝtonara altebenaĵo, hodiaŭ dezerta kaj senviva. Sur ĝi elstaras rokoj en plej mirindaj formoj, kiel en pratempo ilin elrodis la kunigita fortostreĉo de la vento, akvo kaj suno. Unuavide multaj el ili memorigas kvazaŭ stratojn de urbo dezerta.

Kaj ne hazarde! Ĉar inter ĉi tiu rokaro iam vivis homoj en grotoj, akomoditaj por loĝado. Multajn grotojn ili ja ornamis per desegnaĵoj, kiujn hodiaŭ ni admiras.

Ne nur en la grotoj ĉi tie loĝis nigrahaŭtuloj, sed ankaŭ en vilaĝoj, kies kabanoj — ankaŭ desegnitaj sur rokoj — tre similas al hodiaŭaj negraj vilaĝoj en Nigerio. Ĉiu kabano estas ĉirkaŭita per alta muro kun pordego kaj per vojeto ligita kun centra vilaĝplaco. Lastafoje 16 monatojn Lhote kun siaj akompanantoj pasigis meze de Saharo. Ili faris multnombrajn malkovrojn. Trairinte ĉiujn montpasejojn ili esplordis ĉiujn grotojn, atente traserĉis rokajn superpendaĵojn. Neimagebla vivo en regiono sen rifuĝejo, en ŝtona dezerto, dum kruela klimato sen rimarkeblaj postsignoj de malsekeco! En la tuta masivo ekzistas ja nur kelke da arboj





hodiaŭ kondamnotaj perei. Por superi ĉiujn obstaklojn, kiujn ĉi tie amasigis la naturo, necesis multe da firma volo. La homamaseto ĉe sia laboro sentis respondecon pri tio, ke fariĝu alireblaj la belartvaloroj apartenantaj en trezorejon de la tuta homaro.

De unu al alia superendaĵo, ekde unu al alia roko aŭ groto, kvankam ili situis apudtuŝe — ofte kondukis longa kaj malfacila vojo. Ĉie oni ja devis fari perfekte precizajn kopiojn de ĉiuj surmuraj desegnoj. Kaj tio estis laboro ne facila! Temis ne pri nura kopiado sur speciala papero. La kusenon ja kreis nuda roko. La pentraĵo sur ĝi ofte ne estis klare videbla. Kelkiam necesis la pentraĵojn prilavi helpe de spongo trempita en speciala solvaĵo, kiu helpis forigi malnovajn tavolo-amasigojn kaj vivigi kolorojn, sed kiu neniel domaĝis la originajn desegnojn. Multfoje oni komparadis kopiojn kun la originalo por povi egaligi miskonformon ekestintan pro la difektita kuseno, eventuale surmeti la apenaŭ videblajn nuancojn, kiujn ĉe unua kopiado oni ne sukcesis reprodukti. Ofte la vento tiregis kaj ŝiris paperon, ofte la desegnisto devis labori en situacio inda de cirkartisto. Tiel estis trovitaj pentraĵoj en profunda groto, en kiun oni devis traŝoviĝi kaj kiu finiĝis per spaco, en kiu la maturaĝulo apenaŭ povis sidiĝi. Sed multfoje necesis eluzi trabaĵon.

Tio, kion la francaj esploristoj ekvidis kaj esploris en la Tasili-labirinto, superas ĉiujn imagojn. Ili trovis multe da grotoj kaj roko-muroj kun pentraĵoj, sur kiuj ie eĉ po centoj troviĝas desegnoj da homoj kaj bestoj — jen unopuloj, alie amasgrupiĝoj: tre alloge kaj kompreneble pentritaj estas plej variaj scenoj el ĉiutaga vivo — materia kaj spirita, koncernantaj primitivajn kultritojn kaj religiajn imagaĵojn, kiel ili ĉe la pratempa loĝantaro ŝanĝiĝis.

La grotpentraĵoj el konataj eŭropaj trovlokoj en



Hispanujo kaj Francujo (ekz. Altamira, Combarrelles), malkovras certajn faktojn pri kutimoj kaj moroj de tiamaj homoj, sed donas neniajn pli gravajn informojn pri la naturo, kia ĝi tiam estis. Kontraŭe la Tasili-pentraĵoj estas veraj arkivoj donantaj ne sole tre precizan imagon pri pratempa loĝantaro de Saharo, sed ankaŭ pri naturkondiĉoj, en kiuj tie la plej diversaj tipoj de loĝantaro sinsekvis.

Ĝuste la historio-grafia signifo de la pentraĵoj estas eksterordinare granda, ĉar ili reproduktas periodon daŭrinta ĉirkaŭ kvinmil jarojn; unuaj el ili devenas el tempo antaŭ pli ol okmil jaroj (iuj esploristoj eĉ supozas, ke ili ekestis antaŭ 10.000 jaroj)! Dank' al admirinda precizeco de la pentraĵoj oni povas samtempe observi evoluon de faŭno kaj sekve de tio eĉ la iompostiomŝanĝojn de klimato kaj senĉese daŭrantan sekiĝadon de la regiono, fine kulminanta en hodiaŭa stato, kiam el homloĝata teritorio, tre fekunda, fariĝis preskaŭ negastema dezerto. Hodiaŭ de tempo al tempo ĉi tien venas nur anoj de diversaj Tuareg-triboj.

"Ni estis konfuzitaj", — skribas Henri Lhote en sia libro pri malkovroj en Tasili, — "per multvarieco de stiloj kaj temoj; multaj kuŝas eĉ kelktavole, unu duonkaŝante la alian —. Krom desegnaĵetoj de homoj, nur kelkcentimetraj, ni trovis gigantajn staturojn, kiaj aliloke ne ekzistas. Kelloke prezentiĝas arkpafistoj reciproke luktantaj pri grego, aŭ izoluloj batalantaj per bastonegoj, ĉasistoj persekutantaj antilopojn, viroj en kanotoj, barketoj el unu peco da arbotrunko ĉasantaj hipopotamojn, la danc- kaj ofer-scenoj".

"Antaŭ ni", daŭrigas Henri Lhote, estis la plej granda galerio da prahistoria belarto en la mondo — ni ekstaris antaŭ bildoj de eksterordinare alta artnivelo. Ekzemple la scenojn kun virinoj el Jabaren aŭ el Sefar, pentritajn en naturgrandeco, adoptus eĉ la plej eminentaj belartskoloj de ĉiuj epokoj".

Granda nombro da desegnoj evidente havas ritan karakteron, estas ligita kun malnovtempaj religiaj imagoj. Ĉar por la pratempa homo tuta vivo estis ununura luktado kun nekonataj naturfortoj, ĉiupovaj kaj misteraj, nekompreneble decidantaj. Ili estis neniel brideblaj, kaj tial restis nur adoradi kaj oferedoni, por ke ili fariĝu favorkoraj, nekolerantaj.

Eĉ hodiaŭ grandioze impresas la sceno, pentrita en dimensioj 7,60 m je 3,60 m, centrigita ĉirkaŭ "granda dio", alta 3,25 m. Maldekstre de li oni vidas adorantajn virinojn (pentritajn same kiel estas la dio: blanke kun ruĝaj konturoj); dekstre staras ruĝe pentrita antilopo (kun blankaj konturoj), parte kaŝanta akuŝontan virinon. Sendube la sceno estas magia, rilatanta gravan kulton de la fekundeco, kiu staris en centro de pratempaj religiaj imagoj.

Multaj pentraĵoj estis trovitaj sur rokaj superpendaĵoj, kiuj eble al pratempaj paŝtistaj triboj ofte servis kiel rifuĝejo, sub kiu eblis ripozi aŭ labori. Kelkaj superpendaĵoj havas ja mezuron apenaŭ unu metron ĉiudirekte, sed aliaj estas ĝis kelkcentmetrojn longaj. Ĝuste sub superpendaĵoj oni malkovris amasegon da pentraĵoj kiel ekz. tiun en Jabaren, longan pli multe ol 60 metrojn. Kelkloke sub la superpendaĵoj oni sukcesis trovi eĉ postrestaĵojn da tendeĵo de pratempa loĝantaro, postsignojn de fajrejo kun bestostoj, kun cindro kaj karbigita ligno, kun vazrampitaĵoj kaj eĉ kun globetoj el kolieroj de tiamaj belulinoj. Pluvakvo difektis grandan parton da postrestaĵoj kaj multaj objektoj estis elportitaj surfacen, kie ili nun estis trovitaj.

Sur alia roko estas la ofersceno: ĉiuj ĉeestantoj — viroj kaj virinoj — estas pentritaj kun birdkapoj havantaj vestojn, konatajn el pentraĵoj de antikva Egiptujo. La virinoj surportas jupojn, la viroj antaŭtukojn de egipta fasono; la oferaĵoj estas alportataj en konusformaj vazoj, el epoko antaŭ la unuaj dinastioj — kaj eĉ estas ĉi tie (meze de Saharo) pentrita la supra-egipta rita barko kun trib-signoj kaj ŝip-flaĝetoj.

Sur unu soleca roko estas pentrita brutaro pelata de paŝtisto. Apude, en proksimeco de 3 metroj, kuŝas la oferata bruto, al kiu estis fortranĉita antaŭa kruro. Ĉirkaŭe estas pentritaj kelkaj viroj.

Tiu ĉi pentraĵo multflanke estas rimarkinda: ĝi trafe dokumentas eminentan observo-talenton de pratempaj homoj kaj ilian unikan kapablon eĉ en arta simboliko konservi la karaktertraĵojn de pentritaj bestoj. Laŭ korno-formo (liro, pintoj antaŭen kurbigitaj) oni sukcesis difini la specojn de kulturata brutaro — *Bos africanus* kaj *Bos brachyceros*.

Same brile la praepokaj artistoj reproduktis eĉ ĉiun momentan eksciton — streĉkoncentritan kuraĉon de ĉasistoj kaj atenteman preparon por arkpafo, aŭ sovaĝan, senkapan fuĝon de persekutataj bestoj. Multnombraj desegnoj de kurantaj aŭ luktantaj homoj, de dancistoj kaj de knabinoj sin

ornamantaj pruvas pri tiaj konoj da anatomio de homa korpo, pro kiaj devus honti eĉ ne iu nuntempa pentristo.

Multaj desegnoj rilatas di-adoradon. Rimarkindas la pentraĵo de diino, kiu ĉirkaŭkape — anstataŭ aŭreolo hodiaŭ alpenstrata al di-personoj kaj sanktuloj — havas grenherbon kun maturiĝaj spikoj: versimile la diino de grenkulto, simila kaj eble eĉ per sia deveno parenca al egipta Isis el komencperiodo de agrikulturo.

Kun kulto de diversaj naturfortoj certe koheras tre multaj dancdesegnoj de unuopaj homoj kaj de tutaj grupoj, pentraĵoj de homoj bildigitaj kun bestkapoj (precipe birdaj aŭ antilopaj) aŭ pentraĵoj de diversaj fantazi-bestoj (antilopo kun elefanta korpo kaj aliaj). Same kultdevenaj estas la pentraĵoj de homoj en plej diversaj maskoj. Grandan atenton altiris la pentraĵo de viro, surkape havanta maskon de tia modelo, kian oni ĝis hodiaŭ uzadas ĉe kultdancoj de kelkaj nigrahaŭtulaj triboj en okcidenta parto de Afriko. Unike stranga sur tiu ĉi pentraĵo estas, ke el genuoj kaj kubutoj de la viro kreskas plantoj aŭ floroj (la pentraĵo hodiaŭ estas jam tiom difektita, ke tion neblas tute precize difini). Sukceson en batalo kaj dum ĉaso estis efikanta ankaŭ la militista ŝmirkolorigo de ĉasistoj aŭ batalantoj, kiu sur la pentraĵoj ankaŭ konserviĝis.

Granda parto da pentraĵoj estas deducita al ĉasado je bestoj de tia epoko. Praloĝantaro de Saharo ĉasadis eble ĉiujn bestojn tie vivantajn: antilopojn, gazelojn, muflonojn, ŝafojn, bubalojn. Sur unu roko estas fragmento el ĉaso je hipopotamoj: ilia triopo estas en akvo persekutata de ĉasistoj sur tri barkoj. Jen ankaŭ kelke da scenoj el ĉaso je ĝirafoj. Precipe impresa estas ĉasista sceno, kie la ĝirafpanjo ŝirmas sian idon antaŭ preminsista ĉashundo, dum la ĉasisto mem staras preta elpafi sagon en konvena momento.

Sur desegnoj el pli posta epoko troviĝas batalveturiletoj — la karioloj, tirataj ĉevalpare. Sur kelkaj pentraĵoj estas pli detale bildigita eĉ armilaro de tiamaj ĉasistoj: pafarkista sagujo kun provizo da sagoj, ĉasinstrumentoj, similaj al niaj hakiltrovaĵoj el pli juna ŝton-epoko, ankaŭ aĵo unuavide memoriganta bumerangon de aŭstraliaj indiĝenoj (eble ĝi estis jettranĉilo).

Interesaj estas ankaŭ la pentraĵoj el vivo de bestoj: kurantaj strutoj, ripozantaj leonoj, interluktantaj virĝirafoj (la ĝirafino iom malproksime staranta, trankvile atendas rezulton de la lukto). Ekzistas nemultaj gravuraĵoj de elefantoj kaj rinoceroj — ĉe kiuj la artistoj lerte eluzis naturformon de la roko.

Inter pentraĵoj estis trovitaj ankaŭ scenoj el vivo hejma. Precipe impresa estas la bildo, kiu reproduktas siestripon: en kabano la viro surdorse kuŝanta, ludas kun infano saltetanta sur li; surtable estas pafarko kun sagoj, surtere troviĝas kuir-potoj kaj kruĉo je akvo; antaŭ la kabano

ripozas du virinoj, ĉirkaŭ kiuj petolas infanoj, apude alia viro melkas bovinon.

Sed la vivo estis eĉ malfacila. Oni suferis pro malsanoj. Ekz. estis malkovrita pentraĵo de virino, kies tuta korpo estis kovrita per postsignoj de varioloj.

Jam ni diris, ke la loĝantaro de ĉi tiu teritorio kaj la praepokaj artistoj estis anoj de diversaj nigrahaŭtulaj triboj. Multaj pentraĵoj — precipe tiuj el pli malfrua epoko — en la vizaĝesprimo estas konsiderinde stilizitaj, sekve de kio ili malfaciligas pli detalan komparon. Tamen laŭ ceteraj pentraĵoj, precize bildigantaj la plej karakterizajn trajtojn, oni povas supozi parencecon de saharaj paŝtistoj kaj terkulturistoj kun diversaj gentoj ĝis hodiaŭ vivantaj en Afriko. Iuj portretoj, precipe de virinoj kaj knabinoj — kun alta frunto, normalaj lipoj kaj iome pintforma nazo — povus prave bildigi eĉ hodiaŭajn negrajn belulinojn.

La pentraĵoj devenas el tre antikva epoko, kiam ankoraŭ regis plena komuneco. Kaj tamen jam laŭ ornamadoj eblas homojn pli influhavajn kaj pli riĉajn distingi de simplaj ĉasistoj kaj paŝtistoj.

Homoj, kiuj en la grotoj de Saharo elŝanĝiĝis, certe havis eĉ diversajn opiniojn pri la belo, diver-

sajn mondkonceptojn kaj vivis en diversaj vivkondiĉoj. Tial necese ŝanĝiĝis eĉ la maniero de ilia belartesperimo. Henri Lhote en sia libro donas resuman supervidon pri 12 ĉefaj artskoloj ĉi tie sinsekvantaj.

El miloj da konservitaj pentraĵoj klare elstaras precipe du bazaj tendencoj. Pli malnova skolo, kiu estas origina kaj eble ekestinta senpere sur Saharo, preferas simbolan bildigon, kiu atestas pri nenia ligiteco kun ceteraj trovlokoj. Verkaĵo de tiu ĉi skolo estas la plej malnova, kiu estas konata ĝis hodiaŭ el nigrahaŭtula belarto. — Dua tendenco, pli naturalisma, devenas el pli posta epoko. Eblas en ĝi malkovri malnovajn Nil modelojn kaj ĝis certa grado eĉ influojn de Mikeno. El pentraĵoj de tiu ĉi periodo ni menciis kelkajn kun diaĵoj. Precipe interesaj estas en unu profunda groto bone konservitaj barkpentraĵoj. Pli malfrua komparo montris ilian senduban similecon kaj koherencecon kun la bark-pentraĵoj sur rokoj de Supra Egiptujo, kies devenon oni metas en la epokon antaŭ la unuaj dinastioj. Ĉi pentraĵoj pruvas, ke la paŝtistaj triboj, kies anoj ilin pentris, havis rilatojn kun Supra Egiptujo kaj eble eĉ venis de tie.

Tradukis *Jana Cichová*

Ciuj reproduktaĵoj estas el libro de Henri Lhote "A la découverte des fresques du Tassili", eldonis Arthaud-Paris.

Henri Vatré

Zodiako

Travadas nun per glim' humila
la nokton viaj pupilsteloj;
ĉe l' vekto de la ŝultroj pendas,
molpeze disaj, la ĝemeloj
de l' brusto, ĉi pesil' trankvila,

kaj kvazaŭ el amfor' verŝante
la fridan lakton de l' femuro,
silentan manon vi etendas
dum freŝan ombron sorbas lante,
soife, via lippurpuro.

Ĉe l' rando de la nubtapiŝoj
embuskas la sagist' abstina.
Vin, Virga, vane li atendas:
de la piedoj, paraj fiŝoj,
orbrilas ligĉenet' obstina.

DUMTAGE

Anna Blaman

Lastatempe pasis ne unu tago en kiu ŝi ne devis pensi pri la du viroj kiuj ludis rolon en ŝia vivo, la studento kaj sinjoro Vis. Tio timigis ŝin, tio donis al ŝi senton kvazaŭ ŝia vivo jam estus finiĝonta kaj kvazaŭ ŝi nun estus faranta la finkalkulon antaŭ ol ŝi mortus. Estis freneze, ĉar kial ŝi mortus? Ŝi estis juna, ankoraŭ ne tridek, kaj ŝi estis sana kaj fakte nenio estis ne en ordo. Pli ol iam ajn ŝia vivo estis rutinaĵo, sed anstataŭ ŝin trankviligi, tio kondukis ŝin al paniko kvazaŭ ŝi eniĝis en iun silenton kiu antaŭas ventegon. Cetere, neniu tion rimarkis, ŝi pensis, kaj ŝi faris sian laboron kiel kutime. Matene pretigi kaj servi la matenmanĝojn, unu horon poste purigi la ĉambrojn; la ĉambrojn supreme-malantaŭe kie pli frue loĝis la studento kaj poste sinjoro Vis, kaj la ĉambrojn supre-antaŭe kie daŭre ankoraŭ, precize kiel tiam, restadis la sama loĝanto, viro kiu neniam kaŭzis ĝenon, kiun oni eĉ neniam rimarkis kaj kiu, se dependus de ŝi, povus resti ĝis sia morto.

Estas ja certe, ke en ĉambro io de la etoso de la loĝantoj restas pendanta. Kaj ne nur tio, sed ŝajnas eĉ ke difinita ĉambro altiras certan specon de homoj. Supre-malantaŭe estis malvarmece kaj sekretece, estis kaŝejo kaj senelirejo, en iu trompa maniero oni sentis sin hejme tie, ĉar en realeco oni estis perdita tie. Ja tie ankaŭ evoluis ŝia amovivo, almenaŭ, se oni povus nomi ĝin tiel, ĉar ŝi estis nur insidita kaj senhonorigita. Kaj eble ŝi eĉ ne eraris se ŝi pensis ke nun denove io simila minacas tie.

Anna Blaman estis la plej elstara virina aŭtoro de la hodiaŭo en Nederlando. Ŝia subita forpaso en la somero 1960 signifis grandan perdon por la kultura mondo de tiu ĉi lando. En 1957 ŝi ricevis la ŝtatan premion pri literaturo. En la komenco de 1960 ŝi ricevis ŝtatan komision verki romanon, al kies manuskripto mankis nur la lastaj paĝoj, kiam la morto forprenis ŝin. La verko tamen aperos.

Kvankam ŝi verkis plurajn romanojn, el kiuj la plej konata estas "Soleca Aventuro" — kiu krom grandan admiron en literaturaj medioj vekis tumulton en burĝaj rondoj — ŝi montris sin vera majstro de la mallonga rakonto, de la novelo. Ŝia temo, retrovebla en ĉiuj ŝiaj verkaĵoj, estas tiu de la homa soleco en ĉiuj ĝiaj aspektoj.

Sept. 1960. M.H.V.

Sed unu aferon ŝi sciis tre certe; neniam plu okazos al ŝi kiel kun la studento, kiu kun ofenda singardemo kuraĝis amindumi nur per buŝo kaj manoj, nek kiel poste kun sinjoro Vis kiu ŝajne havis nek buŝon nek manojn kaj kiu ofende perforte surprizis ŝin. Kaj same kiel timŝokon oni povas senti nur longe poste en la genuoj, tiel ŝi ankaŭ fakte nur nun komprenis kiel mucida estis ĉio ĉi kaj kiel hontiga. Kiel ŝi povis tion permesi, kiel ŝi povis tion fari! La rememoro pri ĝi terure ĝenis ŝin. Kiel ŝi povos iam repurigi interne? Cetere, unu vorto pri ĝi al ŝia patrino kaj ambaŭ estus elĵetitaj el la domo. Sed tiun vorton ŝi ne parolis, tiel kuraĝa ŝi ne povis esti kaj ambaŭ foriris kiam konvenis al ili, bonkondute dankante pro la bonaj zorgoj, la studento al alia universitato kaj sinjoro Vis, post porkomerca restado de kelkaj monatoj al sia propra edzino en sia propra urbo. Se ŝi devus fari la finkalkulon, tiu finiĝus per preskaŭ heriparebla manko. Ŝia vivo estis unu granda maltrafita ŝanco, maltrafita ŝanco je amo, maltrafita ŝanco je sinteno kiu estus doninta al ŝi iun senton de memrespekto. Ŝi iam aŭdis pri virinoj, kiuj post io simila tute ne plu ĝenis sin pri io ajn, kiuj por ĉiam rezignis pri la lukto kaj kiuj, anstataŭ atendi la amon, poste kontentiĝis per tia ludo kia estis ludita kun ŝi. Tion ŝi ne farus, ŝi prefere mortus ol lasus tion okazi trian fojon.

Morti! La lastan tempon ŝi dormis tiel profunde kaj sensonge, kvazaŭ dum tiuj dormhoroj ŝi estus ŝajnmorta. En tio estis io malbonsigna, ŝajnis esti aludo, indiko kvazaŭ por ŝi ne estus trovebla pli bona solvo ol la morto. Kaj dumtage, ekde la unua momento de vekigo, ŝi sentis sin je la vivo kvazaŭ je malĝusta adreso. Ŝi ĉiam leviĝis kun kapdoloro, ĝemante, senespera kaj preskaŭ ĉiun matenon ŝi vomis, kvazaŭ troplena de naŭzo. Kiam ŝi estis lavinta sin, ŝi eksidis antaŭ sian spegulon por kombi siajn malhelajn glatajn harojn kaj la renkontiĝo kun ŝia spegulbildo kaŭzis al ŝi ĉiam la saman mizeran ĉagrenon. Ŝi havis senkoloran vizaĝon, maldikajn lipojn, malkontentan rigardon. Malgraŭ tio ŝi ne estis malbela, sed kiel ŝi tion profitis? Ŝi povus esti pli malbela, sed pli feliĉa. Ekzistas malbelaj virinoj, kiuj estas sorĉe ĉarmaj, kiuj vekas amon kaj pasion. Al ŝi neniam ankoraŭ vere enamigis iu ajn, estis nur du, kiuj ludis kun ŝi mucidan ludeton, kiuj profitis ŝian senkarak-

terecon kaj sensualecon. Neniam plu tio okazos al ŝi, eĉ se neniam plu ŝi havus ion ajn, eĉ se ŝi devus velki kiel folio malproksimen forfluginta de la vivoarbo.

Sed sian laboron ŝi faris kiel ĉiam, malgraŭ la kapdoloro, malgraŭ ĉiuj ĉi internaj doloroj de pento kaj manko. Kaj ŝi faris tiun laboron pli ol bonege, ĉar ŝi estis lerta en la mastrumado. Kaj, sincere dirite, ne nur lerta, sed ankaŭ iomete tiranema. Kelkfoje ŝi emis priplendi, ke preskaŭ ĉio venas je ŝia ŝarĝo, la servado, la lavado, la ĉambroj, la aĉetoj, ŝi volonte sentis sin tiam la ekspluatata filino, kiu jam delonge estus edzino kaj patrino, se ŝi estus havinta ŝancon je propra vivo. Sed, ŝi mem kreis tiun situacion, ŝi faris el sia laboro fortikajon malantaŭ kiu restis sekure kaŝita ŝia senpoveco en aferoj de virina feliĉo.

Je kvarono antaŭ la sepa matene ŝi jam estis vestita kaj preta por la taga tasko kaj jetis, antaŭ ol malsupreniri, ankoraŭ lastan rigardon en la spegulon de sia vestoŝranko. Kial ŝi ŝajnis esti tiel maldika kaj velka? Iam ŝi fantaziis lasi sin surprizi en sia nudeco. Ili miregus pri ŝia korpo, delikata, varma, pasia. En tio ŝi ne eraris.

En la kuirejo ŝi pretigis la du matenmanĝojn (por supre-malantaŭe kaj por supre-antaŭe) kaj je tiu frua matenhoru ŝi estis ankoraŭ sola, la patrino, estis ankoraŭ en sia dormĉambro. Pli malfrue en la tago ŝi ne plu povis esti tie unu sekundon dum kiu ŝia farado ne estis kaŝobservata per rigardo, kiun ŝi abomenis. Ŝi ne amis sian patrinon, ŝi pensis, sed fakte ŝi nur timis tiun rigardon, kiu komprenis tro multe. Pri la studento kaj pri sinjoro Vis ŝi kompreneble neniam ion eksciis, sed tiu kaŝa rigardado plena je singardemo, plena je timo montri tro multe da kompreno tamen pruvis ke ŝi scias kiel malfeliĉa estas ŝia filino.

Jes, malfeliĉa. Pli malfeliĉa ol se ŝi suferus pro malfeliĉa amo. Sed ŝi eĉ ankoraŭ neniam enamiĝis, tion ŝi de interne ankoraŭ neniam kuraĝis riski. Viro kiu en ŝiaj okuloj estis dezirinda, samtempe ŝajnis al ŝi absolute neatingebla estaĵo, tia viro neeviteble troviĝis larĝe ekster ŝiaj ŝancoj kaj eblecoj. Ŝi do neniam aspiris iun dezirindan, ŝi eĉ neniam aspiris al malpli ol tio. Estis nur sole la studento kaj sinjoro Vis, kiuj aspiris al ŝi, hazarde, kvazaŭ incidente, ĉar hazarde estis ŝi kiu matene kaj posttagmeze venis por servi; ili samtempe servis sin de ŝi.

Ŝi do pretigis tiujn du matenmanĝojn. Servi la matenmanĝon je duono, kvarono antaŭ la oka matene, tio ĝis nun estis sen danĝero nur supre-antaŭe. La viro kiu loĝis tie estis ne nur tro deca por insidi ŝin, sed ankaŭ tro malsana. Li havis malsanon, kiu antaŭtempe detruis kaj maljunigis lin. Tio estis klare videbla laŭ lia griza vizaĝo kun la malhelaj lipoj, lia apatia pintventro, lia senesprima flegmo. Li ne plu estis viro, sed same ne plu homo. Li estis sufokita en iu vivanta morto, la veran morton li apenaŭ povos ankoraŭ rimarki,

kiam estos lia tempo. Ke ŝi portis al li la matenmanĝon ĉiam laste, do post elteno de la danĝeroj supre-malantaŭe, estis ne kuraĝo, sed intenco; post la danĝeroj la rifuĝejo, la ripozpunkto. Kvankam, tuj kiam ŝi alvenis tie, en tiu neta ĉambro sen dusenceco, sen sekreteco, kaj plena de silento, plena de matena lumo, ŝi ĉiam denove rimarkis kiel ŝi trompiĝis. Li ne donis azilon; estis nek rifuĝejo, nek ripozejo tie. Kiom ajn ofte ŝi eniris ĉe li, li nur sidis tie, enprofundiĝinta en si mem, mergiĝinta ĝis la fundo de sia soleca malsana estado, atendente nenion, atendente la nenion. Kaj tiel ŝajnis ke supre-malantaŭe la vivo pelis ŝin en abomenan sakvojon kaj ke supre-antaŭe estis montrata al ŝi la senhorizonta perspektivo de la morto kiu kulminis en senhelpeco kaj manko de kompato.

Ŝi pretigis la matenmanĝojn. Tio estis serio de aŭtomataj agoj, dum kiu ŝiaj pensoj tede kaj malgaje daŭrigis sian plendadon. Pripensu ke la studento kaj sinjoro Vis portis la solajn kaj ankaŭ la lastajn emociojn en ŝian vivon, kaj pripensu ke ŝi tute ne estis serĉinta tiajn emociojn, kvankam ŝi ankaŭ ne povis ne submetiĝi je ili. Kion ŝi serĉis, estas amo, karesoj. Ankoraŭ ŝi enpense vidas la studenton adiaŭanta ŝian patrinon kaj ŝin, ĉi tie, en la kuirejo. Sur lia longa, laceca vizaĝo (ŝi ne kredas eĉ ke li kapablis bone studi) eĉ ne signeto de kaŝa konfido, de sekreta dankemo, ne, nenio iam ekzistis inter ili. Kaj sinjoro Vis! Tiu foriris en momento kiam ŝi forestis, tiu lasis la salutojn por ŝi kaj finite. Neniam plu ĝi okazos al ŝi.

Ŝi do pretigis la matenmanĝojn, unue por supre-malantaŭe. Ŝi ankoraŭ ne estis tute certa, ŝi do devis ja ankoraŭ dubi, sed en neniun okazo ŝi lasos superruzi sin. La sekvinto de la studento kaj de sinjoro Vis, nome kiel ĉambroluanto, ŝajnis dekondukta, preskaŭ same deca kiel la viro supre-antaŭe, kvankam je tute alia, je multe pli sana maniero. En la posttagmezo kiam ŝi portis al li la manĝon li sidis tie ĉe la tablo kvazaŭ neniam ekzistis iu ajn danĝero; tiam ŝajnis ke en tiu impona kranio, kalva kiel bilardglobo, ankoraŭ neniam leviĝis eĉ la plej eta dusenca intenco. Sed matene. Neniam li estis leviĝinta kiam ŝi eniris. Li ankoraŭ kuŝis en la lito aŭ sidis en piĝamo sur la rando de sia lito. Estis ŝi kiu devis malfermi la kurtenojn. Ŝi ne sciis kiamaniere, per kia rigardo, kun kiaj intencoj li observis ĉiujn ŝiajn movojn, ĉar ŝi ne rigardis, sed klare ŝi sentis ke eĉ sekundon li ne malfiksis ŝiajn okulojn de ŝi. Tio kaŭzis al ŝi senton kvazaŭ kuŝas aŭ sidas tie ĉene ligita doghundo, peza kaj danĝere ludema besto. Ŝi zorgis, ke li ne povos atingi ŝin. Sed dumtage, do en la posttagmezo, ŝi povis pensi ke ŝi estis nur viktimo de sia propra fantazio.

Tiam li estis nur korekta en malvarmeta afabla maniero kaj tio estis ĉio. Li povus sidi en restoracio, neinteresita pri sia ĉirkaŭaĵo kaj pri ŝi. Ŝi eĉ povus pensi ke li volas montri ke li havas neniun rilaton



al ŝi, kio ja estas fakto. Sed estis eble, ke precize same li kondutus, se matene ŝi estus cedinta. Oh, ŝi estas certa, neniam ŝi tion faros!

En la tempo de la studento kaj de sinjoro Vis ŝi kelkfoje provis fantazii, ke fine iĝos amo. La studento finos la studon kaj edzinigos ŝin, sinjoro Vis disiĝos de sia edzino kaj edziĝos al ŝi. Pro la manko de loĝejoj ili loĝos kune en tiu ĉi ĉambro. Matene ŝi iros momenton malsupren por prepari la matenmanĝon kaj kiam ŝi revenos ĉio okazos tute alie ol antaŭe. Finitaj estos la ruzaj manipuloj de la studento kaj la silenta perforto de sinjoro Vis. Anstataŭos tion vera amo. Ambaŭ sekvos ŝiajn movojn kun sentoplenaj rigardoj, ambaŭ protekteme metos brakon ĉirkaŭ ŝin kaj dum la manĝado de la buterpanoj ambaŭ nepre devos de tempo al tempo ĉirkaŭbraki ŝin. Estis fantaziaĵo kiu baziĝis sur nenio; kio okazis estis nur fuŝaĵo kaj nur perforto. Neniam plu tio okazos al ŝi.

Ŝi frapis la pordon. Ŝi eniris kaj palpe metis la pleton sur seĝon. Li ankoraŭ ne malfermis la kurtenojn, li kuŝis ankoraŭ en la lito. Ŝi lumigis, forŝovis la kurtenojn de la fenestro kaj estingis la lumon. Ĉio okazis, kompreneble, kiel kutime. Li flankenŝovis la litkovriilojn kaj sidiĝis sur la randon de la lito kaj komencis rigardadi, eĉ sekundon liaj okuloj ne forlasis ŝin. Ĉu vi bone dormis? li demandis. Ŝi enpense vidis la rigardaĉon de la studento kaj respondis malafable: Kompreneble, kial ne? — Kvankam ŝi ne rigardis, ŝi tamen vidis ke li levis manon kaj malrapide frotis la kranion. Kaj kiam poste ŝi sternis la tablotukon sur la tablon, ŝi tamen riskis rigardi en lian direkton. Ankoraŭ li penseme frotis la kranion, ankoraŭ lia rigardo estis fiksita al ŝi, laceca rigardo sen rideto, sen moko kaj certe sen dusenceco. Tiam ŝi diris: Mi ĉiam dormas bone. Li ne tuj respondis, bonkore

kaj interesite li rigardis ŝian vizaĝon, ŝiajn manojn. Tiam li diris: Ĉar mi pensis ke mi ion aŭdis, mi pensis ke vi estis el la lito ĉi nokte. Ŝi metis lian teleron antaŭ lin kaj en tiu momento ŝi do staris sufiĉe proksime al li kaj tiam ŝi diris siavice kaj kompreneble denove tro akre: Tio ne okazas al mi ke mi ne dormas, por tio mi laboras tro multe dumtage.

Kaj li, per kvietiga voĉo: Tio estas vera, vi estas bona knabino. Tio estis unu afero, sed kion li neniam antaŭe faris, li etendis unu el siaj maldelikataj manoj kaj faris geston kvazaŭ li intencis karesi ŝin. Li ne tuŝis ŝin kaj se li estus tuŝinta ŝin, tre povus esti ke tio havis nur afablan intencon. Sed ŝi evitis lin tiel abrupte kvazaŭ li volus atenci ŝian ĉastecon, ŝian duban ĉastecon.

Kiam ŝi estis survoje supren kun la dua matenmanĝo ŝi sentis la mizeron kiel ŝvelaĵon en la gorgo. La sola afero, kiun ŝi kapablis ankoraŭ fari bone, estis tiu ĉiutage revenanta laboro, ĉion ceteran ŝi faris abomene erare. Ŝi estis malcerta pro nenio, timema pro nenio, ofendita pro nenio. Ŝi estis nur kompatinda kaj ridinda. Estus ja vera solvo, se tiu stranga antaŭsento estus prava, se estus efektive vere ke ŝia vivo estas finiĝonta. Ĉu tiu finkalkulo akordiĝas aŭ ne, ĉiukaze ŝi ne plu kapablas ion fari bone. Ŝi do malsaniĝu kaj mortu, ju pli baldaŭ des pli bone.

Kaj denove ŝi frapis la pordon, nun supre-antaŭe. Ŝi eĉ ne atentis ke neniu respondis. Kaj kiam ŝi eniris, ŝi eĉ ne rimarkis ke ankaŭ ĉi tie la kurtenoj estis ankoraŭ fermitaj, kvankam tio estis tre nekutima. Aŭtomate ŝi faris, kion ŝi faris ankaŭ supre-malantaŭe, ŝi palpe metis la pleton sur seĝon kaj faris lumon. Bonan matenon, ŝi diris. Tiam subite ŝi rimarkis kia silento estas tie. Li estis tie, li kuŝis en la lito, ne rigardinte ŝi tion jam vidis, sed io mankis. Kaj momenton ŝi staris senmove en morta silento. Ŝi ne aŭdis lin. Ŝi faris paŝon al la lito kaj rigardis. Neeble ke ŝi ricevis klaran impreson pri li, ŝi rigardis al li de granda distanco kaj nur tre mallonge. Sed tute ekster sia konscio, ne sciante kion ŝi faras ŝi reprenis la pleton de sur la seĝo kaj iris al la pordo kaj komencis krii. Je la alia fino de la koridoro malfermiĝis la pordo tiel tuje, kvazaŭ li estus atendinta malantaŭ ĝi. Li venis al ŝi, malgraŭ sia peza korpo li iris tre rapide, tre celkonscie, li precize sciis kio estas farenda. Li prenis la pleton el ŝiaj manoj kaj metis ĝin sur la plankon. Kaj tuj li daŭrigis al la antaŭa ĉambro kies pordo estis ankoraŭ larĝe malfermita. Ŝi tiam jam ne plu kriis, ŝi nur staris tie ankoraŭ singultanta, kun la fingrartikoj premitaj kontraŭ la buŝo. Ŝi vidis lin eniri la ĉambron kaj aliri la liton. Ŝi vidis lin kliniĝi super la liton kaj rigardi, atente, longe, eble tutan duonminuton longe. Kaj tiam li reiris kaj revenis, al ŝi. Venu, li diris. Kaj li prenis ŝin ĉe la brako kaj forkondukis ŝin. En sia ĉambro li sidigis ŝin kaj diris: Tio estis konsternego, ĉu ne, eksidu momenton. Kaj li iris al la krano por preni

glason da akvo por ŝi. Tiam ŝi diris per stranga gorgovoĉo: Ĉu li estas morta? Li turnis la kapon al ŝi kaj levis la brovojn: Tion vi scias, kiel najlo. Sed jam li denove estis apud ŝi, ĉar subite ŝi ronke spiregis kaj ŝi estus denove eksplodinta je kriegoj se li ne estus evitinta tion. Li metis brakon ĉirkaŭ ŝin, li firme tenis ŝin, li preskaŭ frakasis ŝiajn ŝultrojn kaj diris bruske: Ne, ne ploru! Jen, trinku! — Pasis la krizo, ŝi ne ploris, ŝi trinkis. Ŝiaj dentoj klaketis kontraŭ la glason, sed ŝi trinkis. Bone, li diris kaj lia voĉo sonis amike. Per mallertaj nervozaj glutetoj ŝi tute fintrinkis la glason kaj poste elĉerpita apogis sin al li. La premo al ŝiaj ŝultroj iĝis malpli firma, li ne plu dolorigis ŝin, li nur ankoraŭ protekte tenis brakon ĉirkaŭ ŝi, protekte.

Posttagmeze, post la tagmanĝo, ŝi kuŝiĝis dum horo, tion ŝi bezonis kaj tio estis ŝia kutimo. Kelkfoje ŝi tiam sukcesis vere iom dormi, kaj tio tre bone efikis al ŝi, sed hodiaŭ tio estis neimagebla. Ŝi estis multe tro streĉita. Ŝi ne povis trankviligi la kapon sur la kuseno kaj en ŝiaj brakoj kaj gamboj svarmis miloj da formikoj. Ŝi bone sciis kion fari kontraŭ tio; ŝi devis iom post iom malstreĉi la korpon, kvazaŭ faligi ion el la manoj, unue la gambojn, poste la trunkon kaj fine la brakojn kaj la kapon. Sed ŝi ne sukcesis. Kiam ŝi pensis, ke la kapo kuŝas firme sur la kuseno, tiam la gamboj denove ekpiketis kaj spasmiĝis kaj kiam ŝi trankviligis la gambojn, eksaltis streĉo en la kolmuskoloj. Estis indiferece al ŝi, ke ŝi ne sukcesas, ĉiukaze ŝi ne povis haltigi la pensojn. Kelkfoje ankaŭ pensado estis rimedo por trankviligi; la korpo, ne plu atentata, peziĝinta, volvita en dormemo, iumomente nerimarkite kuntrenis ŝin en la dormon. Sed la pensoj kiuj okupis ŝin nun, estis tro ekscitaj por tio, ŝi estis tro okupita de ĉio kio okazis al ŝi. Ŝajnis ke ventego blovas interne de ŝi, sed ne estis detrua ventego, pli ĝuste oni povus nomi ĝin somera ventego, kiu ne efikas al la naturo, sed nur forblovas el ĝi la melankolion de kelkaj velkintaj folioj. Kuŝante sur la dorso, la okuloj fermitaj, ŝi priaŭskultis sin mem. Ŝi ĉiam sciis, ke ŝi estas ege sentema, ege emociiĝema. Ankoraŭ nun ŝi aŭdis siajn kriegojn, kiam ŝi staris tie en la antaŭa ĉambro, per voĉo, kiun ŝi ne konis de si mem; sonis abomene, sed estis prasono. De la ino en danĝero. Kaj praviĝis: la danĝero estis plej granda kaj la savo estis proksima. Antaŭ ol ŝi konsciiĝis pri tio, ŝi estis repilotita el la regiono se horizonto al sekura bordo. Sed imagu ke ŝi estintus sola hodiaŭ matene, sola kun sia patrino! Tiam ŝi estus perdita, ĉar kiam la praktio de la angoro restas nerespondita, oni estas perdita, absolute. Sed ŝi estis savita. Sed malantaŭ kiom da maskoj kuŝas fakte ies vera karaktero? Ĉu ŝi iam povus imagi ke li estas tia? Kiom multe devas okazi antaŭ ol homo tiamaniere montras sin? Ŝi denove vidis lin veni al ŝi en tiu koridoro kaj kapti ŝin kaj forkonduki ŝin kaj konsoli kaj trankviligi ŝin. Li ĉion precize sciis kaj

ĉion ĝuste bone faris, li metis brakon protekte ĉirkaŭ ŝin.

Ŝi sciis ankaŭ absolute certe ke ŝi povas ĉion lasi al li: la telefonado al la oficejo, la averto de la parencoj, la transporto al funebrejo. Kia feliĉo. Li povis toleri ĉion, tio tute ne efikis al li. Duonan minuton li staris kaj klinis sin super tiu lito. Kion li vidis pli ol ŝi? Ŝi malfermis la okulojn kaj rigardis tra la ĉambro. Ĝi estis orda. La pordo estis ŝlosita. Ŝi apenaŭ rigardis, matene, kaj ŝi vidis ĉion. Li kuŝis alte sur la kusenoj, kvazaŭ li volus releviĝi, sed tio ne estas ebla. Morta estas morta. Li estis terure morta. Ŝi ankoraŭ neniam vidis mortinton, sed ŝi sciis ĝin tuj. Sed kial do ŝi demandis ankoraŭ per tiu naŭza gorgovoĉo? Eble tio estis la elvomo de lasta timrestaĵo, sendube estis io simila. Des pli, ĉar post tio ŝi tute ne plu sentis timon, kun lia brako protekte ĉirkaŭ ŝi.

Ŝi ne plu fermis la okulojn, ŝi ja ne povis dormi kaj ŝi ankaŭ ne plu volis. Ŝi do restis rigardanta, atentema. Intertempe ŝi tre deziris pensi pri la prudento kaj boneco per kiuj li savis ŝin, savis ŝin de la morto. Ŝi provis vidi lin kvazaŭ en vizio. Ĉu li ne havas malhelgrizajn okulojn? Ŝi neniam kuraĝis bone rigardi, ŝi apenaŭ konis lin. Sed nun ŝi unuan fojon en la vivo vidis la rigardon de mortinto, ankoraŭ ŝi havis ĝin antaŭ la okuloj. Sed bone, nun ŝi devis koncentriĝi al la vizio. Malfacile ĝi povus plaĉi; li do havas malhelgrizajn okulojn, flavan foruzitan dentaron, dikan stomakon kiu elstaras super la pantalono kaj li movas sin rimarkinde rapide. Rimarkinde rapide li fortiris ŝin el la ungegoj de la morto. Sed krom tiu rigardo devis esti ankoraŭ io alia kio terure tuŝis ŝin. Ĉu tio estis tiu duonrekta sinteno, kvazaŭ li volus releviĝi? Sed bone, se ŝi koncentriĝis al la vizio ŝi vidis ankoraŭ ion alian: Li turnis sin al ŝi kun levitaj brovoj, li diris: Tion vi scias, morta kiel najlo. Li estis realema kaj kruda kaj tio estis malsimpatia al ŝi, sed tia li ja devis esti por povi savi ŝin. Li povus vidi cent kadavrojn kaj ankoraŭ li donus al ŝi per firma mano glason da akvo, kun brako protekte ĉirkaŭ ŝi.

Ŝi do ne plu fermis la okulojn, ŝi rigardis atente tra la ĉambro, kiu estis orda kaj kies pordo estis ŝlosita. Ŝlosita, tio estis kutimo, tion ŝi faris ĉiam. Do ŝlosita ne ĉar ŝi sentis timon, nek pro la vivanto kiu estis kruda sed kiu savis ŝin, nek pro la mortinto kiu havis sintenon kvazaŭ li volus reveni. Mortintoj ne releviĝas kaj certe ne ĉi tiu. Ŝi estis absolute certa ke ŝi ne eraras, sed tiu ĉi mortinto rezignis pri la vivo sen lukto. Por li la tuta vivo ne havis ion ajn allogan. La tutan tempon dum li loĝis en tiu ĉambro neniam io okazis. Li nur sidis tie, ĉiun tagon, kaj neniam io okazis pro kio li povus esti feliĉa pri sia ekzisto. Ŝi ne trompiĝis, ĉar ŝi konis tion. Ankaŭ en ŝia vivo nenio okazis, ankaŭ ŝi estis mortanta jam dum jaroj, ĉiutage sklavece laboregante kun la morto en la koro.

Estis iam tempo, eĉ ankoraŭ en la tempo de la

studento kaj de sinjoro Vis, kiam ŝi revis pri amo. Ambaŭ observis ŝiajn movojn sentoplene, ambaŭ protekte metis brakon ĉirkaŭ ŝin por konsoli, por trankviligi ŝin kaj ne pro iu konsterniĝo, sed pro la tuta vivo kiu tiel longe estis nur mortado. Ŝi do revis pri la amo kiu igas la morton akceptebla.

Sed tiam venis la tempo, kiam ŝi kuŝis posttagmeze sur la lito, tro elĉerpita por revi pri amo kaj se ŝi tamen tion provis, ŝi ĉiam denove vidis nur la studenton kiel li estis kun siaj kaŝemaj manoj kaj sinjoron Vis kiel li estis kun sia senkompata perfortula mieno. Ŝi naŭzis pri sia ekzistado.

Kaj fine iĝis tiel, kiam ŝi posttagmeze kuŝis sur la lito, sen dormo kaj kun la okuloj malfermitaj sen rigardo, ke ŝajnis kvazaŭ ŝia koro malrapide, per suĉaj batoj komencis heziti, la spiro haltis, la kapo turniĝis. Kaj tiam subite timego trafis ŝin, anhele ŝi kaptis aeron, batis la manojn kontraŭ la koron kaj sidiĝis.

Sed iun momenton tio denove okazus kaj tiam ŝi eksidus kaj tiam ŝi ne plu kaptus aeron. Kaj tiam ŝi estus mortinta kaj ŝi sidus alte en la kusenoj kvazaŭ ŝi volus releviĝi por vivi, ĉar tion ŝi preterlasis kaj maltrafis kaj ĝuste tion ŝi tiel treege forte volis, tiel terure treege volis. Ŝi volus vivi per la korpo kaj la koro, kaj volus ami kun sango, ŝvito kaj larmoj, kun doloro kaj malsato, se nur estus amo.


Kiam komenciĝis, ŝi ne sciis, sed subite ŝi rimarkis ke ŝi ploras, mallaŭte kaj tede. Ŝi sidiĝis kaj plorante ŝi rigardis tra sia orda ĉambro, tiu orda ĉambro en kiu ŝi neniam vivis, sed en kiu ŝi ĉiun posttagmezon kaj ĉiun nokton kuŝis kvazaŭ vivanta surkatafalke. Kaj tiam ŝi leviĝis kaj momenton ŝi staris senespere perdita, ĉar ŝajnis ke ŝi povas elekti nur inter terura morto kaj terura vivo. Estis hazarde ke ŝi stariĝis antaŭ la longa spegulo de sia vestoŝranko, sed ŝi rigardis, ŝi vidis sin mem de

kapo ĝis piedoj. Kaj ŝi iris al sia spegubildo kaj rigardis sian vizaĝon; ŝi estis rompita, do tiu malkontenta rigardo kaj tiu malmola trajto ĉe la maldikaj lipoj estis malaperintaj, fakte ŝi miris pri la sendefendeco, kiun ŝi malkaŝis. Kaj tiam ŝi ekkonsciis, ke tiun saman sendefendan mienon ŝi certe montris, kiam venis iu, kiu forprenis ŝin de la morto kaj kiu konsolis kaj trankviligis ŝin, kun brako protekte ĉirkaŭ ŝi. Kaj tiel okazis ke ŝi iris al li.

Ŝi do iris al li. Li sidis ĉetable kaj enskribis kelkajn mendojn, ĉar li estis komerca vojaĝisto, kaj li ankaŭ finis kelkajn korespondaĵojn. Li sidis en ĉemizo, sen kravato, kaj portis pantoflojn. Tuj kiam malfermiĝis la pordo de lia ĉambro kaj li vidis ŝin, li komprenis kio okazas. Jen venas frue velkanta virino, timigita de la alta senkompata vizito de la morto. Ŝi volas vivi, ŝi volas havi la pruvon ke la sango ankoraŭ ne staras senmove en la vejnoj, sed ke varmege kaj forte ĝi batas sub ŝia soleca haŭto. Li volis ĝin doni. Li ekstaris, li nenion diris. Lia instinkto avertis lin ke li devas agi ne tro brute. Li venis al ŝi kaj metis sian protektan brakon ĉirkaŭ ŝin. Li alrigardis ŝin kun sincera rideto kaj momenton ankoraŭ li miris pri tiu rigardo, vere la rigardo de homo en mortangoro. Neniam li vidis virinon tiel rigardanta. Tiam li puŝetis ŝin sur sian liton kaj kisis ŝin. Ŝi lasis ĝin okazi, senvola, timema, kun fermitaj okuloj. Kaj tiam li tuŝis ŝin kiel faris tion la studento kaj tiam li rekte iris al la celo kaj fariĝis sinjoro Vis. Doloris al ŝi. Ŝi ne sentis amon, nek volupton, nenion. La sola penso, kiu okupis ŝin, estis timego ke ŝi ekploros. Kaj tio ne okazis; ŝia vizaĝo restis same malvarma kaj seka kiel ŝia korpo kaj ŝia koro.

El la kolekto "Overdag", (Dumtage) 1957.

Trad. M. H. VERMAAS



Logos

— Kian opinion vi havas pri nia medio, ho Philologos, filo de Aristomachos?

Philologos ĉirkaŭrigardis en la Forum Romanum. En la fono, antaŭ la Concordia templo, granda amaso staris ĉirkaŭ la *rostra*. Sur ĝi oratoro laŭtlegis la nomojn de la proskribitoj de Sulla. Amasiĝis ĉiam la samaj tipoj: sovaĝaspektaj feĉuloj kun gorilaj trajtoj, kiuj klopodis ekkapti per la oreloj kelkajn konatajn nomojn, ĉar la proskribitojn kiu ajn rajtis mortigi kaj liajn bienojn ricevis la murdinto.

Philologos kaj Biblophagos sidis ĉe la kontraŭa fino de la placo, sur la ŝtuparo de la *Basilica Aemilia Paulli* kaj videble ne interesis ilin, kiujn la senato deklaris la malamikoj de la respubliko.

— Kion mi povus diri novan al vi, ho Biblophagos? — li respondis ŝultrolevante. — Tiuj multaj konstruaĵoj tre similas al nia *Akropolis*. Ĉio estas tre simila al la niaj kaj tamen kiom da diferenco! Ĉar kio estis la ĉefa ornamaĵo de la *Akropolis*? La statuo de la diino de la saĝo. Kaj nun rigardu tion! — li diris, montrante al la statuo, staranta sur pilastro, apud la ŝtuparo. — Kion vi vidas tie? La lupinon kaj sub ĝia ventro la ĝemelojn, suĉantajn la lakton de sovaĝbesto, por ke jam la fondado de la urbo komenciĝu per fratmurdo.

— Prave vi diris, ho Philologos. Kaj ne forgesu, kiome diferencas ankaŭ la popolo ĉi tie kaj tiu de la atena *agora*. Tiu estis popolo, kiu vere kapablis krei la *Akropolon*. Tiun ĉi kanajlaron kungregiĝis nun la sangodoro kaj la predavido, dum ni kunvenis sur la *agora* por ĉirkaŭstari nian majstron, la honorplenan, maljunan *Kleistos*, por esti riĉigitaj per kelkaj saĝaj frazoj, kiujn ni rapide notis sur niaj vakstabuloj. Kaj ĉu vi memoras, kia ĝojo estis al ni ekvidi la cinikan saĝulon, *Hekateon*? Li vagadis la stratojn ĉiam malpure, en ĉifonaj vestoj, konforme al siaj principoj. Ni postkuris lin kaj petis veni al nia rondo, konversacii kelkajn vortojn kun nia majstro, por ke ni povu ĝui la diskuton, kies ĉiu vorto signifis ĝojon al la malsata animo, kiel la festeno de la dioj por sklavo. Kvan-kam ja ni estis ankaŭ korpe malsataj, konsidere, ke ni dediĉis niajn vivojn ne al akaparo de oro, sed por la filozofio kaj ni estis tre feliĉaj, se ni, elpreninte la ledan saketon el sub nia vestaĵo, trovis en ĝi kelkajn rostitajn fagoglanojn. Sed kial fari zorgojn pro tio, kiam nia animo ĝuis dian festenon! Kiam *Kleistos* kaj *Hekateon* diskutis pri la temo, kio estas la virto kaj justo! Kaj se ni, sekvante nian majstron, iris al la teatro, tie ni vidis same nin mem, ĉar la komedio primokis niajn majstrojn, aŭ la korifeojn de la publika vivo. La primokitoj

ridis des pli gaje, ju pli trafan satiron ili aŭdis pri si mem. La popolo aplaŭdis same al la aktoroj, kiel al la verkisto kaj al tiuj, pri kiuj ili ridis. Ĉu vi memoras? Okazis, ke iu riĉa bakisto, enviante la famon de la primokitoj, promesis abundan premion al la verkisto, se li foje eĉ lin mem primokos. Sed trafe li ricevis laŭ sia merito! La verkisto figuris lin kapropieda satiruso, kiu venas al la urbo, ekvidas la pilorion, kredas ĝin esti trono kaj suprengrimpos. La amaso ekvidante lin, komencas alĵetadi putriĝintajn bulbojn kaj koton, dum li ĉion ĉi imagas honorigo kaj kiam la provoso volas lin descendigi, li donas al li monon por lasi iome ĝui sian favoritecon.

Ambaŭ ridis.

— Prave vi parolis. — diris *Biblophagos*. — Vere, *Perikles* estris dum deksep jaroj la urbon, ĉar ĉiu civitano estimis lin. Li ĉiam portis kaskon, ĉar ĝi decis al lia staturo. Kaj, se sur la scenejo aperis aktoro kun korbego, aŭ fela vinujo sur sia kapo kun grandegaj okultruoj, la aŭskultantaro jam ridis plenuŝe, ĉar ĉiu ekkonis, kiun li volas imiti. Li iris kun aplombegaj paŝoj al la mezo de la scenejo, tie depuŝis la dion *Zeus* de sur la trono kaj li mem ensidis. Transprenis la fulmosagojn de *Zeus*, pikis tiujn al *Pallas Athene*, elŝiris la lancon el ŝia mano, derompis ĝian oran pinton kaj transdonis al la aktoro, kiu ludis la rolon de *Aspasia*. Fine *Aspasia* simple formangiĝis la oron. Nu, la kronikistoj notis, ke ĝuste *Perikles* estis, kiu plejkore ridis la scenon.

— Jes, ĉar li sciis, ke ĉio ĉi estas nur ŝerco, ĉar li neniam klopodis al tiraneco kaj li neniam ŝtelakiris unusolan drakmon de la popolo.

— Ĝuste pro tio. Sed ekprovu nur primoki iun banditestron ĉi tie! Tuj vi estus krucumita, ĉar ne troviĝas akuzo, ekde la rabado, ĝis la patromurdo, aŭ de la vanteco ĝis la plej fia krueleco, kiu ne trafus ilin tute prave. Rimarku firme, *Philologos*: se iu postulas al si honoron, indan al la senmortaj dioj, tiu faras, ĉar li bone scias sian malindecon kaj senhonoron. Tial estas, ke en la ĉirko nur la gladiatoroj murdas sovaĝbestojn aŭ unu la alian, dum la muzoj larmas kaj katenite silentas. Sed imagu nur, kia sensacia sceneja figuro povus esti modelita pri tiu verukvizaĝa Sulla! Oni povus priludi, kiel li suĉas la lupinon, kiel li hurlas pro tio lupmaniere kaj ĵetas sin hurle al Grekio por suĉi ĝian sangon.

— Kaj ankaŭ la lakton, ho *Biblophagos*! Ĉar ne forgesu, ke Sulla tre bone parolas greke. Li eĉ skribas. Memkompreneble siajn proprajn heroaĵojn, ĉar ili havas kapablon nur al tiaj verkaĵoj. Sed eblas, ke eĉ tion li nur verkigas per iu heleno,

kiu nun kontraŭ valora mono priskribas, kiel lia mastro elrabis niajn templojn, kiel li disrompigis la statuojn kaj kiom gloriplene li forbruligis niajn librojn. Se tiuj ĉi ne suĉus nian lakton, ili jam eĉ ne vivus.

— Prave, mia amiko. Mi ankaŭ miras, ke ili ankoraŭ ekzistas. Antaŭ nelonge *Marius* ekstermadis siajn kontraŭulojn same, kiel nun *Sulla*. *Marius* jam estas mortinto kaj nun sekvas lin liaj kunuloj. Sed ĉu eblas ŝtaton vivteni per ĉiama renverso de la saĝo kaj justo? Ĉu vi memoras, kiel difinis Platono la justan vivon?

— Ke ĉiu faru kaj ricevu tion, kio lin koncernas.

— Prave vi diris. Sed se ĉiu akiras tion, kio koncernas aliulojn, kiel finiĝos la procedo? Reciproka rabado kaj ruinigo ĝis la plena pereco. Ĉu vi kredas daŭran regadon al *Sulla*? Ĉu vi imagas, ke unusola homo povas leviĝi super ĉiu alia kaj povas senbride subpremi ĉiun aliulon? Ne, *Philologos*, tio ne eblas, ĉar fine murdos lin iu el lia propra kliko. La perforto neniigas sin mem. La balancilon oni povas ekpuŝi, ke ĝi svingiĝas supren, al iu finpunkto, sed klopodas malsupreniĝi al la kvietpunkto. Kaj vane vi provas starigi la kubon sur ĝia rando, ĉar la dioj ordonis, ke ĝi povu stari nur sur la platoj. Nur tia socio staras sur firma bazo, kiun gvidas la menso kaj scio, kiel ofte rakontis al ni nia majstro, laŭ la doktrinoj de Platono. Nek la sangavida kanajlaro de la *circus maximus*, nek la eĉ pli sangavida banditestroj povas, aŭ povos iam ajn gvidi kaj subteni ŝtaton. Ĝuste tial akcentis Platono, ke la ŝtato povas esti regata nur flanke de la saĝuloj, al kiuj estos malpermesite akiri havaĵojn. Ili ne rajtos droni en plezuroj, por ke ne venenigu iliajn korojn la akaparemo, la malamo, intrigo, insidemo. Kaj el ili neniun povos leviĝi super siaj kolegoj, por eviti la tiranecon kaj la putriĝon de la puraj virtoj. Jes, mia amiko, tiu ĉi estas la perfekta ŝtato.

— Kaj tiu ŝtato devas nepre alveni, ĉar ekzisti povas nur afero, kiu estas laŭmensa.

— Prave *Philologos*. Ĉu vi scias, kiel sanigas la *chirobantikaj* pastroj la histeriajn virinojn?

— Jes. Per fajfinstrumentoj ili ludas furiozan dancmuzikon kaj igas la malsanulinon dancegi, ĝis ŝi terenfalas kaj profunde endormiĝas.

— Vere. Kaj post la vekigo la malsanulino trankviliĝas. Nu, ĉi tie, ĉirkaŭ ni okazas la sama: ĉefbanditoj dancigas la popolon ĝis la plena senluziigo kaj tiam sekvas la saniĝo: la popolo trankviliĝas, eknaŭzos la sangon, rifuzos la pluan inferan spektaklon kaj alvenos la regado de la menso, ĉar alimaniere ne eblas. Tiam la homoj kontentiĝos kun freŝa tritikpano, kiun oni altabligas sur agla mato, krome manĝos ili fromaĝon, salan olivberon, bulbon, figon: eble ili altrinkos vivon, dum iliaj lipoj kantos la gloron de la senmortaj dioj kaj poste ili ekkuŝos en betullignaj litoj, sur kuŝejoj, faritaj el mirtaj branĉoj. La akaparemo kaj gloravido neniun incitos kontraŭ lia homfrato, ĉar la saĝo iluminos la cerbojn, ke la virto estas pli utila al ili.

— Ho, jes. Ni, saĝuloj, bone scias, ke troviĝas

nur unusola potenco: la menso. Rigardu ĉi tien, ho *Bibliophagos*: ĉi tiu ŝtuparŝtono iome suprenleviĝis ĉar sub ĝi kreskajo etendas siajn radikojn. Sed kio donas al ĝi la forton por tio? La menso, la animo! La *logos*. Prave diris *Thales*, ke en ĉiu herbeto loĝas dio, ĝia propra dio, kiu igas ĝin kreski. La kruda forto estas nur servisto, dum la reganto estas la logos, la leĝaro de la menso.

— Kaj la perforto devas kliniĝi antaŭ la menso. Ju pli arde furiozas la despota perforto, des pli frue ĝi renversas sin mem kaj helpas surtroni la menson. En la kortego de *Sulla* jam nun ĉiuj tremas kaj neniun estas certa pri sia vivo. Kelkuloj provas firmigi siajn poziciojn, ke ili klopodas eĉ superi la ordonojn de *Sulla* kaj distingiĝi per trofervora murdado. Sed kio estas la premio? Ke sekvontage *Sulla* sendas lin al la eŝafodo por malbligi konkurencon. *Sulla* de tempo al tempo ĉirkaŭrigardas en sia rondo kaj, se iu kapo komencas elstari el inter la ceteraj, tuj li dehakas. Sed la malkonfido naskas malkonfidon kaj pli-malpli frue troviĝos ŝtelmurdisto, kiu mortpikos lin, por savi sian propran vivon. Eĉ duonjaron mi ne aŭguras al lia regado. Kaj post li sekvos la regado de la saĝo.

— Jes. Unusola potenco estas la menso. La logos.

— Jes. La saĝo. La *nous*. Kaj tiun reprezentas, ni, *helenaj saĝuloj* en ĉi tiu barbara lando. Kredu *Philologos*, ke la urbo kuŝas jam nun antaŭ niaj piedoj! Sed tamen ni ne surtretos ĝin, nur gvidos laŭ la vojo de la virto, dece al saĝa kaj bonintenca reĝo... Ve!

— Ve! — kriis ankaŭ *Philologos*.

Ambaŭ eksenti fortan piedbaton sur siaj dorsoj. Ektime ili turniĝis, sed jam torentis la mallaŭdo el la buŝo de *Stultius*, la etiopa inspektoro de la sklavo:

— Fi! Mizeraj, kanajlaj sklavo! Ĉu vi tie ŝteladas la tempon, kiam mi ordonis al vi, tuj marŝi al la monto *Janiculus* por paŝti la brutaron? Prave mi avertis nian mastron, la noblan kaj grandaniman *Caius Publius Valerius*, eĉ unu moneron ne elspezi por tiaj mizeraspektaj sengrasuloj, ĉar ili estas pigraj kiel pediko. Sed atendu nur, mizeraj sentaŭguloj, mi regalos vin! Klakos la vipo hodiaŭ sur viaj dorsoj! Ek!

Ambaŭmane li ekkaptis la ferringojn, forĝitajn sur la koloj de la sklavo, suprentiregis ilin kaj piedbatante, skuadante puŝadis ilin tra la tuta forumo. Atinginte la templon de *Saturnus*, li denove traktis ilin per la piedoj kaj forlasante, irigis ilin al la monto, akcentante, ke ili iru laŭ la plej mallonga vojo, tra la ponto de *Probus* kaj antaŭ krepusko ili prezentu sin hejme, por ricevi la vipon.

La du sklavo veante, lamante marŝadis laŭ la *Vicus Jugarius*. Kaj iliaj veadoj intermiksiĝis kun la stertorado de tiuj kvarmil *samnita* militkaptitoj, kiujn ĝuste tiam buĉadis la legianoj, konforme al la ordono de *Sulla*.

Sándor Szathmári



Vilho Setälä: *En naturo*

Nuntempaj fotoartistoj ofte parolas pri la obstaklo de la grajnoj. Jen specimeno pri tio, ke la grajnoj povas esti fonto kaj rimedo por arta esprimo. En la origina negativo la bildo estas apenaŭ 2 mm larĝa. La kliŝo estas farita sen la reto, ordinare bezona por reprodukti foton; ĝi efektiviĝis sur la bazo de la grajnoj mem.



Josip Velebit:

Aŭtune

Kiam foli' defalas,
foli', ho foliar',
por vangoj kiuj ekpalas
ekknaras la lasta ĉar'.

Sed la foli' reverdas,
foli', ho folibel',
kaj koro koron perdas
por ĉiam sen apel'.

Jan Filip:

Antaŭmaja Nokto

Kiel grandaj tombolampoj
brulas fajroj en mallum',
vento blovas super kampoj
grizajn nubojn de la fum'.

Maj' venonta ridon portas,
brulas fajroj en mallum',
— sed mi sentas : io mortas
en ĉi-nokta festival'.....

La burĝonoj naskiĝontaj
jam odoras en aer',
tamen — en la fajroj montaj
io finas sur la ter'.

Kvazaŭ nokta papilio
Ĝem' el kor' ekflugas jen.
Sed ĝojbruas la tilio,
flor' kreskiĝas en ĝarden'.....

K. Etli

Statistikisto

Ni konatiĝis en nehejtita vagono. Li surhavis grandan pelton, kies alta kolumo tuŝis lian nazon, tiel ke oni povis vidi nur lian okulvitron, faskon da haroj kaj la randojn de liaj oreloj. Li malfermis buŝon unua, dirante :

— Hunda frosto !

— Abomena ! — rediris mi.

Iom ni silentis kaj denove li ekparolis :

— Ni devas plendi.

— Jes, mi diris. Tiel komenciĝis nia konversacio. Mi eksciis, ke li estas statistikisto kaj ke li veturas al Budapeŝto. Mi veturis al Vieno.

— Al Vieno ? — ekkriis li. Atentu pri la hotelo, por ke vin ne mordu cimoj.

— Cimoj ? ! Vere mi estas membro de societo por protekto de bestoj, sed mi ne povas deklari, ke mi ŝatas la cimojn. Kaj ĉu estas multe da cimoj en Vieno ?

— Abunde ! Laŭ miaj kalkuloj ... ja mi diris al vi, ke mi estas statistikisto ...

— Jes, mi petas, bonvolu diri !

— Laŭ miaj kalkuloj en la litoj de Aŭstrio estas po unu kaj duona cimo; en Italio — po dekdu cimoj. Plej malgrandan elcenton montras Grenlando; tie je ĉiu lito estas po kvarono de cimo. Iom pli diferenca estas la statistiko pri la puloj.

— Vi disponas pri tre interesaj faktoj, diris mi.

— Ho jes, mi estas statistikisto laŭ inklino. Belega kaj nobla profesio. En la ciferoj estas vivo.

En tiu momento la vagonaro haltis ĉe iu stacio, sed feliĉe neniu eniris nian kupeon.

— Tre interese estas observi la vojaĝantojn, diris mi hazarde.

— El statistika vidpunkto, jes — tuj konsentis li. Pri tiu temo mi povas diri al vi jenon : El mil vojaĝantoj en Okcidenta Eŭropo potage malfruas por la vagonaroj du personoj, kaj duono de vojaĝanto mistrafas sian vagonaron. El la hebreoj unu kaj tri kvaronoj alvenas tre malfrue kaj du kaj sep okonoj mistrafas la trajnojn. Similajn erarojn oni povas konstati plej malofte inter la samoedoj, eble pro la fakto, ke en ilia lando la fervoja trafiko ne estas tiel intensa. Je cent vojaĝantoj de vira sekso, 84 tenas sian bileton en la veŝpoŝo, 7 en la monujo, 8 en la ĉapelo, unu en la ŝuo; duono de persono je cent trovas sian bileton post kelkminuta

serĉado kaj duono tute ne trovas ĝin. Laŭ profesio ... sed momenton, ĉu mi rajtas demandi vin pri via profesio ?

— Mi estas verkisto, konfesis mi.

— Brave ! Min ege interesas ankaŭ la arto, kvankam ĝi ŝajnas al mi tre proza kompare kun la statistiko. Ĉu al vi estas konate, sinjoro verkisto, ekzemple, ke en la zono de modera klimato je ĉiuj 4 kv. klm. estas nur duono de kv. kilometro bela panoramo kaj ke je ĉiuj ses kilogramoj da produktita skribpapero estas du kaj kvarono de kilogramoj da bonaj poemoj. El mil lirikaj versaĵoj, 196 komenciĝas per la vorto "nokto" kaj 262.65 per la vorto "malĝojo". El cent okcident-eŭropaj poetoj 4 loĝas en partero, 19 sur la unua etaĝo, 26 sur la dua, 9 sur la tria, 43 sur la kvara kaj pli supre. Du posedas vilaojn, kvar estas en malliberejo, tri ne posedas propran loĝejon kaj unu loĝas en la stacidomoj. Do, kiel vi vidas, mi zorgeme pristudis la tutan Eŭropan literaturon.

— Jes, mi admiras viajn konojn kaj mi estas tre kontenta, ke mi konatiĝis kun tia specialisto pri la literaturo.

Eniris la konduktoro, kontrolis la biletojn kaj elirante puŝis forte la pordon.

— Kia profaneco ! — diris mi.

— Apenaŭ vi havas ideon, kiel malbone estas edukita la homaro ! — tuj ekflamis mia kunvojaĝanto. El ĉiuj 10,000 personoj, 3094 fermas la pordon per puŝo, 276 purigas per fingroj sian nazon, 453 ŝmacas manĝante, 179 sin gratas, 868 mordas siajn ungojn, 693 enbuŝigas la tranĉilon anstataŭ la forko. El cent personoj de tiuj, kiuj fingre purigas sian nazon, 84 estas viroj kaj 16 virinoj, 73 estas sub 20-jara aĝo kaj 27 super. La nazojn oni purigas per fingroj plej ofte en decembro kaj malplej ofte en aprilo. La religioj ne influas la oftecon de tiu kutimo. Tiuj, kiuj portas nazringon sur la nazo malpli ungo-gratas ĝin.

Nun, de la nazoj ni povas transiri al tiuj, kiuj purigas siajn dentojn per dentvergetoj sur publikaj lokoj ...

La vagonaro eniris la Orientan stacion de Budapeŝto kaj mi eksentis veran bedaŭron, pro la fakto ke mi disiĝas de mia kunvojaĝanto.

Esperantigis : Jelezka Stanimirova

Diskotu

PRI LITERATURA ARTO KAJ ESPERANTO

En la semajngazeto FREEDOM (Londono) je la 7a de februaro 1959 aperis recenzo (anglalingva) pri la ESPERANTA ANTOLOGIO (1) per la plumo de A. D. Foote. Tiu recenzo vekis diskuton, kiu, laŭ nia opinio, povas esti interesa ankaŭ por la esperantistaro; kaj tial ni represas ĝin sube en traduko. Unue, la recenzo mem:

☆

LIBERO iĝis ja bezono
Por homaranoj ĉiulande.
Mi diras ne nur propagande
Ĉi tion, nek por fanfarono.

Jes, en Britio kaj Usono,
Kaj Malte, Cipre kaj Ugande,
LIBERO iĝis ja bezono
Por homaranoj ĉiulande.

Eĉ Kruščev diris, prov-demande,
'Nu, jes, ĝi eble estas bono!'
Ĉu kun permes', aŭ kontrabande,
Ĝin ĝui devas ĉiu homo....

LIBERO iĝis ja bezono....

La supraj vortoj (unuminuta komerca reklamo por FREEDOM (= libero) apartenas al la sama akciaro, kiun origine enborsigis antaŭ 70 jaroj pola doktoro, kiu ĝin inventis dum la dek jaroj post lia

1) ESPERANTA ANTOLOGIO. Poemoj 1887-1957. Redaktis William Auld. Eld. Juan Régulo, La Laguna, 1958. 648p. 22 × 16.

diplomiĝo en gimnazio.

Depost tiu tago Esperanto fariĝis kulto; oni povus diri, vivmaniero. Tiu lasta frazo estus pli trafa se Usono ne estus, ho ve! doninta al ĝi minacmornan tonon; aŭ se Esperanto estus, kio ĝi ne estas, temo de vastigita aprobo.

Efektive, el tiuj, kiuj lernis ĝin tiam aŭ tiam (kaj ili inkluzivas Prezidanton Tito kaj la mortintan Jozefon Stalin), malmultaj opinias, ke ĝi havas gravajn sociajn aŭ politikajn sekvojn. La aŭtoroj de jena kolekto, tamen, apartenas al alia kategorio: ĉar ilia komuna ligiteco estas tio, ke ili ĉiuj verkas poezion en Esperanto, kaj trovas ĝin (verŝajne) kontentiga esprimrimedo.

Minimume, tiu ĉi estas unika volumo. Kiel diras la faldklapo, en neniu antaŭa verko estas kolektita poezio el 28 diversaj landoj sen la uzado de traduko. Sed se la pretendoj de la redaktoro kaj eldoninto estas pravaj, ĝi estas pli ol literatura kuriozaĵo; ĝi signas la eliron de nova literaturo.

La plimultaj verkistoj preferas limigi sin al la lingvo de sia naskiĝloko. Kelkaj elektas najbaran, malpli provincan, idiomon: kiel ekzemple Kafka elektis la germanan prefere ol la ĉeĥan, aŭ Koestler, denaska hungaro, elektis la germanan, kaj fine la anglan.

Kelkkaze tio havas politikan signifon, kaj la socia konscienco de la aŭtoro devas decidi la aferon.

Sed vere tre malmultaj volus elekti lingvon, kiun parolas malpli ol unu miliono, kaj aktive parolas malpli ol 16.000.

Kiaj estas la motivoj, kiuj kondukus al tia decido? Kaj ĉu la rezultajo tion pravigas?

Sendube per Esperanto oni povas atingi pli heterogenan publikon, kvankam eble malagrable anoniman. Grandeco malmulte gravas. Ĉiu ver-

kisto rekonas la valoron de klikoj, kaj konstatas la stimulon de verkado por iu grupo, negrave kiel malgranda tiu grupo estas. La esperantista grupo estas malgranda, kaj proponas plurajn el tiuj avantaĝoj.

La uzado de neŭtrala lingvo ebligas, ke oni staru ekster la lojalecoj kaj antaŭjuĝoj de sia grupo. Por William Auld, la redaktoro de tiu ĉi antologio, mem en ĝi reprezentata de kelka vigla kaj politike progresema poezio, tio estas evidente la decida faktoro.

Ankaŭ la transiro de trouzita perilo ĝis unu en kiu ĉiuj vortoj estas novaj kaj neesploritaj, povas havi liberigan efikon. Marjorie Boulton, angla verkistino kiu nuntempe verkas versaĵojn nur en Esperanto, elektis ĝin ĉar ĝi estas pli pasia; Kalocsay, hungara doktoro kaj klerulo en 12 lingvoj, ĉar parolado kaj tonoj ĉiam sorĉis lin — parolado ĝenerale, ne en unu aparta lingvo. Li estas la Chaucer de la grupo, kaj imitas egale facile la japanan kaj la finnan.

Entute, tamen, tiuj, kiuj serĉas klare internacian ideologion (kaj tiuj, kiuj kredas ke per verkado en Esperanto ili atingos tion) seniluziiĝos.

Poezio devas havi radikojn en la socio. Ĉar Esperanto estas ankoraŭ, finfine, nur kultura movado, ĝia poezio malhavas la specifan trafecon necesan por granda arto.

La fincelo de Esperanto, kompreneble, estas bone konata. Ĝi malmulte diferencas de la celoj de tiaj organizaĵoj kiel UNESKO. Helplingvon oni vidas kiel rimedon al universala klero kaj demokratio, kaj libera interŝanĝo de scioj sur bazo de egaleco inter grupoj. Tiu idealo estas en si mem admirinda.

Enkorpigite en Esperanto, ĝi kondukas al fascina paradokso. Ĉar, por atingi tiun celon, ĉiuj devos paroli Esperanton, kiel ili nun parolas sian propran lingvon. Tio signifas, laŭ efiko, ke ĝi devos anstataŭigi la nunajn lingvajn kutimojn de la homoj ĉie; celo, kiu, se ne home neebla, estas almenaŭ utopia.

Duonvojo estas nekonceptebla, tial ke lingvo aŭ prenas tutan komandon (t.e., estas perilo por ĉiu kaj ĉia esprimado) aŭ estas pura flankafero, limigita al certaj okazoj.

Evidente, Esperanto devus resti flankafero. Ĝi devus plenumi iun rolon, similan al tiu de la latina en la katolika liturgio; suba, nome, al la celoj plenumataj de la jam ekzistantaj etnikaj lingvoj.

Sendube kun la plej bonaj intencoj, la poetoj en tiu ĉi libro jam pasis la limon, ĉe kiu kreita helplingvo estas ankoraŭ socie utila. Farinte literaturan lingvon, ili fakte estas turnintaj la dorson al la bezonoj de la homaro kaj elektintaj esoterismon.

Malgraŭ tio, la poezio estas bona. Iom el ĝi estas tre bona. Enestas parto de eposo de jezuita misiisto en Ĉinujo, kiel ankaŭ elektaĵoj el kabaredo kiu, la recenzanto memoras, foje funkciis en sondistanco de la elevatoroj de Eĵfelturo. Tiu sama aŭtoro, en siaj humuraj versaĵoj, kapablas verki versojn taŭgajn por stari apud la gaja malĉastemo de Dylan Thomas.

La mencio de Thomas estas trafa, ĉar Dylan Thomas naskiĝis en Swansea (2) kaj tamen verkis en speco de anglalingvo vartita en la kortego de Elizabeta (3) Londono.

La falsajo kaj la fatala sorĉo de esperanta verkado estas tio, ke, kvankam la homaro bezonas unu lingvon, oni ne povas verki por la homaro, simple uzante neŭtralan perilon.

En la rusa, la angla, aŭ eĉ la kornvala (4), verkistoj ĉiam povas transcendi la nacion kaj socian grupon, al kiu ili apartenas. La elementoj de ilia verkaro, kiel ankaŭ iliaj privataj lojalecoj, restas rekoneblaj, sed la unueco kreita de tiuj elementoj estas simbola, kaj sekve liberigita de sia unu-al-unu-a rilateco al tempo kaj spaco.

Evidente la transiro de Swansea ĝis Londono, de la angla ĝis Esperanto, de la malpli vasta ĝis la vasta rondo, en si mem nenion signifas. Estas la indiĝena utileco de la elementoj regataj de la aŭtoro, kune kun lia transformata potenco, kiu rezultas universalecon.

D-ro Jivago estus neimagebla sen la unika fono, perata per ĉiu vorto kaj ĉiu alineo, de la rusa revolucio. Dylan Thomas estus perdiĝinta sen la antaŭuloj, de kiuj lia retoriko estas, kiom ajn nerekte, derivita: la eŭfuistoj, la romantikaj taglibristoj, kaj la predikintoj en la Vezliaj kapeletoj.

De tempo al tempo Esperanto radikiĝis: en siberiaj sklavurboj, en izraelaj kibucoj. Sed ĝia ĝermo ĉiam denove elŝiriĝis pro la sinsekvaj krizoj de nia epoko. Ĝi eble, pro ia neantaŭvidebla ŝanĝiĝo de la aferoj, fariĝos definitive establita kiel la ĝusta ilo por gravaj entreprenoj. Nur en tiu okazo, ĝia rolo kiel rimedo por poezio povos esti plene akceptata.

Dume, ĉi tiu libro estas mejlŝtono, ĉar ĝi montras kiel proksima, kaj tamen kiel malproksima, la homaro estas de unueco.

A. D. F.



Pro tiu recenzo la redaktinto kaj la eldoninto de la ESPERANTA ANTOLOGIO sendepende skribis al la koncerna gazeto, kaj iliaj leteroj estis en ĝi presitaj. Aperis unue tiu de William Auld, la redaktinto:

Mi dankas pro la recenzo pri mia ESPERANTA ANTOLOGIO en via numero de la 7a de februaro. Mi tamen bedaŭras, ke via recenzinto ne donis pli da spaco al la recenzata verko, kaj malpli al ex

2) Swansea estas kimra urbego.

3) 1558-1603.

4) Mortinta kelta lingvo de sudokcidenta Anglujo.

cathedra kaj aprioraj prononcoj pri Esperanto, bazitaj sur nenio alia ol liaj propraj antaŭjuĝoj. Eble vi permesas, ke mi indiku almenaŭ kelkajn el la falsajoj de lia artikolo.

Via recenzinto opinias ke "... ĉiuj devos paroli Esperanton, kiel ili nun parolas sian propran lingvon. Tio signifas, laŭ efiko, ke ĝi devos anstataŭigi la nunajn lingvajn kutimojn de la homoj ĉie..." Ĝi signifas nenion similan. Ĝi signifas nur, ke Esperanto estu la dua lingvo por ĉiuj. Nuntempe milionoj da horoj estas malŝparataj ĉiujare tra la tuta mondo en malsukcesa klopodo instrui al britaj infanoj la francan lingvon, al italaj infanoj la germanan lingvon, al ĉeĥoslovakiaj infanoj la rusan lingvon, ktp (--ĉu ĉio ĉi prezentas klopodon "ŝanĝi la nunajn lingvajn kutimojn de la homoj ĉie", kaj, se jes, kio pri tiuj milionoj kiuj estas denaske du-lingvaj?). Ĉiokaze, ĉiuj krom vera manpleno el tiuj esperplenaj lernantoj neniam parolos la duan lingvon "kiel ili nun parolas sian propran lingvon". Sed en Esperanto ili povas tion fari, kaj sekve al ĉiuj infanoj devas esti instruata Esperanto kiel la dua lingvo (kio ajn estu la tria, kvara aŭ kvina lingvo). Tiamaniere ili estos minimume pli bonstataj ol ili nun estas, sen ŝanĝado de iliaj t.n. "lingvaj kutimoj". En tio estas nenio utopia.

Via recenzinto plue asertas: "Evidente Esperanto devus resti flankafero. Ĝi devus plenumi iun rolon, similan al tiu de la latina en la katolika liturgio; suba, nome, al la celoj de la jam ekzistantaj etnikaj lingvoj". La celoj plenumataj de la "jam ekzistantaj" etnikaj lingvoj estas precize — etnikaj; t.e., ili estis kreitaj por plenumi la lingvajn bezonojn de klare difinitaj etnikaj grupoj, kaj ĉiu etnika lingvo malsukcesas plenumi *kontentige* la lingvan funkcion de komunikado, kiam ĝi estas aplikata ekster la propra teritorio. Sed la rolo de la *jam ekzistanta* Esperanto ne estas nur "iu" rolo, sed klare difinebla, socie necesa rolo, por kiu ĝi estis konscie kreita — nome, por ebligi al la membroj de *diversaj* etnikaj grupoj interkomunikiĝi libere kaj nature. Tio estas ĝia rolo, kaj tiun rolon nur ĝi, inter la lingvoj de la mondo, plenumas perfekte. Ĝi ne estas, sekve, "suba", sed prefere "transcenda" inter la ceteraj lingvoj.

Estas mirige trovi la aserton de via recenzinto, ke lingvo devas esti iel limigita geografie antaŭ ol oni povas uzi ĝin kiel perilon de poezio. Li parolas pri tio, ke ĝi "radikiĝis", ekz-e en kibucoj. La biologia metaforo estas malekzakta, ĉar lingvo estas sociologia kaj ne biologia laŭ naturo. La sola loko, sekve, en kiu ĝi povas "radikiĝi", estas *la mensoj de homoj*, kaj kiam ĝi tion faras, geografiaj distancoj ne povas elŝiri aŭ detruigi ĝin. Kiel ĉiuj lingvoj, Esperanto ekzistas en la mensoj de la homoj, kiel ankaŭ, estu notite, la poezio. Nu, via recenzinto opinias, ke la poezio ne estas "socie utila" — kurioza sinteno de persono, kiu utiligas versojn por reklami LIBERON. Li asertas, ke la poetoj, kies verkoj aperas en mia libro, jam pasis la limon kie

Esperanto "estas ankoraŭ socie utila". Farinte ĝin literatura lingvo, ili "estas turnintaj la dorson al la bezonoj de la homaro" — kiuj, sekve, ne inkluzivas literaturon! Supozeble via recenzinto tion ne *volis* diri, sed tion li diris; kaj vere, oni ne povas permesi al li ambaŭ sintenojn kune. Lin trompas, kompreneble, liaj antaŭjuĝoj, kiel mi diris en la komenco. Li diris, ke "Esperanto fariĝis kulto", kvankam Esperanto ne estas, nek povas esti, io alia ol lingvo. Laŭ ĉiu alia senco, se Esperanto estas kulto (ĉar ĝin amas, eble troe, ĝiaj adeptoj), tiokaze tiaj estas ankaŭ la angla, la franca, la germana, kaj ĉiuj miloj da "patrinlingvoj", kies adeptoj (inkluzive vian recenzinton) emas al blinda adoro, kaj estas nur tro pretaj proklami la supercon de sia lingvo kontraŭ ĉiuj aliaj, ĉu aŭ ne ili ion ajn scias pri ili. Tiuaspekte, do, kiel en ĉiuj aspektoj, Esperanto neniel diferencas de la aliaj lingvoj.

La eraro de via recenzinto devenas de la fakto, ke, korekte liginte la lingvon kun la socia grupo ĝin uzanta, li neas, ke la esperantistoj formas socian grupon. Sed ili jes. La esperantistoj ne, laŭ la difino mem, formas nacion; sed ankaŭ (por uzi la ekzemplon de via recenzinto) la hierarkio de la roma eklezio tion ne faras — ĝi tamen estas "socia grupo", kaj havas sian lingvon por religiaj celoj. Tutsame, la esperantistoj estas socia grupo uzanta sian lingvon por internaciaj celoj.

Fine, estas eble oportune indiki, ke la kapablo verki poezion (aŭ ion ajn) dependas, ne, kiel via recenzinto sugestis, de la lingvo elektita, sed de la kapablecoj de la verkisto. En la kazo de difinita individuo, la kultura fono, la "transforma potenco" kaj tiel plu restas la samaj, negrave en kiu lingvo li elektas sin esprimi. Konkrete, mi estas la sama persono, ĉu mi verkas en la skota, la angla aŭ Esperanto. La "genio" de lingvo dependas *tute* de la genio de ĝiaj uzantoj. Via recenzinto ne neas, ke almenaŭ iom el la poezio en mia antologio estas "tre bona"; sed li samtempe sugestias, ke estas neeble verki bonan poezion en Esperanto (kiu malhavas "specifan trafecon" ktp) -kurioza duflankeco! La vero estas, ke la ESPERANTA ANTOLOGIO prezentas elektajn el la verkoj de 90 poetoj el 35 (ne, kiel pretendas via recenzinto, 28) landoj, kiuj elektis esprimi siajn plej belajn sentojn kaj esprojn en *unu komuna lingvo*. Ĉu estas tro, pretendi, ke tiu fakto mem sufiĉas por pruvi la rezerveojn de via recenzinto senbazaj? Mi pretendus eĉ pli. Mi pretendus, ke la kultura nivelo, la vivanteco kaj la estetika valoro de la ESPERANTA ANTOLOGIO, kiel tuto, neniel malsuperas tiujn de iu ajn poemanologio en iu ajn "etnika" lingvo kovranta la saman periodon, t.e., la pasintaj 70 jaroj. Tiuj, kiuj kredas tiun pretendon troigita, estas invitataj legi la libron kaj juĝi mem. Diskutado ne eblas sur iu ajn alia bazo.

William Auld

Iom poste sekvis la letero de la eldoninto, Juan Régulo Pérez :

Danke mi legis la recenzon, kiun via gazeto aperigis pri la ESPERANTA ANTOLOGIO, kiun antaŭ ne longe mi eldonis. Unue mi ne emis ion diri pri la konstatoj de S-ro A. D. F. Sed ilin relegante iom pli poste, mi ekkonsideris, ke estas mia eldonista devo almenaŭ ion diri pri miaj konceptoj de poezio kaj beletra ĝenerale, ĉar ĝuste tiuj konceptoj instigis min dediĉi ne malmulte el miaj tempo kaj energio al esperanto. Kaj ĉar tiuj kriterioj ne estas porokaza improvizo, mi reutiligas kelkajn konsiderojn, kiujn iam mi esprimis en tezo, kiam mi licenciatiĝis pri klasika filologio — eĉ se nun fokusitajn al nia konkreta temo.

S-ro A. D. F. asertas: "Poezio devas havi radiokojn en la socio. Ĉar Esperanto estas ankoraŭ, finfine, nur kultura movado, ĝia poezio malhavas la specifan trafekon necesan por grandioza arto". Kaj iom poste li aldonas: "Estas la indiĝena utileco de la elementoj regataj de la aŭtoro, kune kun lia transformata potenco, kiu rezultigas universalecon".

Tiujn asertojn mi konsideras rezultajo de beletra ŝovinisma, filistra naciĉabueco. Jen miaj motivoj. Studinte la verkaron de Sofoklo por mia supre aludita tezo, mi starigis al mi la demandon: Kial tiu verkaro, kontraste al multaj aliaj postepokaj, impresas al ni ĉiam daŭre freŝe? Kaj mi trovis, ke tio ŝuldiĝas ĉefe al tri faktoroj: unue, al la fakto, ke Sofoklo okupiĝas, jes, pri la homo, sed ja ĉefe pri liaj esencaj konsistigaĵoj, antaŭaj kaj superaĵoj al la ŝanĝigantaj historiaj cirkonstancoj kaj sekve transvivantaj ĉian ŝanĝon kaj daŭrantaj por ĉiuj tempoj en nevelkebla vivfreŝeco; due, al la fakto, ke Sofoklo dramigas realaĵojn, ne esperojn aŭ revojn; trie, al la cirkonstanco, ke Sofoklo ne parolas pri tiu aŭ alia homo sub propra nomo, sed pri la homo. Sed ĉar nur apartaj okazoj povas ekzisti, per la priskribo de tiuj apartaj okazoj la artisto kreas eternajn valorojn, same kiel la sciencisto, post esploro de apartaj fariĝoj, starigas eterne validajn sciencajn leĝojn.

Tiel do la klasikeco de Homero, de Pindaro, de Sofoklo aŭ de Virgilio konsistas en tio, ke kion ili roligas al siaj herooj, tio vekas ĉiam daŭran eĥon, ĉar ĝi eterne reokazas en ĉiu aparta individuo. Kaj pro tio, ke ekzemploj pli trafe ilustras asertojn, jen po unu el tiuj kvar poetoj:

1. En la *Iliado* (XVI), Sarpedono kaj Glaŭko, du liciaj princoj, batalas apud la trojanoj. Sarpedono mortas. Lia amiko Glaŭko ne povas lin defendi, eĉ ne lian kadavron, ĉar lanco estis trapasinta brakon de Glaŭko. Tiam Glaŭko vokas sian dion, Apolonon, kaj diras al li: "Aŭdu min, Reĝo, ĉu vi troviĝas en la riĉa Lidujo, ĉu en Trojo, ĉar el kiu ajn loko vi povas aŭdi homon, kiu vin vokas en sia angoro". Tio estas tre oportuna en la okazo de

Glaŭko, sed profunde ĝi estas la homa sinteno, el kiu deiras la morala dio-ideo.

2. Pelopso, en la unua *Olimpia Odo* de Pindaro, post komplika biografio simbioze elvolviginta sur la tero kaj sur la ĉielo, en la antaŭvespero de la danĝera konkurso, kiun li devos alfronti por gajni Hipodamian, li, apud la maro, vokas la dion de sia infanaĝo, "tute sola, en la mallumo" — en la *mal-luma nokto de ĉia religia komuniĝo*.

3. En sia tragedio *La traĥaninoj* Sofoklo bildigas oldulinan ĵaluzon. Dejanira, edzino de Heraklo, estas preskaŭ komedia heroino, laŭ sia amemo, laŭ sia ŝanceliĝo, laŭ sia stulteto; sed ŝin amis tri duondiaj viroj: Akeloo, Nesso, Heraklo. Nun ŝi havas jam plenaĝajn filojn, estas maljuna, timas perdi la amon de Heraklo — kio ja efektive okazis. Pro tiu ĵaluzo, la granda heroo, kiu neniam estas hejme, okupata de la famaj laboroj por la bono de la homaro, mortas mizere venenita de donaco, kiun al li tre bonintence sendis lia edzino por reakiri lian amon. Tre probable la versoj de aliaj aŭtoroj pri intrigaĵoj aŭ pri intelektaj aŭ sociaj turpaĵoj de virinoj aŭ jam kadukiĝis aŭ iam kadukiĝos; sed la *tragika rakonto pri la kvindekjara Dejanira estas fiziologie eterna*.

4. Inter la flankaj rolantoj de la *Eneado*, Virgilio prezentas Ripeon (II, 426), "la plej justa el la trojanoj kaj fidelega observanto de la justeco". Tamen tiu ĉi justega viro mortas same grize, kiel kiu ajn alia, dum la detruado de Trojo, kaj la poeto komentas nure: *Dis aliter visum*, "la dioj opiniis alimaniere". Efektive, *kio povas scii, kio estas justa aŭ maljusta por la dioj?* Tio estas multe pli grava kaj eterna kaj profunda, ol la incendio de Trojo.

Multajn aliajn ekzemplojn oni povus facile rikolti en la vasta tutmonda literaturo, kiel la epizodo pri la amaltiro de Franĉeska kaj Paolo (*Infero*, V), aŭ pri la pacaj ŝafaroj, kiujn oni baptis armeoj por tiel pravigi atakon kontraŭ ili (*Don Kihoto*, I, 18), ktp. Sed ni devas rezigni, ĉar spaco mankas — kaj ĉar ne necese. Ni transiru nun al la dua parto de nia komento.

En la dua kvarono de la 19a jarcento, la rusa literatura analizisto Belinskij opiniis, ke vera literaturo, same kiel ĉiu vera arto, povas kreski nur el naciĉeco, el historio, evoluo kaj medio de nacio. Ĝia kulmino estas la universaleco, donaco al la tuta homaro de tio nacie propra, kio estas valora por ĉiuj. Nu, preskaŭ similan tezon prezentas S-ro A. D. F., kiam li apriore komprenigas, ke eĉ la regiona kornvala lingvo estas por li pli literaturpovebla — ĉar nacia! — ol esperanto. Sed Stellan Engholm, el kiu mi prenis la supran citaĵon el Belinskij, superis tiun ekkadukiĝantan nacian kadron, kiam — ĝuste analizante la gravon de nia ESPERANTO ANTOLOGIO (en la sveda gazeto "La Espero", jan. 1959) — li penetre konstatis:

"Niaj poetoj kaj rakontistoj ne povas nutri sian kreaĵon fantazion per nacia gloro, nek estinta nek estonta, ankaŭ ne per komunsociaj problemoj kaj

strebadoj. Kio restas kiel kreskogrundo por la krea fantazio? Kio taŭgas kiel temo por la tuta mondo? Dum jarmiloj oni klopodis kaj batalis por socioj, gvidantoj, kredoj, dioj, sociformoj, en la praktiko kaj en la literaturo. Sed en la lasta kazo temis pri homoj, temis ĉefe pri iliaj rilatoj al la diritaj kaj similaj aferoj.

"Al ni restas la homo mem, homo kun homo, la homo en la universo kaj antaŭ la sekretoj de la tuta ekzisto. Kio restas viva mondliteraturo, tio temas ĝuste pri la homo, kvankam ĝi kreskis en lokoj pli malpli ĉirkaŭbaritaj de nacieco kaj dogma kredo (kursivigo de J.R.). Ju pli la verkistoj liberigis el tiuj katenoj, des pli vivaj restis iliaj verkoj. Niaj ideoj kaj temoj sufiĉas por komuna kreskogrundo, sufiĉas por krei bildojn, kiuj parolas pli forte ol filozofia rezonado kaj instiga admono".

Al tiuj sagacaj konstatoj mi volis aldoni la suprajn klasikajn ekzemplojn, kiel montrado de eterna valideco, sendependa de ilia historia, media, nacia aŭ lingva fono. Simile, super la de A.D.F. laŭdita fono de *D-ro Jivago*, konsistigita de la historia soveta revolucio, eterne restos nur la superaj, sentempaj, esencaj homaj okazoj inter *Jivago* kaj *Lara*. Same en la *Dia Komedio* aŭ en *Don Kihoto*, trans la respektivaj teologia aŭ kavaliereca fonoj. Tiele ankaŭ en la multaj eterne vivaj pecoj — ĉar esence homaj — de nia ESPERANTA ANTOLOGIO, kiujn singulare ekzempligi restu por alia okazo kaj alia areno.

Pri aliaj konstatoj de S-ro A.D.F. mi povus simile kontesti; sed mi sentas ilin malpli medole gravaj. Do ili devas nun cedi, kaj ne laste pro la longeco, kiun mia repliko jam akiris. Resume: pro ĉio supre dirita, kaj pro la cetero en tiu diritaĵo inkluzivita, mi konsideras tiujn asertojn de S-ro A.D.F. mistrafaj. Ŝajne S-ro A. D. F. ankoraŭ ne ĝisfunde penetris la faman devizon de nia pioniro Eŭgeno Lanti, kiu senkondiĉe starigas, ke por ĝuste, kaj juste, taksu esperanton, oni devas nepre **kutimiĝi al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo.**

J. Régulo



La suprajn tekstojn legis ankaŭ s-ino Clelia Conterno Guglielminetti, konata poetino en la itala kaj en Esperanto. Ŝiaj komentoj eble aldonos ankoraŭ kelkajn prilumojn al la diskuto:

Kara Auld,

Komence mi ne komprenis. Mi legis rencenzon pri "Esperanta antologio" verkitan de unu el la poetoj, kiuj aperas en tiu Antologio. Kaj tiu poeto — kiun mi treege admiras, kies versojn mi eĉ scias parkere, ĉar ili algluiĝis mem al mia memoro — ŝajnas nei la valoron, eĉ la eblecon, de sia propra faro: de poezio en Esperanto.

Mi pensis, ke temas pri iu samnomeco, ke ne temas pri Arthur Dawson Foote: "... morton

kaj amon tra vejnaro dura...", "duburagan' — mensogonub' — sangmaroj...", "l'eterne martirantan mondprofeton...". Tamen jes, tamen vi skribe konfirmis al mi, ke estas li. Do mi ree legis liajn liniojn en "Freedom".

Kara Auld, ni estas inter esperantistoj: kreu al mi, li diras multajn veraĵojn. Finfine, kion li asertas? "Esperanto fariĝis kulto, oni povus diri: vivmaniero". Jes, ĝi fariĝis kulto: kelkaj homoj pro ĝi senraciigis. Vidu tiujn verdulojn, kiuj rondiras kun grandaj steloj, kun flagetoj, kun kravatoj kaj (se inoj) ĉapeloj kaj aliaj vestajpartoj stelumitaj (mi eĉ vetus, ke kalsonoj...). Vidu la kovertojn, kun verdaĵoj ĉie, incitaj stampoj, ferm-markoj. Vidu, kiel oni gapas antaŭ ĉiu libro, nur ĉar ĝi estas en Esperanto. Ankaŭ niajn kritikistojn tio infektis: ĉu en esperanta revuo por esperantistoj ni kuraĝas ofte diri sincere: tiu verko valoras nenion? Kaj vidu inĝenieron verkanta vortaron, masoniston verkanta gramatikon, kion ili neniam kuraĝus fari pri sia nacia lingvo. Kaj, se oni diskutas en ne-esperantista rondo pri nia lingvo, vidu kiel oni bolas, ŝaŭmas, koleras, anstataŭ serenece klarigi, ĝustigi, atentigi. Tute same kiel faras naciaj ŝovinistoj, inkluzive nian amikon Foote, kiu tiom eks-citiĝas dirante: "Esperanto neniam povos...", ĝis li forgesas eĉ, ke li mem iam povis...

Vivmaniero? Nu, jes. Eĉ lastatempe nia ĉefa revuo atentigis la esperantistojn pri iu persono, kiu per Esperanto forrabis monon de naivaj "samideanoj". Vidu la nomadajn biciklantojn, hodiaŭ en Aŭstrujo, morgaŭ en Italujo, postmorgaŭ en Francujo, gastigatajn de aliaj naivaj "samideanoj". Ĉu por ili nia movado ne estas viv-maniero? Mi eĉ dirus, ke la "viv-manieraj" esperantistoj vivas je la elspezoj de la "kultaj"...

S-ro Foote asertas, ke "Esperanto ne estas temo de vastigita aprobo". Kial ne? Ĝeneralan aprobon ĝi certe ne havas; se ne alies aprobo, almenaŭ tiu de s-ro Foote mankas al ĝi.

Tito kaj Stalin, li diras, kaj multaj aliaj, opiniis, lerninte ĝin, ke ĝi ne havas politikajn sekvojn. Efektive, ŝajnas, ke Tito tre malatentis ĝin. Li lasis ĝin disvastigi en sia lando. Lin tute ne ĝenis, ke oni tradukis eĉ lian biografion. Lia senzorgo pri Esperanto alvenis ĝis favori ĝin. "Fascina paradokso", dirus nia amiko Foote. Ankaŭ Stalin opiniis, ke ĝi ne havas politikajn sekvojn. Efektive, ŝajnas, ke Stalin tre malatentis ĝin. Li ne helpis ĝian disvastigon en sia lando. Lia senzorgo pri Esperanto alvenis ĝis bagateligi ĝin tiel, ke nia movado en Rusujo estis praktike neniigita. Alia fascina paradokso.

Esperanta antologio "signas la eliron de nova literaturo", "tiu ĉi libro estas mejloŝtono". Tute jes, mi konsentas. "La poezio (en ĝi) estas bona, iom el ĝi estas tre bona". Prave. Kaj inter la "tre bona" estas ja tiuj de Foote mem.

"Esperanton aktive parolas malpli ol 16.000", diras Foote. Tio ŝajne ne akordiĝas kun la membro-

stato de UEA, kiu indikas la duoblon de tiu cifero. Tamen, la afero estas nur ŝajna kontraŭdiro, kaj tio ne signifas, ke malŝparemaj homoj ĵetas monon por lingvo, kiun ili ne konas. Atentu: Foote ne diras "konas", li diras "parolas". Efektive, mi konas multajn eĉ lertajn esperantistojn, kiuj korespondas, verkas, sed en grupkunsidoj aŭ en kongresoj korokodilas nacilingve. Ili ne parolas Esperanton: do Foote pravas. Aliaj ne finlernis, ĝisrevidas kaj kielvifartas, kaj glutas akuzativojn. Ili ne parolas Esperante: ili parolas esperante.... ke oni tamen komprenos ilin. Jen denove Foote pravas.

Ni estas "kliko"? Jes. Gardu nin Dio kontraŭ la tago, kiam Esperanto fariĝos la dua lingvo por ĉiuj. Ĉiuj estos ĝin lernintaj en lernejoj, ĉiuj parolos ĝin. Se vi iros eksterlanden, vi surstrate turnos vin al la unua preterpasanto, kaj li respondos al vi senĝene. — Kien iros, ve, la komforta helpemo de niaj delegitoj? Kiel mi povos skribi al Varsovio, ke oni kopiu por mi manuskripton el la Radzivi-biblioteko, aŭ al Zuriĥo, ke oni serĉu por mi maloftan kuracilon? Feliĉe, ni ankoraŭ estas "kliko".

"Esperanto.... malhavas la specifan trafecon necesan por granda arto" — kio pli vera ol tio? Granda arto bezonas nenian specifan trafecon; Esperanto ne havas ĝin; do.... Granda arto bezonas nenian trafecon, ĉar ĝi bezonas unuavice grandan artiston. Se tiu ĉi materialo mankas, estu poezioj verkataj en ĉina aŭ en angla aŭ en tomboktua lingvo, ni certu, ke specifa aŭ ĝenerala aŭ ia ajn trafeco tute ne utilos.

"Ĉiuj devos paroli Esperanton, kiel ili nun parolas sian propran lingvon". Jes, tiel! kiel ili parolas sian propran lingvon? Per buŝo, gorĝo kaj lango. Ankaŭ Esperanton ĉiuj parolas tiamaniere. Tio estas ja "la nuna lingva kutimo de la homoj", kaj ĝi estas "ne home neebla". Do, el la du kornoj de la Foote-a dilemo, unu estas normalaĵo; la alia, ke Esperanto "devus resti flankafero.... simila al tiu de la latina en la katolika liturgio", estas veraĵo. La latina, efektive, estas la universala lingvo de tiu liturgio; ankaŭ Esperanto estas la universala

lingvo por iaj klanoj: ekzemple, por ĝiaj poetoj. Aŭ abelbredistoj. Aŭ bahaanoj. Aŭ homo-anoj, kial ne? Kun tiu interstela migrado kiun la estonto promesas, jen nia surtera homaro fariĝos klando, kliko. Kun la nunaj konceptoj de universo, diri ke Esperanto estas lingvo suba, aŭ supra, aŭ flankala al aliaj lingvoj estas egale (ĉu aŭstraliano estas suba aŭ supra al ni eŭropanoj?). Do, denove Foote pravas.


"Farinte literaturan lingvon" la esperantaj poetoj "turnis la dorson al la bezonoj de la homaro" — tute jes. Pli ĝuste ol tiel....! Latina proverbo diras: "Carmina non dant panem", la versoj ne donas la ĉiutagan panon. Eĉ ne la esperantaj versoj. Do, jen pruviĝas, ke al la homaj necesoj — manĝi, sin vesti, loĝi, ktp. — por kiuj oni kutime bezonas monon, niaj poetoj, kiel ĉiuj naciaj poetoj, turnis la dorson. Brave, Foote! Vi diris la plej ĝustan ĝustajon!

"Oni ne povas verki por la homaro, simple uzante neŭtralan perilon". Centoj da fuŝversaĵoj simple faritaj per tiu perilo kuŝas sur bedaŭrindaj eksblankaj paĝoj. Oni povas verki por la homaro, diri universalajn, longedaŭrajn vortojn, nur se oni estas artisto, poeto vera. La perilo ne kondiĉas la rezulton. Ni esperantistoj ne kredu, ke io estas bela nur ĉar ĝi estas verda. Sanktaj vortoj. Ni trezorigu ilin!


Do, vi vidas, kara Auld, kiom da veraĵoj diris nia amiko Foote. Kaj vi ne forgesu, ke, se li estus trankvile, logike, ekvilibre laŭdinta la rolon de Esperanto, la paĝoj kiujn "Freedom" estus doninta al "tiu lingvaĉo" estus estintaj nur du, kaj ne la trioblo kiun ĝi allasis publikigante vian respondon kaj tiun de J. Régulo Pérez. Pro tio, se eĉ mi ne estus por la cetero, mi estas tre danko al la asertoj de Foote kaj admiras lin ĉar en lingvo kiun li juĝis "ne havanta la specifan trafecon ktp ktp", li tamen verkis tiel belajn versojn, kaj ĉar li havis la kuraĝon nei literaturan valoron al poetoj inter kiuj li mem akceptis esti!

Kun mia plej granda estimo,

Clelia Conterno



✕



*Péter Illéssy : Praazio
(la naskiĝlando de la homaro)*

Kara Sinjoro Redaktoro !

Mi tre dankas vian ŝatatan leteron, en kiu vi petis de mi artikolon pri la hungara belarto.

La alvoko, por konatigi la nuntempan hungaran belarton, estas tre honoriga, sed mi timas, ke Vi eble trotaksas mian kapablon.

Vi eble konjektas, ke verkisto devas koni la situacion de la belarto, finfine la literatura kreado estas same arto.

En tio Vi tute pravas. Mi konas iome la belartajn rilatojn. Sed ĉu mi povus esti la senpartia ĉiĉerono de la belartoj? Vi bone scias, kiom diversaj estas la verkoj en la sama artospeco. Unu artisto ne komprenas, eĉ eble malestimas la alian, ĉar ili havas diversajn spiritojn. Kiel do mi nun paradu en la masko de senpartia kompetentulo?

Mi tamen ne volas preterlasi vian honorigan alvokon, do mi ekprovas solvi la problemon tiel, ke antaŭ ĉio mi sincere konfesas, ke mi same havas miajn proprajn ĉevaletojn en artaj vidpunktoj, kiel ĉiu aliulo, kiu ne konfesas sincere.


Nome, en ĉiaspecaj artoj mi preferas la verkojn, kiuj intencas ne nur emociigi, movi la sentimontojn, sed kiuj prilaboris iaspecan penson en artaj formoj.

La homoj estas divideblaj laŭ siaj psikoj ĝenerale al du grupoj: al la sentimenta kaj al la racia grupoj. Memkompreneble ĉiu homo havas en sia naturo el ambaŭ komponentoj kaj la menciita grupigo signifas nur la plipezon de unu el la no-

ARTO DE LA PENSO

mitaj psikaj elementoj.

Artistoj, per si mem, devas aparteni al la sentimenta grupo, ĉar ili intencas krei la belon, do tuŝi la sentimontojn. Artisto devas travivi per sentimenteria animo la temon, prilaboratan al verso, romano, pentraĵo, aŭ skulptaĵo. La pentrartisto serĉas la sentimentan esencon de la fenomenoj, anstataŭ fotografi la materian mondon. En la arto



Béla Kovács

Dogmoj

dominas la sentimentoj.

Sed, — kiel mi jam menciis, — ankaŭ mi havas mian propran ĉevaletan. Ankaŭ mi serĉas en la arto la belon, sed min ne povas tute kontentigi la sentimenta belo. Mi serĉas en la artaĵo ankaŭ iaspecan penson, eĉ pli : laŭeble novan penson, pri kiu ni povas cerbumadi, ĉu la ideoj de la artisto estas ĝustaj, aŭ ne.

Laŭ mia konjekto mi facile povus fariĝi bone enspezanta verkisto, se mi kreus romanon, kies simpatia heroo post longa kaj sufera luktado edziginas la simpatian heroinon. Sed mi neniam povis skribi tricent paĝojn pri tiaspecaj problemoj, ĉu Kazimiro povas pardoni al Ludmilla, aŭ ne. Mi verkis nur, se mi havis iaspecan penson, eĉ pli : novan penson.

Tiu ĉi ideo-verkado akiras kelkajn entuziasmajn adeptojn kaj tre multajn dentgrincantajn malamikojn (se la pensoj estas novaj), sed nun mi intencas paroli nur pri tio, ke mi ŝatas la saman tendencon ankaŭ ĉe aliaj artoj, kaj — kvankam mi tute ne malestimas la abstraktan lirikon, — tamen mi preferas la pensartaĵojn, do, inter la pentraĵoj anstataŭ la "aŭtuna pejzaĝo" kaj "knabino kun kruĉo" min interesas artaĵoj, kiuj entenas iaspecan penson.

Nu, tio estas mia ĉevaleta kaj nun bonvolu permesi al mi, ke mi prezentu kelkajn bildojn pri tiaspecaj verkoj de hungaraj belartistoj : du- kaj tridimensiajn "programmuzikojn".

Ĉion plian detalan rakontas la bildoj mem : la fantazie etendiĝantaj rokaj brakoj de "La imago" kaj la tamburante spitantaj dorno-serioj de la "Marseillaise" same ekkaptas nian menson, kiel la forŝvebantaj kapricaj strioj kaj fonaj nebulmakuloj de la "Kosma spaco". En la bildo "Praazio" ni travivas la gloran naskiĝon de la




András Nóti Tombmonumento de martira poeto

homa raso. (Rimarkinde Péter Illéssy estas esperantisto).


Sed tute superflue estas ĉiĉeronadi la bildojn, kies propra lingvo estas multe pli komunik-pova, ol miaj balbutantaj vortoj.

Sándor Szathmári



Gyula Hincz

Kosma spaco



Béla Kovács

Fiksa ideo

Vasil Conev

KONFERANSEO

Kiam mi estis en la dua lerneja klaso ni prezentis teatraĵon kaj en ĝi mi partoprenis en rolo de popo. Ĉe ĉiu mia apero la publiko krevis pro rido kaj aplaŭdis vigle, malgraŭ ke la teatraĵo estis tragika — iu reĝfilino estas ŝtelita de ciganoj, ŝi suferas kaj mortas kiel almozulino malproksime de sia hejmo. Mi supozas, ke pri la rido kulpis mia barbo, ĉar ĉiuj komprenis, ke la barbo estas farita el kapra vosto.

Ĉe ĉiu provo diri ion mia barbo turniĝis supren, fermadis mian buŝon, tiklis mian nazon kaj mi tuj ternis. Sed plej grandan sukceson mi atingis en la fino de la teatraĵo kiam la reĝfilino mortis. Mi devis levi miajn manojn kiel eble plej rapide kaj voki Dion preni ŝian animon, kaj mi faris tion tiel energie ke mia popa mantelo ŝiriĝis (mi estis ĝin surtretinta per miaj piedoj antaŭ ol levi la manojn kaj la barbo malkroĉiĝis kaj mole falis sur la plankon. Mi kredas, ke eĉ Kin ne atingis tian sukceson — la salono apenaŭ ne detruigiĝis pro aplaŭdado kaj rido.

De tiam mi ekvivis kun la penso, ke mi estas naskita artisto. Kun paso de la tempo mi pliaĝiĝis kaj fariĝis helpadministranto, sed tiu penso pri mia destino ne lasis min eĉ dum minuto.

Kaj jen, hazarde, antaŭ ne longe, oni sciigis, ke la urba konsilantaro aranĝas grandan vesperamuzon en la salonoj de la novkonstruita modela restoracio.



Ĉio estis en ordo, sed en la lasta momento, sabate tagmeze, oni eksciis, ke forestos la konferanseo; la antaŭvidita persono ebriiĝis vendrede kaj mala-peris. Sabate li sendis el urbo Sliven luksan telegramon: "Mi estas bone, kiel vi fartas". La situacio minacis fariĝi danĝera, se mi ne enmiksiĝus. Tuj mi iris al la ĉefa urba respondeculo, kiu prizorgas la amuzon kaj deklaris al li, ke mi estas preta konferansei, des pli ke mi havas sperton en tiaj aferoj, ja mi ludis en la lernejo la rolon de popo kaj tiel plu. Dum momento al mi ŝajnis, ke mi vidas ĝojan brilon en la okuloj de la respondeculo, sed poste li svingis per mano kaj diris:

— Mi petas vin kamardo Conev, klopodu, ke ĉio estu iom pli... ja vi komprenas, ni ne devas nin kompromiti kaj krome la nomo de nia urba konsilantaro... ĉu vi komprenas?....

— Estu trankvila, kamarado, lasu tion al mi. Ni ja ludis en la pasinto, mi havas sufiĉan sperton, ne maltrankviliĝu!

Sed Dio scias pro kio, la respondeculo daŭris rigardi min kun certa dubo kaj malgaje balancis la kapon.

Eh, Dio mia — ĝemis li kaj al mi ŝajnis, ke li pentas pro la fakto, ke li entreprenis tiun respondecan kaj riskan aranĝon.

Sed jen la vespero venis. Mi renkontadis la gastojn ĉe la pordo, manpremis neglekte kun ĉiuj gravaj personoj de la urbo kaj kiam ili demandis min: "He, kiel estas, ha? Ĉu ni amuzos nin?", mi svingis per mano dirante: "Mi petas — ĉu ne mi estas la konferanseo?" kaj similaj spritaĵoj. Poste mi ekvadis inter la tabloj kaj la gastoj konkuris regali min kaj demandi pri detaloj de la programo. Al ĉiuj mi respondadis sub sekreto, ke mi aranĝis ĉion kaj estos grandaj surprizoj kaj multe da rido. Neatendite tamen la respondeculo kaptis kaj eltiris min de ĉe unu tablo, kie mi klarigas la signifon kaj la rolon de la konferanseo kaj kriis al mi:

— Kion vi faras? Jam estas la 22a horo kaj la programo ankoraŭ ne komenciĝis!?

— Kia programo? — ekmiris mi.

— Kiel kia?! — ekĝemis la respondeculo. Ja vi devas malfermi la amuzvesperon kaj prezenti la aktorojn kaj ties numerojn. La ĉeestantoj jam protestas.

— Ha, estos ankaŭ numeroj — ekĝojis mi. Tre bone, saĝe elpensite.

Mi etendis mian manon por gratuli lin, sed li forpuŝis ĝin kaj montris al mi la scenejon. Meze de tondro de aplaŭdoj mi riverencis kaj sciigis per la movebla mikrofono, kiun oni enmanigis al mi, ke nia programo komenciĝas. Poste mi eksidis sur unu seĝo kaj diris al la sidanta personoj ĉe la najbara tablo, ke certe la programo estos tre interesa kaj mi komencis kanteti la kanton "Dornoj, knabino, dornoj". En la sama momento la tuta salono ekkrevis pro rido. Mi turnis min malantaŭen kaj demandis pro kio oni ridas, sed la rido plifortiĝis. Tiam la respondeculo kriis en miaj oreloj: "Forĵetu tiun mikrofonon, sentaŭgulo!" Nun tiam mi vidis, ke mi tenas ankoraŭ la mikrofonon kaj la publiko aŭdas tion, kion mi parolas. Mi tamen devas diri, ke ankaŭ la respondeculo sin kompromitis, ĉar ĉiuj aŭdis kiel li min insultis.

Ankaŭ post tio mi ne perdis mian trankvilon kaj sciigis, ke sekvos la unua punkto de la programo. En tiu momento antaŭ mi staris unu el la flutistoj de la orkestro kaj al mia kapo tuj venis la penso profiti la okazon kaj prezenti lin kiel plenumanton de ludado per fluto.

— Kamarado Petrov (mi ne sciis ĉu li nomiĝas Petrov aŭ alie, sed tio ne gravas en la momento) ludos ion per fluto — anoncis mi. La flutisto retiriĝis kaj ekrigardis min ektimigite, sed mi mallaŭte kriis al li, ke ni pagas al la orkestrantoj ne por rigardi la plafonon, sed por ludi. Aŭdante mian koleran voĉon la flutisto konsciiĝis kaj tuj ekblovis sian instrumenton. En tiu momento alvenis, profunde spirante alia prizorganto por la amuzo, kaj sciigis al mi, ke en la suba salono la iluziisto Ĉarli atendas min. Mi ordonis al la flutisto, ke li ludu ĝis kiam mi revenos kaj rapide iris al la suba salono. Sed intertempe la iluziisto estis perdinta paciencon kaj mem ekiris serĉi min. Tial estis necese, ke mi trovu eliron el tiu situacio. La publiko ja estis okupinta la lokojn kaj streĉe atendis. Konsiderante rapide kion fari, mi sciigis, ke ankaŭ mi scipovas artifaĵojn kaj mi prenis la kravaton de la kolo de unu sinjoro, prenis ankaŭ unu tre grandan restoracian teleron kaj k-r-a-ŝ! — frapis la teleron je la plankon kaj la kravaton disŝiris je pecoj. La publiko komencis furioze aplaŭdi, nur la direktoro de la restoracio kaj la sinjoro restinta sen kravato ekrigardis min scivoleme — evidente ili atendis, ke mi tuj rekreos antaŭ ĉies okuloj la teleron kaj la kravaton. Sed ilin mi trankviligis:

— Civitanoj, diris mi — vi certe atendas, ke mi restarigos tion, kion mi rompis kaj ŝiris. Vere iuj iluziistoj faras tion, sed mi ne. Mi iras laŭ propra vojo.

La publiko denove ekridis kontenta, ĉar tio vere estis tre ridinda, nur la direktoro protestis laŭte kaj ekiris serĉi la ĉefan respondeculon, kaj la posedanto de la kravato sin ĵetis kontraŭ min por bati min. Mi tamen lerte manovris kaj sukcesis eviti la frapon. En tiu momento alvenis la vera



iluziisto kaj li flustris en mian orelon, ke li, se ne estus la publiko, deŝirus mian kapon, ĉar li kuris tra ĉiuj salonoj serĉante min. Mi tamen ne konfuziĝis pro tiuj minacoj kaj alproksimiĝante al la rekvizito de la iluziisto komencis malfermi skatolojn, korbojn kaj sakojn. Sed subite mi ekkriis, ĉar iu besteto mordis min kaj mi retiriĝante malantaŭen, falis en korbon, el kiu eliris 10 kolomboj, 17 blankaj musoj, 3 kolubroj, ĉirkaŭ 10 akvaj serpentoj kaj multaj aliaj etaj kaj nedanĝeraj bestetoj, kiuj tuj ekrapis inter la gastoj. La lastaj, mi ne scias pro kio, levis grandan bruon; iuj surtabliĝis kaj fariĝis tia tumulto, kvazaŭ okazis io eksterordinara. Al mi mem ĉio ŝajnis tre gaja kaj mi ridis elkore ĝis mi vidis, ke venas la ĉefa respondeculo, kiu havis teruran esprimon sur sia vizaĝo. Li ordonis al mi, ke mi tuj iru supren kaj liberigu la kompatindan flutiston. Mi plenumis tiun ordonon kaj alveninte en la supra salono mi kun miro konstatis, ke la tuta publiko sidas kiel rigida kaj la flutisto daŭrigas blovadi en la fluto kun lastaj fortoj. Vidante min, li apenaŭ povis prononci: "Ah, jen vi finfine", kaj svenante falis en la manojn

de la ceteraj orkestrantoj, kiuj lin elportis.

Por serenigi la atmosferon mi komencis rakonti ian anekdoton, sed mi ne povis fini ĝin, ĉar en la salono ŝtorme eniris la gastoj el la suba salono kaj post ili inter la tabloj ekrapis la musoj, kunikloj, serpentoj, kolubroj, ratoj k.a. bestoj de la iluziisto Ĉarli Gicov. Okazis vera paniko, en kiu, kiel mi sukcesis vidi, la respondeculo svenis en la brakoj de unu dika sinjorino, kiu en sia turno konsideris lin muso kaj ekkriis per laŭta voĉo. Sia krio infektis ĉiujn ceterajn kaj baldaŭ la tuta salono eksimilis al vivanta maro, en kiu viroj kaj virinoj interpuŝante unu la alian, renversante kaj rompante ĉion sur sia vojo, direktiĝis al la eliro.

Mi plifortigis la tumulton imitante per la mikrofono la voĉojn de diversaj sovaĝaj bestoj de jaguaro ĝis bengala tigro. Do, persone por mi, la amuzo iris tre gaje kaj plene diferencis de aliaj tiaspecaj aranĝoj.

La postan tagon, tamen, vokis min la ĉefa respondeculo kaj klarigis al mi, ke li sugestis al mia ĉefo, ke sentaŭguloj kiel mi ne devas okupi ŝtatan postenon. Poste li daŭrigis:

Vlatko Pavletić:

Banala en Amo

Laŭ la motivo de unu interparolo en tramo, esprimebla en motto:

— Kiel do, kiel amo, kiel LO?
— Amo? Lo? Ho, ĉiam nur kinejo,
aŭ amuzo kaj promeno, kaj ree
hejmen kaj denove....

Li decidis malaperi
forigi ŝin el korpleno
kaj adiaŭi ĝis nereveno
malaperi sen promeso, kaj pentemo
foriri tedsata de mensog' abomeno
kunligoj de mensogoj, daŭrigoj
en parkdirekton ĉe stratofino.

Estas tie Parko

kvieto

libero

kaj fontano.

Libera ne venadi
ne teatradi, ne ripetadi
libera promeni kun bela najbarin'
sen jaluzscenoj post tio,
libera nenien iri
kaj ankaŭ ĉien
kun ĉiu kaj al ĉiu
pro dezir' aŭ hazardo
libera ne emfazi: mi amas

— Krome, "kara amiko", je via konto ni kalkulis ĉiujn elspezojn por la amuzvespero, inkluzive la rompitaĵojn kaj difektitaĵojn je sumo 15,624 levoj. Kaj nun — konkludis li — for de ĉi tie, ĉar se mi vidus vin ĉi tie refoje, mi sufokos vin per miaj propraj manoj.

Dirante tion li ekĝemis "Oh" kaj kaptis sin je la okulo, kiu estis tute bluiĝinta — kredeble, la dika sinjorino frapis lin je tiu loko, opiniante lin muso.

Sed, "se".... Mi mem intencis forlasi tiun filiŝtran urbon kaj translokiĝi en la ĉefurbo, por tie plene dediĉi min al la arto.

Kaj se la vizitantoj de la amuzvespero ne komprenis, ke mi estas la plej originala kaj kuraĝa konferanseo, ja vi karaj legantoj, plene komprenis tion. Mi petas vin, kunhelpu, ke mi estu oficiigita kiel ŝtata konferanseo en Sofia. Skribu al adreso: Vasil Conev, Sofia, Str. 6 septembro N 49.

Tradukis el bulgara lingvo:

Metodi Panĉev

ankaŭ: ne amas
libera....
Sed li atingis jam finon de kaŝtanaleo
kaj Lo apud kiosko.
"Ĉu vi malvidas min?"
Si ridetis.
"Ĉiam aliajn Vi observas" diris Lo
"sed promesu, ĉi vespere
promesu: forgesi mute
ĉion tristan tute
ĉion malkvietigan, ĉi vesper'...."
Sia voĉ' atendis ion

Li-diris sed nenion.

Nenion Lo.

Foriris
ili en dancejon, promeni, aŭ kinejon
kaj ree hejmen
kaj denove.....

Tradukis Emilija Lapenna



La poeto eksidis komforte al la tablo de la kafejo. Li tiris al si la tason, enĵetis peceton da sukero kaj poste li komencis plori. Li ploris, laŭregule, egalmezure, kontinue. Li larmis unue el sia dekstra okulo, poste el la maldekstra kaj la tason li tenis lerte sub ili. Kiam la taso pleniĝis, li viŝis la okulojn per la buŝtuko, kirlis la tason per la kulero kaj malrapide komencis trinketi.

Ĉe la apuda tablo sidis tre altstatura sinjoro kaj atente rigardis lin. Subite la sinjoro ekstaris kaj alpaŝis la tablon de la poeto.

— Mi estas John Devil — li diris mallonge.

— Ĉu la diablo mem? — demandis la poeto sci-voleme.

— Miaj familiaj rilatoj ne koncernas la temon. — rimarkis la altega sinjoro malvarme. — Cetere mi estas komercisto kaj mi vojaĝas pro negocaj

Frigyes Karinthy estis la plej konata hungara satiristo (1888-1938). Lin karakterizas profunda pensado, preciza analizo de la socio, akra ekvido de la malbonaĵoj kaj amara humoro. Lia epiteto estis: "La ridanta saĝulo". Li estis esperantisto.

LA POETO

De: *Frigyes Karinthy*

El la hungara trad.: *Sándor Szathmári*

aferoj Budapeste. Kion vi faras ĉi tie?

— Vi povas vidi. Mi posttagmezmanĝas. Aŭ eble mi povus diri, ke mi tagmezmanĝas.

— Kaj ĉu tiu varo estas tute originala?

La poeto ekskuis la ŝultron. Mister Devil levis la tason al sia nazo kaj ekflaris la enhavon. Li entrempis sian fingron kaj gustumis ĝin. Kapjesis kaj rigardĵetis al sia horloĝo.

— Post duonhoro mi vojaĝos al Manĉestro. Mi ne ŝatas la longajn pritraktadojn, do mi faras al vi mian oferton tute mallonge. Vi liveros al mi du-tri litrojn el tiu fluidaĵo kontraŭ sescent dolaroj po litro. La monon ĉiumonate antaŭpagos al via ĉek-konto la banksekcio de mia fabriko en Manĉestro. La unuan pagon vi ricevos sekvontmonate. Vian liveron mi atendas je la dekkvina de la sekvonta monato. Adiaŭ!

John Devil malaperis kaj la poeto ekfrotis siajn okulojn.

— Stultaĵo — li diris nerveze.

Sed je la unua tago de la monato li ricevis precize la diritan sumon. Dum lia komenca ekstazo li estis ravita pro la ĝojo. Li aĉetis surtuton kaj tolaĵon, luis al si ĉarman hejmon, aĉetis hejtkarbon kaj li komencis vivi.

Post unu semajno lin komencis turmenti la konscienciproĉo. Jam estas urĝe liveri ion al la eminenta John Devil, ĉar la limtempo proksimiĝas.

Do, ĉivespere li hejmeniris pli frue el la klubo, al kiu li aliĝis. Li hejtvarmigis la ĉambron, vespermanĝis sate kaj survestis sian pijamon. Poste li alsidis la skribotablon, metis antaŭ si delikatan kaftaseton, enĵetis sukerpeceton kaj suprenrigardis al la plafono, decidante, ke li nun eklaboros.

Li atendis la larmojn, sed dum kvin minutoj venis nenio. Maltrankvile li ekpremendis siajn okulojn.

— Nu, kio do? — li diris embarase.

Sed eĉ nun venis nenio.

— Ek! Nur ek! — diris la poeto nerveze kaj senpacience. — Kio do?

Li kurbigis malsupren siajn lipojn kaj komencis laŭte plendadi.

— Ho, mi kompatinda, malfeliĉa, senpatra, senpatrina, forlasita, mizera vermo — diris la poeto ĉiam pli laŭte. — Ho, mi senhava almozulo! . . .

Vane . . . Nenio elfluis. La poeton kaptis la teruro. Tiel li ja ne povas plenumi la liverdevon al John Devil kaj la abunda vivo finiĝos. Sovage kaj senesperige li ekpremadis kaj masaĝis la okulojn, desupre al malsupre kaj ĝemadis.

— Tiel ĝi ne funkcias — li diris fine. Mi ne povas trompi miajn okulojn, ĉar ili ja vidas, ke mi ne estas almozulo. Aliajn pensojn mi devas enkapigi.

Post minuta paŭzo li rekomencis.

— Ho, vi kompatinda, malfeliĉa homaro! Ho, kiom multe vi suferas! Eĉ pripensi estas terure! . . . Malfeliĉaj, malfeliĉaj miaj homfratoj . . .

Atente li observis sin, sed li eksciis per granda konsterniĝo, ke liaj okuloj fariĝas pli kaj pli sekaj: eĉ pli, liaj lipoj komencas rektiĝi, eĉ suprenkurbigi, kiel ajn li penis ilin malsuprenigi. Lia koro kunpremiĝis pro la timo, ĉar li sentis, ke lia stomako komencas ondmoviĝi.

— Kompatindaj . . . malfeliĉaj miaj homfratoj . . .

Malvarma ŝvito aperis sur lia frunto, pro la sento ke lia buŝo pli kaj pli longiĝas, baldaŭ atingos la orelojn kaj se tio daŭros ankoraŭ unu minuton, li kreviĝos pro la eksplodema ridego.

Li paliĝis. Tiel ja ĉio perdiĝos. Ĉu li perdu la abundan vivon ĝuste nun, kiam li gustumis ĝin?

Dum unu minuto li hezitis, sed subite ekbrilis liaj okuloj. Stariĝis, aliris al la kruĉo, verŝis iom da akvo en la samovaron, varmetigis ĝin kaj verŝis en la tason. Li enmiksitis kvanteton da salo kaj malmultan cindron. Zorge li kirlis ĝin, enboteligis, korkis la botelon, enpakis kaj metis sigelon sur la pakajon.

Tiun li ekspedis al la adreso de la manĉestra fabriko kaj kun tremanta koro li atendis la respondon. La liveron de tri litroj li plenumis akurate ĝis la monatfino.

Je la unua tago de la sekvonta monato la mono alvenis sen iu ajn rimarko.

La koro de la poeto malpeziĝis. Tuj li dungis sekretarion kaj ekdaŭrigis la produktadon. Post du monatoj li postulis la altigon de sia salajro, motivante ĝin per la prezaltiĝo de la bazmaterialoj. Ili faris novan kontrakton kaj la poeto vastigis la fabrikadon.

Poste li aĉetis la manĉestran fabrikon de John Devil kaj li mem liveris pogrande la varon al politikistoj kaj ŝtatestroj por iliaj manifestoj pri la paca evoluo kaj feliĉiĝo de la homaro.

Rimarko: "Devil" angla vorto. Signifas: diablo.

Du Judoj

Dum vesper' de aŭtuno en Vieno,
En la bronza lumo antaŭ milito —
Kompreneble la lasta —
Mi laŭiris dum medita promeno
Sunan aleon, post du maljunuloj judaj.
Stumbletante, ili debatis, sub zenito
Pale lazura, vasta,
Pri la reguloj kaj la saĝ' Talmudaj,
Pri komento, kaj komento pri la komento.
La piulaj bukloj, nigraj ĉapeloj,
En la lasta spiro de l'okcidento,
Flirtis; sur la vizaĝoj dancis
Foliombroj; kaj malantaŭ la korvmanteloj
Moke la longaj ombroj prancis.

Blindaj pro la brilo ebena,
Kaj pro la penso, ili paŝis
Al la forn'; la nigra inundo
Kiu fluis el la piedoj kaŝis
Jam la aleon, domojn; kaj, omena,
Ombris sur la ĉiela fundo.
Horizonte la duona disk' en atendo
Nimbis ore gigantajn siluetojn
Kiu geste debatis interpretojn
De komento, kaj komenton pri la komento.
Kiam mortis lasta lumeta strio,
Malaperis ili en la kosma nenio.

Nun, en lasta helo, memore,
Tiu judoj kun mi subire tardas;
Sed la longan ombron mi ne rigardas:
Nur la falantan sunon, miresplore.

L. N. M. Newell



Max Svabinský

Solstico

El la Estona

Ēpopeo

Kalevipoeg

(Kalevido)

Estonoj festas en ĉi tiu jaro la 100-jaran jubileon de la nacia ĉpopeo "Kalevipoeg" (Kalevido) — laŭvorte: filo de Kalev. En 1861 ĝi aperis komplete en libroformo. La kompilinto de la ĉpopeo estas Dr. Fr. R. Kreutzwald (1803-1882). La ĉpopeo estas granda verko konsistanta el 20 kantoj (300 paĝoj).

Fragmento el la 1-a kanto

Salme'n oni svarme svatis,
kvin aŭ ses vinkruĉoj varbis,
sep senditoj spionadis,
ok sekrete observadis.
Gravaj gastoj venis svati:
venis luno, venis suno,
sekvis ilin steljunulo.

Venis luno, lunjunulo,
kara palaspekta knabo,
per kvindeko da ĉevaloj,
kun sesdeko da servantoj,
volis Salme'n varbe svati,
fianĉigon kun ŝi festi.

Salme saĝe tuj komprenis,
el vestejo vigle vokis,
en vestiblo vortoj eĥis:
"Mi ne ligos min kun luno,
min ne logas nokta lumo!
Luno tri laborojn havas,
seson da klopodoj kromaj:
migras lun' dum mateniĝo,
vagas dum la vesperiĝo,
lumas eĉ dum sunleviĝo;
ofte lace nin forlasas
antaŭ ol la sun' aperas,

ofte tage vane vagas,
dum tagmezo deĵoradas.

Luno honte hejmen iris,
malgajege malaperis.

Venis suno, sunjunulo,
fajra brilokula bubo,
per kvindeko da ĉevaloj,
kun sesdeko da servantoj,
volis Salme'n varbe svati,
fianĉigon kun ŝi festi.

Salme vidis, vigle vokis:
"Mi ne ligis min kun luno,
same mi ne volas sunon!
Suno senpripensa estas,
ŝatas esti ŝanĝigema:
sorĉe suno brilegadas,
la veteron varmigadas,
sed dum fojnosekigado
ĝi pluvegon preparadas;
dum semtempo senripoza,
ĝi la teron trosekigas,
faras aĉe la avenon,
brule sur hordeon brilas,
al sableroj linon ligas,
pizojn premas al la tero,
poligonojn disportadas
lentojn plene pereigas,
dum rapida rikoltado
rose teren ĝi ruliĝas,
pluve sur la garbojn gutas."

Spiregante sun' foriris,
kaj survoje varme brulis,
ne kaŝante koleregon.

Tria venis nun varbanto,
venis sorĉa stelknabeto,
fajra fil' de Polusstelo,
per kvindeko da ĉevaloj,
kun sesdeko da servantoj,
volis Salme'n varbe svati,
fianĉigon kun ŝi festi.

Salme de l'vestejo vokis,
el la puntoĉambro petis:
"Metu en stalon stelĉevalon,
en apartan anguleton,
faru al ĝi farunaĵon,
stalo estu senriproĉa,
muroj fajle facetitaj.
Antaŭmetu freŝan fojnon,
kaj amason da aveno,
tinoplenon da trinkaĵo,
donu frandan farunaĵon,
kaj kirlitan ŝaŭmegaĵon,
sternu sub ĝin linotukon,
kovru per drapaĵo dika,
tegu per tapiŝo silka,
volvu en veluron varman,
por ke dolĉe ĝi dormadu!
Stelsvatadon mi sopiris,
amon de la stel' akceptos,
stelo mia edzo estos,

la plej bela, brilokula,
plej fidinda kaj fidela,
ĝi ne ĝenas grenĝermadon,
ne malhelpas mastrumadon.

Stelon viglan oni voku
al la tablo brile blanka,
en la ĉambron ĉarme belan,
ĝi sur sorpa benk' eksidu
ĉe masiva manĝotablo,
kiun kovras tablotuko;
portu fiŝojn al fianĉo,
viandaĵon al viglulo,
grandajn frandajn grikolbasojn,
portu panon por fianĉo
mielpladojn por junmastro,
donu kruĉojn kun biero
kaj pokalojn plaĉaromajn."

Stelon oni salutadis,
afablege akceptadis.
Kore la vidvin' invitis:
"Manĝu, stelo, trinku, stelo,
fartu, stelo, feliĉege!"

Stelo glavon sonorigis,
per la kalkanumoj klakis,
brue siajn spronojn skuis,
per feraĵo forte frapis:

"Ne manĝemas mi, patrino,
trinki tute ne deziras,
kaj ne fartas mi feliĉe,
la knabinon enkonduku,
Salme'n ĉarman enĉambrigu!"


Salme aŭdis la amaton,
la inviton tre insistan,
Salme de l'vestejo vokis,
tra la tuta korto kriis:

"Fianĉeto, stelfileto,
malproksima gasto glora,
lasis vi min longe kreski,
ne malhelpis maturiĝi, —
lasu min nun ornamadi,
edziĝvestojn elektadi!"

"Flugu, Linda lertpieda,
flugu, franjo, en la ĉambron,
kuru al trezoro-kofroj!
Donu al mi jupojn drapajn,
kaj ĉemizojn ĉielhelajn,
bluzojn ore broderitajn,
lanajn ŝtrumpojn lumkolorajn,
ĉarmaspektajn ĉirkaŭtukojn,
kvadratitajn koltuketojn!"

La vidvin' el ĉambro vokis,
el angul' la adoptinto:
"Manĝu, stelo, trinku, stelo,
fartu, stelo, feliĉege
dum longdaŭraj festotagoj!"

Stelo aŭdis, ame diris,
stelo saĝe ekparolis:
"Mi ne manĝos, mi ne trinkos,
kaj ne fartos mi feliĉe
dum longdaŭraj festotagoj,
se knabino kara mankos."



Panjo pensis, ekparolis:
"Eble vi deziras dormi
post vojaĝa veturado?"

Stelo senhezite diris,
stelo saĝe ekparolis:
"Ne deziras mi dormadi
post vojaĝa veturado;
stelokul' ne sentas lacon,
por ripoz' ne rigidiĝas,
la palpebroj ne peziĝas.
La knabinon enkonduku,
Salme'n ĉarman enĉambrigu,
kokinidon karesindan!"

Kaj envenis la knabino,
Salme sorĉa enĉambrigiis.
Panjo plu ŝin ne rekonis,
la vidvino mute miris,
ĉar ŝin estis ĉarmiginta
kaŝe la fein' fabela,
feinetoj facilmovaj.
Panjo dube ekdemandis:
"Ĉu vi luno, ĉu vi suno,
ĉu vi vesperruĝo estas?"

Kunvokiĝis konatuloj
por edziĝfestenon festi,
por ĝojfeston ĝuegadi.

Kruco-dancon oni dancis,
Viru*)-dancon oni valsis,
sur la gruzo galopadis,
tersurfacon turmentadis.

Steljunul' kaj Salme juna
geedziĝon gaje festis.

El la estona: **Hilda Dresen**

*) Viru: distrikto en Estonio.

Kalevala

la trezoro de finna popolo

Kiam Finnlando en 1809, post la sveda-rusa milito, ligiĝis al la rusa imperio, kaj la imperiestro Aleksandro I, kunvokinte la reprezentantojn de la voĉdonrajtaj klasoj de la popolo, solene deklaris la aŭtonomion de la lando kaj eldiris, ke per tio la finna popolo estas levita inter la naciojn de Eŭropo, la tuta deklaro estis pli-malpli teoria: La klerularo de la lando parolis fremdan lingvon (svedan aŭ germanan), finna lingvo estis uzata nur de kamparanoj, ĝi estis uzata nur en religiaj verkoj, kiujn tamen konsiderinda parto de la popolo kapablis legi. Sed pri finna kulturo oni ne sciis paroli.

Tamen, post dudek jaroj komenciĝis granda ŝanĝo, kiu dum la sekvintaj dudek jaroj faris profundan spiritan revolucion. Fakte, ĝi estis laboro de unu sola homo, filo de vilaĝa tajloro el suda Finnlando. Lia nomo estis Elias Lönnrot, kaj li naskiĝis en 1802. En 1828 la Akademio de Turku estis fermita pro okazinta granda incendio, kiu ruinigis la tutan urbon. Pro tio la juna studento decidis ekskursi por kolekti popolajn poemojn. La ekskurso etendiĝis tra la centra Finnlando, kun malmultaj rezultoj, al la orienta kaj trans la limon, al la ortodoksa Karelio, kiu dum jarcentoj restis sub rusa regado, sed konservis sian lingvon, dialekton de la finna, kaj la abundajn kantojn de la prapatroj — nur en memoro, ĉar ili estis ĉiuj analfabetoj. Sed montriĝis, ke tiu poezio memore konservita estis de neimagita arta valoro. Estis epikaj kantoj, liriko, sorĉformuloj en senkompara estetika formo, proverboj saĝaj kaj enigmoj sagacaj. Lönnrot ekkomprenis, ke la epikaj kantoj, en kiuj rolas ĉiam la samaj herooj estas kunigeblaj en grandan epopeon — tiel naskiĝis Kalevala, en unua eldono 1835, kaj poste plivastigita en sia definitiva formo en 1849 (50 kantoj, preskaŭ 23 mil versoj). La kolekto de lirikaĵoj, Kanteletar, aperis en 1840, kaj kelkajn jarojn poste kolekto de Proverboj (7077 ekz.) kaj de Enigmoj (1814 ekz.). Estas neeble per kelkaj vortoj prezenti la efikon de ĉi tiuj verkoj al la tuta spirita vivo en Finnlando. Ni kontentiĝas je la noto, ke naskiĝis folklora scienco, kiu kolektis abundan amason da popolaj kantoj, verkitaĵoj de popolanoj per la metriko de Kalevala, poste eldonitaj en 33 dikaj volumoj, 25.000 paĝoj, ĉ. 75.000 poemvariantoj, naskiĝis finna literaturo moderna, kaj antaŭ ĉio: evoluis finna lingvo kiel

eminenta esprimilo de moderna kulturo. Kaj ankoraŭ pli: Kalevala poemaro donis impulsojn al la belarto — ni nomu nur Akseli Gallen-Kallela — kaj al muziko — kie brilas la nomo de Jean Sibelius. Mallonge: tio estis la vera naskiĝo de finna nacio.

Ni deziras doni la vorton al neŭtrala persono. Tial ni reproduktas artikolon de germana lingvisto kaj folkloristo Heinrich Winkler (1848-1930), profesoro en Breslaŭ. La artikolo ne estas nova, malgraŭ la intertempe progresinta scienco ĝi ankoraŭ principe valoras.

Heinrich Winkler:

KALEVALA

Dum 30 jaroj mi konis Kalevalan aŭ almenaŭ partojn de ĝi, kaj dum 40 jaroj la germanan epopeon Nibelungenlied. En la laste nomita estas multaj epizodoj, kiuj nepre plaĉas al ĉiu pensanta kaj sentanta homo; tiaj estas precipe la lokoj, kiuj agordas melodiojn, kiuj trovas resonon en ĉiu brusto. Kaj tamen, se oni konsideras la tutajn, la scenoj de Kalevala estas humane pli proksimaj al mi. En Nibelungenlied ni trovas pli da batalo kaj kampanjo, nobela vivo, malamo kaj intrigoj, se apude ankaŭ grandiozajn trajtojn. En Kalevala respeguliĝas populara sentagordo, la nepripensita kaj tial pli verema interna vivo en sia sana instinkteco, en profundaj sentoj kaj natura realo. Kaj apude elmontriĝas neskuebla fido je la saniga, puriga, ĉiopova potenco de vorto, fontanta en profundoj de la animo, je la forto de kanto, kiu vekas en homa brusto la dormantajn sopirojn kaj altigas la homon super la profana tero kaj liberigas en li neantaŭviditajn kapablojn.

La impreson neniel malfortigas tio, ke la tutaĵo ne estas esence unueca. Ĉiu sceno vivas per si mem; estas egale, ĉu ekzemple ĉiuj trajtoj, esencaj al la bardo Väjnämöjnen en iu kohera parto de la epopeo, ankaŭ adaptiĝas al la trajtoj en alia parto.

Egale estas ankaŭ, ĉu la personoj estas diaj estaĵoj aŭ pure homaj, eĉ kun aludo al historiaj okazaĵoj. Verŝajne valoras ĉi tie kiel ĉe aliaj popolaj epopeoj: La malnovaj dioj sin vestas en homa formo, ie kaj tie enmiksiĝas historia reeĥo, kaj tamen regas nur la vere humana aspekto, kiu per

sia eterna natura freŝeco, trapenetranta nian animon, forgesigas ĉion nerealan, strangan kaj troigan.

Se ni apartigas kaj formetas ĉion neesencan, ni trovas ĉie verajn homojn el karno kaj sango, je kies anima vivo ni konsentas. Kaj klare desegnitaj, individuaj estas la karakteroj, kies personecoj nin altiras. Ni pensu nur pri tiuj tri: Väjnämöjnen, Ilmarinen kaj Lemminkäjnen. Väjnämöjnen estas hardita, uraganojn spertinta maljunulo, malgrava, eĉ mokita; lia vivo estas plena de peno kaj manko, ĝi nenion donacas al li mem, sed li sufokas la ardon de sia profundesentanta koro, ja iras sian vojon neskuita; kaj lia agado alportas benon kaj feliĉon al la aliaj. Potenca estas lia vorto, atingita per severa laboro; lia kanto, esprimanta la sentojn de lia koro, sorĉas la homojn kaj bestojn, eĉ la nevivan naturon. Ankaŭ li ne estas anĝelo — sed anĝeloj ja estas maloftaj sur la tero — ankaŭ li montras neglatajn, krude homajn trajtojn, sed ĝuste tial li estas malfalsa, kun homaj meritoj kaj mankoj. Ilmarinen estas forta, diligenta forĝisto, kiu per harda laboro kaj multaj kontraŭaj spertoj venkas neskueble fidela la virinon, kiun li amas kaj modestan vivfeliĉon. Sian pardonon nenio povas kompensi; vane li penas, kare memorante la montintinon, serĉi novan feliĉon similan. La vivo lin premis kurba, sed ne rompita lin; li ankaŭ daŭrigas la vivon servante la komunan bonon. Kaj Lemminkäjnen, persono, kian oni apenaŭ atendus trovi en la malvarmeta Finnlando, kie oni lernis sufoki la ekstravagancojn, kaj kiu tamen aperas tiel natura kiel eble. En urbeto Finnlanda mi trovis junan viron, kiu tuj impresis kiel Lemminkäjnen. Kaj tiu impresio plifortigis, ju pli li amuzis min per sia libera konduto kaj fanfaronado; li tamen estis brava viro kaj reale sentanta homo. Lemminkäjnen en Kalevala estas superplena de sana forto, vigla kaj entreprenema, eĉ aventurema, memcerta kaj malmodesta, eĉ aroganta, vanta, preskaŭ danda, objekto de mokado. Facilanima li forgesas la promeson donitan, li estas ĉiama sopirulo, malserioza, plensanga ĉasisto de virinoj kaj, kiel tiaj ofte estas, nemezureble bonsorta inter la elegantulinoj. Sed kiam li kune kun Väjnämöjnen kaj Ilmarinen entreprenis malfacilan taskon, la akiron de la feliĉiga Sampo, li montras sin malvarmsanga en la plej granda danĝero, kaj agas klarpense kaj nesubiĝebla. Kaj kiel humana li estas sopirante al la perdita hejmo kaj funebrante pri sia amanta patrino kaj la eterne perditaj tagoj de infaneco.

Tiel la unika epopeo vibrigas ĉiujn kordojn, kies sonoj trovas resonon en ĉiu homa koro. La ĝojoj kaj zorgoj de homa animo aperas antaŭ ni en formo senkompare simpla sed des pli impresa. Nur vereca, malfalsa animo povas eltrovi tiajn akordojn. Patrino, fidela en sia amo, post penoj kaj baroj fine trovas sian amatan filon en tombo — filon, kiu verdire ne meritus tian amon — elfosas la korpartojn kaj kunligas ilin, kaj lulas en vivon la mortinton, kiun ŝi tiom ofte jam lulis en dormon.

Viro ploras en fundo de forta doloro pri perdita edzino, kiun li atingis post tiom da penoj kaj malfeliĉoj. Knabino eksplodas en nekonsoleblajn lamentojn, ĉar ŝi devas lasi la patrinon, kaj foriras malĝoje — kiel knabinece! — al la hejmo de la amato. Väjnämöinen montras viran rezignacion, kvankam li ne povas atingi la efektiviĝon de sia plej rava sonĝo, konduki hejmen la amatan knabinon; li kontentiĝas je sia sorto, kaj ĉarmas la animojn de la gastoj, per sia potenca kanto, dum la feliĉa amkonkurinto festas sian nupton.


Simpla sed profunda vivkompreno aperas en mil trajtoj, vivkompreno, al kiu nenio homa estas fremda. Ĉie regas la filozofio, ke la fina celo de ĉiu saĝeco estas kontentiĝi je la sorto kaj la fruktoj, eĉ malabundaj kiujn ĝi prezentas. Sed la kontentiĝo devas okazi sen malsaneca sentimentaleco, kaj ekz. en la kantoj pri Sampo sonas la baza melodio, ke la vivo estas senvalora, se oni ne povas en paco ĝui la donojn de la tero; de tio sekvas la gigantaj klopodoj atingi Sampon, la miraklan muelilon, kiu donas al la homo la ĉiutagajn bezonaĵojn. Apude tamen vivas ĉie la penso, ke nur per nobliĝinta, pura homeco estas atingebla la plejalto, kiu levas supren la koron.

Por fini mi volas atentigi, kiel mirinde profunde Kalevala komprenas la belecon kaj noblecon de la naturo. Tio igas la kantiston aperigi mirinde potencajn melodiojn, atestojn pri forta interna vivo kaj sentema animpureco.

Estas bedaŭrinde, ke tiel malmultaj homoj ankoraŭ konas ĉi tiun unikan poemaron; ĝi apartenas al la literaturhistorio de la mondo same motivite kiel io ajn.



Ni esperantistoj devas esti dankaj al modesta finna poeto, J. E. Leppäkoski, kiu tradukis la epopeon en nian lingvon. Kaj ni devas esperi, ke ĝi baldaŭ povu eliri el presejo, por disvastiĝi en ĉiujn landojn de la tero.



Vespero en boato

Ho kiom povas daŭri
 ĉi longa sunsubiro?
 Animo mia tremas en demando.
 Adiaŭ, sun' de l' mondo
 hezite karesanta
 sur pala mar-surfaco la boaton
 perdiĝintan en ĝia senmezuro,
 la boateton blankan en lazuro:
 entenas ĝi la tutan
 amon de tri estaĵoj
 feliĉaj esti kune
 almenaŭ kiom daŭros vesperiĝo.
 Sub ĝia ruĝa kilo,
 mutas netravedebla profundaĵo,
 embuskas nokto el akvo senluma.
 Kaj ni, triopa kuno,
 senvorte ni lulataj
 en milda sorĉo de la lasta suno:
 unu el ni infanan ĝojon havas;
 dua, mordadon surdan de l'malsano;
 kaj mi torturan konscion senhelpan
 ke ankaŭ tiu ĉi longa krepusko
 baldaŭ finiĝos.

Dimanĉa Mateno


Dum mi tarde en la lito kuŝas
 la mateno ĉirkaŭ mi malkaŝas
 mian filon ludi, sunpolverojn,
 la edzinon gladi kaj la varojn,
 meblojn, aĵojn, kiuj tiom homojn
 per laboro forkonsumas. Hejmojn
 ni el pli ol teraj brikoj faras.
 Dume suna forno tiel fajras,
 ke ni ne suspektas, ke sen limo
 sub tagmezoj kuŝas la mallumo
 kiu estas ĉiam. La hor' silente
 ĉirkaŭ mi demetas, trompe lante,
 pecojn de la tagenigmo, kaj —
 scivolas mi kun trist' senlanga — kio
 estos al mi kaj al miaj karaj
 inter klingaj temporadoj kuraj,
 muelŝtonoj de la jaro? Ĉu restos
 iu daŭra kormetalo, aŭ rustos
 el la mondmemoro ĉiu faro
 kiu estis nia laco kaj fiero?

Zan-Ke-Cia

Reveno

La ruĝa sun' leviĝis de sur maro.
 La fiŝboato revenis.
 Kajut' plena de fiŝoj
 kun brilaj arĝentaj skamoj
 "Paĉjo —"
 unu knabo saltis sur la plaĝo,
 la ondson' rabis lian jubilon for.

el la ĉina trad. Armand Su



La Lojaleco

Orig. Akutagawa Ryûnosuke
Trad. Miyamoto Masao

1. Maezima Rin'emon

Itakura Syuri estis atakita de forta neŭrastenio, apenaŭ lin forlasis iom la marasmo post malsano.

Al li la ŝultroj rigidiĝis kaj la kapo doloris. Eĉ legado, kiun li kutime ŝatis, ne povis lin distri. Lia mensa koncentriĝo estis tuj rompata ĉe ĉiu sono, ĉu de paŝoj sur koridoro, ĉu de voĉoj de domanoj. Kiam tio pli kaj pli kulminiĝis, fine li falis en tian staton ke liaj nervoj estis senĉese persekutataj de ĉiu malgranda incito.

Antaŭ ĉio, se sur la makijo⁽¹⁾ de lia tabako-sortimento li trovis rampantan oran arabeskon kontraŭ la nigra fono, lin tuj obsedis ties delikataj sarmen-toj kaj folioj. Krome li fariĝis maltrankvila ankoraŭ, kiam li rigardis pintajn objektojn, ĉu eburajn haŝiojn⁽²⁾ ĉu bronzaĵajn fajrohaŝiojn. Fine, eĉ krucita ortoangulo de la tatamoj sternitaj aŭ la kvar anguloj de la plafono vokis al li nekontroleblan streĉon de la nervoj, kvazaŭ li alfrontus rigardi klingon.

Ĉiun tagon Syuri nur restis fascinita en sia ĉambro kun la vizaĝo malserena. Ĉio ŝajnis al li neeltenebla. Se mi povus, li fojfoje pensis, mi volonte fordonus la konscion pri mia ekzisto. Tamen liaj nervoj displititaj ne permesis tion. Li rigardadis ĉirkaŭ si kun iritata koro, kvazaŭ formiko falinta en embuskon de mirmeleono. Ĉie tamen nur restas heredaj vasaloj, kiuj komprenas neniom lian sentimenton, kaj vane antaŭtimas eventualan akcidenton. "Mi estas afliktata, sed neniu komprenas mian doloron". — Jam tia penso mem estis por li multobla doloro.

La malkompreno sieĝanta ŝajne pli intensigis la neŭrastenion de Syuri. Li incitiĝis ĉe ĉiu renkontita

1) Makijo : Japana teknologia verko, desegnaĵo sur vazo farita per uruŝio (azia lako).

2) Haŝio : Manĝobastoneto: Fajrohaŝio : bastoneto per kiu oni aranĝas karbon. Kvankam Gastronomia Terminaro prenas formon 'hazo', al mi ŝajnas tiu estas malkonvena.

La tradukinto deziris, por ke la japanaj nomoj estu komprenitaj de la okcidentuloj, ke ni presigu la familian nomon per majuskletoj. Tio estis teĥnike neebla, tial ni presigis la familian nomon per kursivoj kaj la antaŭnomon per romaj literoj.

afero; pli ol unu fojon li tiel eksplodis per siaj krioj ke eĉ en najbaraj domoj oni povis aŭdi tion; plurfoje li metis sian manon al glavo sur la rako. Ĉiu rigardis tiaman lin preskaŭ alia homo. Sur lia vizaĝo kutime flava kaj senkarna ĉie aperis spasmoj, kaj eĉ la koloro de la okuloj montris strangan minacon. Kaj kiam la paroksismo atingis kulminon, li ĉiam komencis disŝiri siajn harojn sur la tempioj per la tremantaj manoj. — Kaj la disŝiron de la haroj ĉiu apudservanto prenis kiel indokson de lia eksternormiĝo, kaj neniu tiam volis proksimiĝi al li avertante sin reciproke.

La freneziĝo — tia timo obsedis Syuri-n mem. Kompreneble la ĉirkaŭuloj sentis tion. Li mem kompreneble havis antipation kontraŭ la timo de la ĉirkaŭuloj. Sed kontraŭ la timo, kiun li mem havas, li povis fari nenian reziston. Kiam la paroksismo ekĉesis kaj la koro pli splena ol antaŭe lian kapon premis, li fulme konsciis ke tia timo foje lin minacas, kaj samtempe plue lin atakis eĉ sinistra maltrankvilo ke havi tian timon signifas jam avizon de la

A
k
u
t
a
g
a
w
a



R
y
û
n
o
s
u
k
e



Takiğara Giro

Sur la kampo

freneziĝo. "Kiel fari, se mi freneziĝos?" — Kiam li pensis tiel, jam ĉio mallumis antaŭ liaj okuloj.

Kompreneble, la timo, unuflanke estis senĉese forestingita de iritiĝo kaŭzita de ekstera incito; sed tiu iritiĝo mem, aliflanke, ne unu fojon vekis la timon. — Nome, la koro de Syuri senĉese turniĝadis de maltrankvilo al maltrankvilo, kvazaŭ kato pelus kapti sian voston.

La eksternormiĝo de Syuri ne malmulte afliktis la domanojn. Inter ili plej multe timis tion *Maesima* Rin'emon, lia intendanto.

Ĉar Rin'emon ne estis simpla intendanto, sed en efektiveco kiel la zorganton de Syuri lin sendis *Itakura* Sikibu, la estro de la klano, eĉ Syuri ne povis lin simple forignori. Rin'emon estis granda viro kun ruĝnigra vizaĝo kaj kun tiel fortika korpo ke li preskaŭ neniam spertis ian malsanon, kaj samtempe li estis granda majstro en ambaŭ artoj de scienco kaj milito, en kiuj nur kelkaj el la tuta samurajaro apenaŭ povis lin superi. Surbaze de tiaj rilatoj li ĝis nun ĉiam servadis per siaj admonoj al Syuri. Lia ŝercnomo "*Ookubo Hikoza*"³⁾ en la domo de *Itakura*" ĝuste venis de tia lia admonado.

De kiam la eksternormiĝo de Syuri okulvideble progresis, Rin'emon estis afliktata de la timo pro la domo de la mastro ke li eĉ en noktoj ne povis dormi. — Syuri devis viziti la kastelon de la ŝogu-

no⁴⁾ en proksima tago por danki sian resaniĝon, se li jam reakiris la sanon. Sed en tiu okazo, kiam li vizitos la kastelon kun tia eksternormiĝo, neniu jam povus garantii ke li ne agos maldece kontraŭ intimaj daimioj aŭ samvicaj gvardianoj; kaj se okazos ia sangoverŝa akcidento, la domo de *Itakura* kun la salajro de 7000 kokuoj⁵⁾ estos likvidita. Ĉu tion jam ne instruas al ni nemalproksima ekzemplo: la kverelo inter *Hotta* kaj *Inaba*?

Rin'emon ĉe tia penso tiel iritiĝis ke li povis nek sidi nek stari. Tamen laŭ lia opinio la eksternormiĝo ne estas malsano de la korpo, sed absolute de la menso. — Do li volis kuraĝe admoni la neŭrastenion de Syuri, samkiel admoni libertinan agon aŭ dro-niĝon en luksado.

Rin'emon de tiam komencis admoni plej eble al Syuri. La eksternormiĝo de la lasta tamen montris neniom da kvietiĝo. Kontraŭe, ju pli li admonis, ju pli li iritiĝis, des pli tio progresis okulvideble. Plue, en iu fojo Syuri volis lin mortigi per sia propra mano. "Fi, li aŭdacas ignori la mastron mem. Se mi ne estus ĝenata de la konsidero pri la klanestro, mi povus lin forhaki!" — En la okuloj de Syuri, kiu diris tiel, Rin'emon vidis ne nur indignon, sed ankaŭ tie ellegis klare la esprimon de la malamo neniel estingebla.

Dume Rin'emon ripetadis admonojn, kaj de iam la sentoj implikitaj inter la mastro kaj vasalo fariĝis pli kaj pli sovaĝaj; tio estas, ne nur Syuri fariĝis malamika kontraŭ Rin'emon, sed ankaŭ en la koro de la lasta de iam ekĝermis malamo kontraŭ la unua. Kompreneble li ne konciis tiun malamon; almenaŭ li kredis ke lia lojaleco ĉiam restos senŝanĝa ĝis la definitiva okazo. "Se la mastro ne agus mastre, la vasalo ne agus vasale". — Tio ĉi estas ne nur "La Vojo" de Mencio⁶⁾, sed post tiu kaŝis sin "La vojo" natura por ĉiu homo. Rin'emon ne volis tion agnoski . . .

Li volis plenumi konsekvence sian vasalecon, sed li jam havis multe da amaraj spertoj ke liaj admonoj efikis neniom. Do, li sin pretigis por la lasta rimedo kaŝita ĝis tiam profunde en lia koro. La lasta rimedo estis nenio alia ol tio, ke li al Syuri trudu la rezignon pri la domestreco kaj adoptu iun el la familio de *Itakura*.

Antaŭ ĉio, tio estas problemo de "la domo". Pre-cipe, la domo de *Itakura* estas glorplena, kiu estas heredita ĝis nun tute senmakula de post la praavo, *Itakura* Sirōzaemon Katusige⁷⁾. Oni ne bezonas kalkuli ke *Matazaemon* Sigemune⁸⁾, la dua estro, ĝuis

4) Ŝoguno: Japana regnestro en la tempo de feŭdismo, aŭ oni povas preni konforme al eŭropaj lingvoj formon 'tajkuno'.

5) Kokuo: Japano mezurunuo por grenoj. Kokuo da rizo: ĉ. 140 kg. En la feŭdisma epoko oni donis salajron per rizo, kaj la menciita sumo montris la rikoltkapablon de la donita bieno. La salajro kun 7000 kokuoj estas sufiĉe granda por gvardiano.

6) Mencio: Antikva ĉina filozofo (372-289 a. K.)

7) *Itakura* Katusige: (1545-1624)

8) *Itakura* Sigemune: (1586-1655) filo de Katusige.

3) *Ookubo* Hikoza: (1560-1639) vasalo de Tokugawa-ŝoguno, fama pro senindulga kaj rigora admonado.

reputacion kiel magistrato de Kioto, al kiu li estis investita post sia patro. Mondo Sigemasa⁹⁾, lia frato, povis kalkuli siajn meritojn de tiam kiam li havis gravan mision konfirmi la subskribojn ĉe la traktado de la armistiko en la Vintra Milito en Osaka en la 19-a de Keityô¹⁰⁾, ĝis en la akcidento de Simabaru, en la 14a de Kan'ei¹¹⁾, ĉe kiu li komandis la tutan armeon de la okcidentaj provincoj kaj flirtigis la standardon anstataŭ la Ŝoguna Majesto por konkeri Amakusa-n. Kiel mi faru, se mi lasus ofendi tian glorplenan domon? Kiel fidela vasalo mi neniel povos havi vizaĝon renkonti la praavojn tra la generacioj de *Itakura*, kiam mi iros en la tombejon.

Rin'emon, kiu pensis tiel, sekrete serĉadis taŭgan personon inter la parencoj de la mastro. Nun feliĉe li trovis: *Itakura Sadonokami*, tiam servanta kiel subministro, havas tri filojn senheredajn. Se mi prenis unu el ili kiel heredanton kaj petos permeson pri la adopto, jam estos tute certe pri la favora dispono de la ŝogunejo. Cetere ĉi tion mi devos aranĝi tute kaŝite al Syuri kaj al la sinjorino, ĉar la afero mem postulas tion. Kiam li elkovis sian planon ĝis tio, li unuafoje sentis ke li venis sub la lumon. Kaj samtempe kun tio li sentis ke ia malĝojo ne spertita ĝis tiam nature nebuligis lian sentimenton, — ĉar lian tiun decidon ke "ĉio estas por la bono de la domo", kvazaŭ aŭreolo de la luno, kovris ia peno, kiu ĉiel volis defendi ion nur nebule konceptitan de li mem.

Debila Syuri unue malamamis la fortikan korpon de Rin'emon. Due li malamamis lian latentan potencon, kiun li tenas kiel delegito de la klanestro. Fine li malamamis lian lojalecon koncentritan nur al "la domo". "Fi, li aŭdacas ignori la mastron mem". — Interne de tiuj vortoj de Syuri sin kaŝis nigra flamo de subbrulanta fajro.

Tiam neatendite la sinjorino sciigis al Syuri nesupozitan intrigon: Rin'emon intencas trudi al li rezignon kaj adopti filon de *Itakura Sadonokami*. Tio hazarde trafis ŝiajn orelojn. — Estis tute prave ke Syuri informita pri tio ekflamis kun levitaj brovoj.

Jes, Rin'emon, povas esti, plej zorgas pri la domo de *Itakura*. Sed ĉu la lojaleco devas pli konsideri la bonon de "la domo" kaj oferi la mastron mem, al kiu li ĵuris la vasalecon? Krome, la antaŭtimo de Rin'emon pri la domo povas esti nur anticipa kaj eventuale vana. Pro tiu eventuala vana antaŭtimo li volas trudi al mi la rezignon. Povas esti ke post tiaj pompaj lojalumadoj li kaŝas sian ambicion uzurpi la domon, se la afero prosperos al li. — Ĉe tia pripenso Syuri atingis konkludon: kia ajn se-

9) *Itakura Sigemasa*: (1588-1637) frato de Sigemune. En la batalo de Simabaru li falis en la ĝenerala atako.

10) La 19-a de Keityô: t. e. j. 1614.

11) La 14-a de Kan'ei: t. e. j. 1637, en kiu kampuloj kaj kristanoj en Kyûsyû ribelis kontraŭ la ŝogunejo, kaj estis subpremitaj en la sekvinta jaro.

vera puno jam estos tro malpeza por puni tian kontraŭvasalan fikonduton.

Kiam li aŭskultis de ŝi, li tuj alvokis al si maljunulon nomatan *Tanaka Uzaemon*, kiu iam servis lin kiel guvernisto, kaj ordonis al li:

"Dehaku la kapon al Rin'emon ĉirkaŭŝnurita!"¹²⁾

Uzaemon klinis sian grizan kapon. Sur lia vizaĝo, kiu aspektis tro kaduka por lia aĝo, pli multaj faltoj jam aperis pro lastatempa ĝenateco. — La intencan de Rin'emon li ankaŭ prenis neagrable. Tamen, en ĉiu okazo, la koncernato restas delegito de la klanestro.

"Mi pensas, sinjoro, tia dispono ne konvenas por la nuna situacio. Pli bone estus, se ni ordonus al li harakiron konforme al samurajo".¹³⁾

Ĉe tiu respondo Syuri kun mokaj okuloj rigardis Uzaemon-n. Kaj li skuis sian kapon du-trifoje forte.

"Ne! ni ne havas kialon por ordoni harakiron al tia malhomo. Nur dehaku la kapon al li ĉirkaŭŝnurita! Nur tian rimedon mi volas".

Tiel dirante li tamen, oni ne sciis pro kio, lasis fali larmerojn gute sur siajn palajn vangojn. Kaj — kiel kutime li komencis disŝiri siajn harojn sur la tempioj.

- 12) Dehaki kapon en ĉirkaŭŝnuriteco: La plej malhonora puno por samurajoj.
13) Harakiro: Estis konsiderita de samurajoj honora morto.



Suzuki Kenĝi

Hejtaĵo

Ke li ordonis dehaki la kapon al li ĉirkaŭsnurita, tuj iu apudservanto informis al Rin'emon, de kiu li estis konfidita.

"Bone! Se tiel, mi, Rin'emon, devas ankaŭ malcedi. Neniel mi povas ricevi tian malhonoran morton!"

Li eldiris fiere. Kaj li ekkonsciis ke en li la maltrankvilo, kiu ĝis nun lin obsedis, fordegelis kun nenia spuro, post kiam li aŭdis tian komunikon. Nun en lia koro restis nur la malamo nekaŝebla kontraŭ Syuri. Li, Syuri, jam ne povas esti por mi la mastro. Malami tian lin nenio jam malhelpas.— Lia koro fariĝis jam serena, ĉar li, kvankam senkonscie, en tiu momento konstatis tian logikon.

Tiam li evakuis el la domo de Syuri, sub plena taglumo, kun la edzino, infanoj kaj vasaloj lin sekvantaj. Konforme al la moro li agluis sur muro slipon kun nova adreso, al kiu li iros. Rin'emon mem tenis eĉ lancon ĉe sia flanko kaj ekiris la unua. Liaj sekvantoj estis apenaŭ dek personoj, eĉ se oni enkalkulis servistojn kaj sandalportistojn, kiuj jen portas armilojn jen helpas paŝojn de la malfortaj. Tamen ili en plena trankvilo kaj tute sen malordo kune eliris la pordegon.

Estis la fino de marto de la 3-a de Enkyo.⁽¹⁴⁾ Ekster la pordego varmeta vento blovadis sakur-petalojn⁽¹⁵⁾ kaj polvon al la kraditaj fenestroj. Rin'emon ekhaltis en tiu ventado kaj denove esploris la dekstron kaj maldekstron de la vojo, kaj poste li signis per la lanco ke ĉiu iru maldekstren.

2. Tanaka Uzaemon

Post kiam Rin'emon forlasis la domon, anstataŭ li Tanaka Uzaemon ekservis kiel intendanto. Ĉar li iam estis guvernisto de Syuri, liaj okuloj rigardis lin tute diference de aliaj vasaloj. Li kun patra koro karesis la eksternormiĝon de Syuri. Ŝajne ĉi tiu ankaŭ kondukis kompare mute pli milde al li, tiel ke la rilato inter la mastro kaj vasaloj fariĝis pli glata ol en la tempo de Rin'emon.

Uzaemon ĝojis ke la paroksismo de Syuri komencis fariĝi malpeza kun la alveno de la somero. Ankaŭ li mem ne povis ne timi, ĉu Syuri eventuale kondutos maldece en la ŝoguna palaco. Rin'emon tamen tion antaŭtimis kiel gravan koncerne al "la domo", dum li tion antaŭtimis kiel gravan koncerne al "la mastro".

Oni ne bezonas diri ke la ideo pri "la domo" ankaŭ nestas en lia kapo. Sed, se akcidento okazus, tio estus ne simple grava, ĉar tio pereigus "la domon", sed estus grava, — ĉar tio al "la mastro" lasus pereigi "la domon", kaj la malhonoran nomon de malfideleco al la praavoj ŝarĝus sur "la mastron". Do, kiel fari por bari anticipe tian akcidenton? Rilate tiun punkton ŝajne Uzaemon ne havis tiel klaran opinion kiel Rin'emon. Verŝajne,

li havis nenian rimedon krom porpreĝi ke la eksternormiĝo de Syuri kvietigu je la protektoj de dioj kaj budaoj kaj je lia senmakula fideleco.

La 1-an de aŭgusto en la sama jaro, kiam la ŝogunejo de Tokugawa celebris la datrevenon de sia transloĝiĝo al la kastelo de Edo⁽¹⁶⁾, Syuri vizitis la kastelon unuafoje post la malsaniĝo; kaj profitante tiun ŝancon li vizitis Itakura Sadonokami, la subministron, tiam deĵorantan en la Okcidenta Palaco, kaj revenis en sian domon. Sed ŝajne en la palaco li faris nenian maldecon, Uzaemon unuafoje sin sentis liberigita de la longa suferado.

Lia ĝojo tamen ne povis daŭri eĉ tiun tagon. Kiam la vespero falis, baldaŭ venis heroldo sendita de Itakura Sadonokami kun la ordono ke li tuj venu; kaj lin ekminacis jam tio kiel sinistra aŭguro. Ricevi alvokon en profunda vespero — tia estis senprecedenca afero de la tempo de Rin'emon. Krom tio, hodiaŭ estas la unua tago, kiam Syuri vizitis la kastelon. — Uzaemon atakita de sinistra antaŭsento konfuzite iris al la domo Sadonokami.

Nu, la antaŭtimo ne perfidis lin: oni diris ke Syuri maldece kondukis al Sadonokami. — Hodiaŭ post sia serviro Syuri ne ŝanĝinte sian veston el blanka katabiro⁽¹⁷⁾ kaj longa kamiŝimo⁽¹⁸⁾ vizitis Sadonokami-n en la Okcidenta Palaco. La lasta pensis ke lia resaniĝo ne estas tiom bona laŭ la aspekto de liaj trajtoj, sed ĉe interparolado li montris nenian simpton de malsanulo. Do, dum ili trankvile konversaciis pri diversaj temoj, Sadonokami demandis pri la farto de Rin'emon kiel kutime. Tiam Syuri kun la frunto subite malsereniĝanta diris al li: "La ulo, Rin'emon, antaŭnelonge eskapis el mia domo". Sadonokami ankaŭ bone konis kia estas Rin'emon kaj sen prava kialo li ne devis eskapi el la domo de la mastro. Ĉar Sadonokami tiel pensis, li demandis pri la detaloj kaj samtempe admonis al li: "Se al la delegito de la klanestro okazus kia ajn maldecaĵo, estus tute malkonvene ne konsulti aŭ ne informi al la parencoj". Tiam Syuri, kiu aŭdis tiujn vortojn, ŝanĝis la koloron de siaj okuloj kaj aŭdacis diri kun la mano sur la tenilo de sia glavo: "Ŝajnas al mi ke s-ro Sadonokami aparte favoras la ulon, Rin'emon, tamen, la disponon de mia vasalo mi mem prizorgas per mia propra respondeco. Eĉ se vi estas nuntempe eminenta subministro, neniel intervenu en alies aferon!" Nun eĉ brava Sadonokami restis gapa ĉe la neatendita afero, kaj la ĉambron forlasis kun preteksto ke li havas multajn aferojn. —

"Ĉu bone?" Sadonokami ĝis tio rakontinta denove mienis amara.

— Unue Uzaemon estas kulpa ke li ne informis al la parencoj kiel Rin'emon forlasis la domon. Due oni devas imputi al li ankaŭ ke li lasis al nenorman Syuri-n viziti la kastelon. Estis feliĉe ke la

14) La 3-a de Enkyō : t. e. j. 1747.

15) Sakuro : Kelkaj specioj de ĉerizarbo, speciala al Japanio.

16) Edo : Malnova nomo de Tokio.

17) Katabiro : Speco de kimono sen substofa.

18) Kamiŝimo : Robo de samurajoj. Longan kamiŝimon povis porti nur altrangaj.

koncernato estis nur Sadonokami; sed se tian blufon li farus al ĉeestantaj daimioj, la domo de Itakura kun salajro de 7000 kokuoj estus tuj likvidita. —

"Do, mi diras, de nun vi absolute malpermesu al li eliri la domon, precipe neniam viziti la kastelon!"

Sadonokami diris tiel kaj kurigis siajn rigardojn sur Uzaemon.

"Mi havas nun timon ĉu ankaŭ vi fariĝus nenorma sekvante la mastron. Ĉu bone? Mi ja ordonis tion al vi".

"Jes, sinjoro, mi volonte obeos viajn vortojn. De nun mi gardos min laŭ via majesta ordono".

"Ho, brave! Estas necese ne ripeti pekon".

Sadonokami diris kvazaŭ formovigonte.

"Tion, mi, Uzaemon, observos kun juro per mia vivo mem".

Li kun larmoj en la okuloj rigardis la kunparolanton kvazaŭ petegi. En liaj okuloj tamen oni vidis ŝvebon de la nekonkerebla decidemo akompanata de elkora peto pri la kompatato. — Tiu decidemo ne signifis ke li povos absolute malpermesi eliron al Syuri, sed kiel li faru, se li ne povos malpermesi la eliron.

Sadonokami ĉion vidis kaj turnis sin flanken kun nova grimaco de plena embarasiteco.

Se mi obeus la volon de "la mastro", "la domo" estus en danĝero, kaj se mi preferus "la domon" unue, mi devus spiti la volon de "la mastro". Iam Rin'emon ankaŭ baraktis en tia dilemo. Li tamen havis kuraĝon abandoni "la mastron" por la bono de "la domo"; aŭ pli ĝuste, li dekomence prenis "la mastron" ne tiom grava; do li facile povus oferi "la mastron" antaŭ la bono de "la domo".

Malgraŭ tio mi ne povas fari tiel. Mi estas tro intima kun "la mastro" por konsideri nur la profiton de "la domo". Kiel li povus trudi rezignon al "la mastro" obeenda anstataŭ la bono de "la domo"? Jes, nur por la bono de "la domo"? Laŭ miaj okuloj, la nuna Syuri ankoraŭ neniom diferencas de la knaba Syuri, kvankam li jam ne havas ĉe si ludilan parfarkon en sia mano. La bildlibro, kiun mi klarigis al li, la utao de naniwazu¹⁹⁾, kiun mi mem instruis al li, kaj la kajto, al kiu mi mem ligis la voston, — ili ankoraŭ restas klaraj en mia memoro.

Sed tamen, se mi lasus "la mastron" senbrida laŭ lia plaĉo, ne nur "la domo" pereus, sed ankaŭ malfeliĉo trafus "la mastron". Laŭ la vidpunkto de kalkulemo pri la intereso la rimedo de Rin'emon devas esti la unika kaj plej prudenta. Mi mem tion konfesas. Malgraŭ ĉio mi povas neniel aŭdaci tian agon.

Sub la ĉielo fulmanta malproksime Uzaemon revenonta al la domo de Syuri plurfoje ripetis tiel en sia brusto, sur kiu li splene krucigis siajn brakojn.

En la sekvinta tago, kiam Syuri aŭdis detale pri

19) La utao de Naniwazu: Fama utao, kiun knaboj tiutempe parkeris por ekzerci sin en skribarto.

la ordono de Sadonokami, li tuj nebuligis sian vizaĝon. Sed nur tiel, kaj li lasis montri neniom da ekflamiĝo. Uzaemon zorgoplena sed kun iom da trankvilo en sia koro tiun tagon forlasis la ĉambron sen plua laboro.

De tiam ĉirkaŭ dek tagojn Syuri sin enfermis en sia ĉambro kaj meditadis nur gapa kun nenia faro. Eĉ se li vidis la vizaĝon de Uzaemon, li eldiris nenion. Nur unu fojon li murmuris, kiam li aŭdis krion de kukolo en subtile pluvanta tago: "Ĝi ŝtelas la neston de ugviso²⁰⁾, oni diras". Kaj eĉ tiam li senvorte turnis siajn okulojn al la malhela ĉielo kaj restis silenta, dum Uzaemon volis alparoli lin profitante tiun ŝancon. Krom tiu okazo, kompreneble, li nur tenis sian buŝon fermita kiel mutulo, kaj nur rigardadis fikse kaj husumon²¹⁾ kaj ŝojion²²⁾. Sur lia vizaĝo oni vidi nenian esprimon.

Sed iun tagon, kiam la 15-a, la tago de la ĝenerala serviro, proksimiĝis post du-tri tagoj, Syuri neatendite alvokis Uzaemon-n, ordonis al la apudservantoj lasi ilin solaj kaj kun melankolia mieno diris:

"Kiel s-ro Sadonokami diris antaŭe, mi jam ne povos servi per tia debileco. Do, mi preferos rezigni".

Uzaemon estis skuita. Se tio venis el lia vera koro, kompreneble estus la plej granda feliĉo; sed pro kio li tiel facile ekhavis ideon cedi la domon? —

"Sinjoro, viaj vortoj devus esti pravaj. Jam restas al ni nenia rimedo, dum s-ro Sadonokami tiel diris, kvankam mi bedaŭras elkore tion. Sed unue al viaj estimataj parencoj . . ."

"Ne, ne! Se temas pri la rezigno, la parencoj donos al mi plej volonte sian konsenton eĉ sen konsulto, se ne pri la dispono de Rin'emon, mi pensas".

Syuri tiel diris kaj ellasis amaran rideton.

20) Ugviso: Specio el filokpedoj, fama pro bela kanto.

21) Husumo: Speco de pordo, konsistanta el densaj paperoj gluita sur kradoj.

22) Ŝojio: Speco de pordo konsistanta el unuobla papero gluita sur kradoj.



Kapao — japana mita monstro

"Sinjoro, ne povas esti tiel".

Uzaemon kun dolorplena mieno alrigardis Syuri-n, kiu tamen ne volis aŭskulti liajn vortojn.

"Nun, se mi cedos la domon, mi jam ne povos serviri, eĉ se mi volus, do" Syuri fiksas sian rigardon sur la vizaĝon de Uzaemon kaj diris, kvazaŭ li pesus vorton post vorto: "Antaŭ tio, ankoraŭfoje mi volas serviri kaj peti aŭdiencon de Lia Eksŝoguna Majesto en la Okcidenta Palaco (temas pri Yosimune⁽²³⁾). Kiel? Ĉu vi ne volus min lasi viziti la kastelon en la 15-a?"

Uzaemon senvorte sulkigis siajn brovojn.

"Cetere, nur unu fojon".

"Mi elkore bedaŭras, tamen tion"

"Ĉu mi ne povos?"

Ambaŭ silentis reciproke rigardante la vizaĝon. En la ĉambro regata de plena silento oni povis aŭdi nenion krom la sono kun kiu la meĉoj sorbas en sin oleon. — Uzaemon sentis tiun mallongan tempon longa kiel tuta jaro. Ĉar li jam klare ĵuris al Sadonokami, se li lasus tion al Syuri, lia samurajismo ne povus plu ekzisti.

"Mi petas, dum mi bone konas la vortojn de s-ro Sadonokami".

Post ne mallonga tempo Syuri diris plue:

"Kvankam mi, Syuri, bone konas ke se vi lasos min viziti la kastelon, vi estos malfavorata de la parencoj, tamen mi petas ke vi pripensu mian si-

tuacion. Mi estas freneza, jam forlasita ne nur de la parencoj sed ankaŭ de la vasaloj".

Lia voĉo, kiu diris tiel, ĉiam pli ekhavis tremeton de emociigo. Uzaemon vidis ke ankaŭ liaj okuloj estas malsekaj de larmeroj.

"Mokata de ĉiu, cedi la domon al fremdaj manoj; eĉ la suno ne radias al mi; tia estas Syuri. Uzaemon ne povas esti tia rigora persono, kia rifuzas la lastan peton de Syuri tiel mizera viziti la kastelon nur unu fojon. Se Uzaemon, ĉi tiun Syuri-n kompatos, sed neniel povus min malami. Mi pensas vin mia patro, mi pensas vin mia frato, mi pensas vin pli kara ol la patro aŭ frato. En ĉi tiu vasta mondo mi konfidas nur al vi sola. Jen kial mi petas vin trude. Kaj mi neniam ripetos plu ĝis mia vivfino. Nur unu fojon ĉi okaze, mi petas. Uzaemon, volu kompati min, volu permesi ĉifojan altrudon. Jen tiel mi petas vin".

Li metis ambaŭ manojn sur la plankon antaŭ la intendanto kaj kun falantaj larmeroj li volis alpremi sian frunton al la tatamo. Uzaemon estis forte tuŝita.

"Sinjoro, afable levu viajn manojn, afable levu viajn manojn. Por mi tia estas tro granda komplezo".

Li prenis la manojn de Syuri kaj devigis ilin retiri for de la tatamo. Kaj li ekploris. Tiam, ju pli li ploris, des pli la trankvilo superabundis en lia koro, oni ne sciis pro kio. — Kun la plena larmo li klare rememoris denove siajn donitajn vortojn al Sadonokami.

"Bone, mi konsentas, sinjoro. Se s-ro Sadonokami riproĉos min kiel ajn, ĉio ĉesos, se nur mi, Uzaemon, harakiros mian faltoplengan ventron en necesa okazo. Mi konsentas ke vi vizitu la kastelon, kaj ĉion imputu nur al mia malzorgemo".

Kiam Syuri aŭskultis tion, sur lia vizaĝo ekbrilis ĝojo kvazaŭ de alia homo. En tiu ŝanĝigo sin kaŝis ia artifiko de aktoro, sed ankaŭ samtempe ia natureco, kian aktoro neniel povas havi. — Li subite lasis detonitan ridon.

"Ĉu vi lasos? Ho, mi dankas, mi dankas vin".

Li eldiris tiel kaj kun jubila esprimo rigardis ĉirkaŭen.

"Hej, ĉiu aŭskultu! Uzaemon donis sian konsenton al mi".

En la ĉambro, de kie oni foriris laŭ lia ordono, restis neniu alia krom li kaj Uzaemon. Ĉiu? — Uzaemon zorgoplena puŝis siajn genuojn antaŭen, kaj kun timo enrigardis la okulojn de Syuri sub la lumo de lanternoj.

3. La atenco

Post la 8-a horo en la mateno de la 15-a, aŭgusto, la 4-a jaro de Enkyō, Syuri murdis en la kastelo *Hosokawa Ettyūnokami Munenori*, al kiu li ŝuldas nek dankon nek rankoron. Jen kiel tio okazis:

La domo de *Hosokawa* estis unu el la plej batalpretaj daimioj. Eĉ la sinjorino de *Munenori*, pri kiu



Kioto Juĝi

Malriĉaj homoj

oni diris ke ŝi devenis el nobela familio, estis klara en la batalarto. Estis do diri senbezone ke Munenori neniel estis maldiligenta en tiu vojo. Do, oni povas diri nur malbona fatalo, ke tia li devis tiel morti kiel oni siatempe satiris per jena utao :

Ĉar HOSOKAWA
devenis de Sansai,
sendube pelis
lin al gosaigo
la glavo de l'nisai. (25)

Se oni profunde meditos, jam multaj sinistraj aŭguroj aperis sur la domo de Hosokawa, kiuj ne perfidis sian antaŭdiron pri la akcidento : — Unue meze de marto en la sama jaro, la unua palaco en Isarago, Sinagawa, forbrulis pro incendio. La palaco havis tradicion neniam bruli pro ke ĝi havas en sia tereno Grandan Bodisatvon Myōken⁽²⁴⁾, kaj antaŭ ĉi tiu ankaŭ misteran ŝtonon, kiu ŝprucigas akvon en necesa okazo kaj estingas la fajron. Due, kiam en la mezo de majo la templo Aizen en Gyōran oferis al la domo talismanan tabulon, kiun oni povas alnajli sur la pordegon, oni trovis ke al la literoj skribitaj sur ĝi mankas unu vorto "akcidento", dum la literoj devus esti "Eterne prosperu la samuraja sorto sen akcidento". Oni tion lasis korekti al Aizen, post pridemando al la intendantbonzo de la loĝĉambro de Ueno⁽²⁶⁾. Trie, en la unua dekada de aprilo, ĉiunokte oni vidis ke granda vaglumo aperas de apud la salono en la domo kaj flugas al la direkto de Siba.

Krom ili, en la tagmezo de la 14-a, aŭgusto, vasalo nomita Saiki Moemon, kiu studis astrologion, venis al inspektisto kaj sciigis : "Morgaŭ, la 15-an, povus okazi ia malfeliĉo al la estimata Sinjoro. Kiam hieraŭ vespere mi observadis la ĉielon, mi trovis ke Stelo Generalo⁽²⁷⁾ estos falanta. Mi petas, Lia Moŝto estu singarda ke li afablu neniam eliri". Kvankam la inspektisto laŭ sia naturo neniom kredis tian, kia estas astrologio, tamen li tuj informis al apudservanto kaj sciigis tion al la oreloj de Ettyūnokami, ĉar la sinjoro kutimis estimi lian antaŭdiron. Do, oni tuj aranĝis : no-teatraĵo⁽²⁸⁾ okazonta en la 15-a estu ne ludita, kaj la sinjoro vizitu nenian amikon revenvoje de la kastelo; tamen, verŝajnis ke oni ne ĉesigis la serviron, ĉar tio estis unu el la plej gravaj servoj al la ŝoguno.

Plue ankoraŭ nova sinistra aŭguro aperis en la sekvinta tago. — En la domo oni havis kutimon ke en ĉiu 15-a tago Ettyūnokami mem post la ŝanĝo



Ueno Makoto

Virinoj

de siaj vestoj en tola "kamiŝimo" oferu sanktan sakeon al Granda Bodisatvo Hatiman⁽²⁹⁾. Sed en ĉi tiu tago kiam li ricevus du botetojn kun sankta sakeo el la manoj de paĝio kaj volis ilin oferi antaŭ la dion, oni ne sciis kiel, ambaŭ botetoj falis kaj la sakeo elverŝigis eksteren. Tiam ĉiu malgraŭvole fariĝis pala kun detenata spiro.

En la sekvinta tago Ettyūnokami vizitis la kastelon, kaj tuj gvidata de Tasiro Yūtetu, ĉambristo kun razita kapo⁽³⁰⁾, unue eniris la salonon. Sed, ĉar baldaŭ lin vokis natura neceso, li ĉi foje akompanata de Kuroki Kansai, alia ĉambristo, iris al necesejo apud teejo kaj tie plenumis sian neceson. Nun, kiam li eliris la necesojn kaj lavas siajn manojn en mallumeta lavejo, abrupte iu nekonata kun ekkrio glavbatis lin de malantaŭe. Surprizite li sin returnis; samtempe la dua bato briletis al lia glabelo trafe. Pro tio la sango fluis en liajn okulojn tiel, ke li ne povis konfirmi eĉ la trajtojn de la surprizanto. Profitante la ŝancon la atakanto saltis kaj saltis al li kaj batbatis lin plurfoje. Kaj kiam Ettyūnokami ŝancelata finfine falis sur la koridoron de la Kvara Ĉambro, la atakinto abrupte malaperis ien for, dum la glavo restis sur tiu loko ĵetita.

Sed, ĉar Kuroki Kansai, kiu akompanis lin, konfuzite pro la neatendita akcidento, fuĝis for al la direkto de la salono kaj ankaŭ sin kaŝis ien, neniu sciis pri tiu atenco. Iom pli malfrue tion trovis iu dekestro nomata Honma Sadagorō, kiu hazarde venis el sia deĵorejo kaj volis iri al servista ĉambro. Li tuj informis la aferon al subinspektistoj, kaj el tiuj alkuris Kuge Zenbē, ties estro, Tutida Han'emon, Komoda Niemon kaj aliaj subinspektistoj. — En la kastelo ekregis granda tumulto kvaŭzaŭ abelujo estus rompita.

Kaj ĉiu kune levis en brakojn la vunditon kaj trovis : kaj la vizaĝo kaj la korpo, ĉio estas sangoŝmirita plenplene tiel ke ili neniel povis distingi kiu

24) Granda Bodisatvo Myōken : Idolo miksa el budaismo kaj ŝintoismo, ties simbolo estas Polusa Stelo.

25) La montrita satiro signifas : Ĉar Hosokawa estas ido de Sansai la dua mastro de la koncerna domo, li estis mortigita de nisai (flavbekulo) kaj atingis gosaigo-n (morton).

26) Ueno : Loko en Tokio, kie situas granda templo konstruita de ŝoguno kaj rigardita kiel la plej grava.

27) Stelo Generalo : Unu el Andromedoj.

28) Noo : Japana klasika teatraĵo, kiun oni ludas kun masko, simile al greka dramo, akompanata de utajo (japana klasika kanto).

29) Granda Bodisatvo Hatiman : Simile al Myōken, miksa idolo de budaismo kaj ŝintoismo, kies figuro estas Mikado Oozin (? - 970), rigardita kiel samuraja dio.

30) Ĉambristo kun razita kapo : Tiaj servis en kastelo, iom simile al eŭnuko.

li estas. Sed kiam oni vokis lin per la buŝo apudigita al la oreloj, li per apenaŭ aŭdebla subtila voĉo respondis: "Hosokawa Ettyŭ". Poste oni plu demandis al li: "Kiu vin atakis?", sed li povis respondi nur: "Viro en kamiŝimo"; kaj de tiam jam la voĉoj ŝajne ne povis atingi al li. Liaj vundoj konsistis el "ĉ. 7 coloj ĉe la kolo, ĉ. 6-7 coloj ĉe la maldekstra ŝultro, ĉ. 5 coloj ĉe la dekstra ŝultro, ĉ. 4-5 coloj ĉe ambaŭ brakoj, 2-3 vundoj sur la nazo, apud la oreloj kaj sur la kapo, kaj ĉ. 15 coloj diagonale de la dorso ĝis la dekstra flanko". Tiam antaŭ la ĉeesto de *Tutiya Tyōtarō* kaj *Hasimoto Awanokami*, deĵorantaj inspektistoj, kiel la unuaj kaj ankaŭ *Kōno Buzennokami*, unu el la ĉefinspektistoj, oni provizore alportis la vunditon en Ĉambro de Hejtado, kaj tie lin ĉirkaŭis per malgrandaj bjobuoj³¹⁾, kaj lasis lin flegi al kvin ĉambristoj; krom ili daimioj deĵorantaj en la salono venis al li alterne kaj lin ĉiel zorgis. Precipe *Matudaira Hyōbusyōyū* depost la alporto plej kompleze lin flegadis ke eĉ aliaj povis rimarki ilian profundan amikecon.

Dume post kiam oni sciigis tion al ministroj kaj subministroj, por gardi kontraŭ plua eventuala akcidento oni severe riglis la pordegojn, de la vestiblo ĝis la Ĉefa Pordego. La vasaloj de grandaj kaj malgrandaj daimioj alvenintaj ĝis Ĉefa Pordego vidis tion kaj komencis tumulti sciante ke okazis ia akcidento en la kastelo. Kaj kiom ajn inspektistoj venis kaj reguligis, ili ĉiam denove tuj sin repuŝis kiel marinundo. Plue, la tumulto en la kastelo daŭris ĉiam pli kaj pli konfuza, ĉar *Tutiya Tyōtarō*, la inspektisto, neniel povis trovi la "viron en kamiŝimo", malgraŭ tio ke li akompanate de subinspektistoj kaj fajrogardistoj, de ĉiu deĵorejo ĝis ĉiu kuirejo obstine serĉadis la atakinton.

Tiam tute ekstersupoze la murdinto estis trovita de ĉambristo nomata *Takarai Sōga*, anstataŭ de la persekutantoj. — *Sōga* estis tiel brava viro ke li sola jam de antaŭe serĉadis diversajn lokojn, kiujn eventuale ili ne serĉos. Kiam li senatente rigardis la internon de necesejo proksima al Ĉambro de Hejtado, jen li trovis ke iu viro kun distaŭzitaj haroj sur la tempioj kaŭras en ĝi kvazaŭ ombro. Kvankam *Sōga* ne povis klare distingi lin pro la mallumeto, la viro ŝajne prenis el sia ladsaketo tondileton kaj per ĝi tondas siajn distaŭzitajn harojn. Tiam *Sōga* alproksimiĝis kaj demandis:

"Kiu vi estas, sinjoro?"

"Estas tiu, kiu tondas la harojn, ĉar mi murdis homon".

Jam restis nenio dubinda, *Sōga* tuj vokis aliajn, kaj la viron trenis el la necesejo kaj provizore lin transdonis al la manoj de subinspektistoj.

La lastaj lin eskortis plue al Ĉambro de Cikaso, kaj tie antaŭ la ĉeesto de la ĉefinspektistoj kaj inspektistoj pridemandis la kialon de la atenco. La viro tamen rigardadis nur gapa la tumulton bruantan ĉirkaŭ li en la kastelo, kaj donis neniom da

respondo, kiu meritas la nomon de respondo. Se li malfermis sian buŝon, li nur diris delire pri kukolo. Kaj inter tiuj vortoj li per la sangoŝmiritaj manoj plurfoje disŝiris siajn harojn sur la tempioj. — *Syuri* jam fariĝis tute freneza.

Hosokawa Ettyŭnokami ĉesis spiri en Ĉambro de Hejtado. Sed laŭ la privata instrukcio de la Eksŝoguna Majesto *Yosimune* oni proklamis ke li estas nur vundita, kaj lin lasis reiri al la domo, sur palankeno tra *Hirakawa Pordego* kaj *Meza Pordego*. Estis la 21-a tago, kiam oni oficiale deklaris lian morton.

Post kiam *Ettyŭnokami* estis deportita al sia domo, *Syuri* tuj estis deponita al *Mizuno Kenmotu*. Ankaŭ oni lin elportis la saman vojon tra *Hirakawa Pordego* kaj *Meza Pordego*. La palankenon ĉirkaŭgardis 50 piedsoldatoj, ĉiu vestita per nova persimonkolora katabiro kaj per nova blanka momohiko³²⁾, kaj ĉiu tenis novan bastonon en sia mano. — La procesion oni laŭdis, laŭ kroniko, kiel pruvon de la ĉiama preteco de *Kenmotu* kontraŭ ĉia eventuala okazo.

La 22-an, 7 tagojn post tiam, *Isikawa Tosanokami*, ĉefinspektisto, estis sendita kun la ordono, kiu diris: "Kvankam vi estas freneza, tamen al vi estas donata la harakiron pro ke *Hosokawa Ettyŭnokami* mortis de la donitaj vundoj malgraŭ ĉia kuracado".

Antaŭ la sendito oni proponis glaveton al *Syuri* konforme al la moro, sed li restis nur gapa kun la manoj vane metitaj sur la genuoj, kaj neniel montris ian movon preni la glaveton. Do, *Yosiŝida Yasōemon*, vasalo de *Mizuno*, servanta asisti la harakiron, malgraŭvole lian kapon dehakis de la malantaŭo. Por diri veron, li ne tute forhakis, sed lasis resti tavoloeton da kolhaŭto ne hakita. *Yasōemon* la kapon tenis sur siaj manoj kaj genuante ĝin montris al observanta oficisto. La kapo kun elstarantaj zigomoj kaj kun flava haŭto aspektis tre mizera; la okuloj kompreneble restis ne fermitaj.

La oficisto, kiu rigardis tion en la sufokanta odoro de la sango, respondis kontente: "Brave!"

En la sama tago oni dehakis la kapon al *Tanaka Uzaemon* ĉirkaŭŝnurita, en la tereno de *Itakura Sikibu*. Li krimis "senprecedencan kanajlaŝon": kvankam de antaŭe *Itakura Sadonokami* severe ordonis al ci ke ci neniam ellasu *Syuri*-n pro ties malsano, tamen ci spitis tion kaj lasis lin viziti la kastelon nur laŭ ĉia prikonsidero, kaj per tio kaŭzis tiun akcidenton, kiu kondukis al pereco la domon kun salajro de 7000 kokuoj".

Kompreneble oni ordonis la enfermigon al ĉiu parenco: *Itakura Suhōnokami*, samfamilinomaj *Sikibu* kaj *Sadonokami*, *Sakai Saemonnozyō*, *Matudaira Ukonsyōken* kaj aliaj. Krom ili, *Kuroki Kansai*, kiu forlasis *Ettyŭnokami*-n kaj forfuĝis, estis eksigita de la posteno kaj ekzilita.

31) Bjobuo: Speco de vando, devenanta el Portugalio, portugale 'biombo'.

32) Momohiko: Vesto simila al pantalone. Kelkaj vortoj ĉi tie notitaj aperos sur Plena Ilustrita Vortaro.

Verŝajne la atenco de Syuri venis de eraro. Ĉar la naŭ-stela blazono de *Hosokawa* tre similis al tiu naŭ-kurbogema de *Itakura*, Syuri, kiu deziris atenci Sadonokami-n, misprenis kaj murdis Ettyŭnokami-n. Iam antaŭe *Mizuno Hayatonosyô* hakis *Môri Mondonosyô*-n same pro tia mispreno. Precipe en mallumeta loko, kia lavejo, facile povus okazi tia eraro. — Tio ĉi estas tiunempe agnoskita famo.

Nur *Itakura Sadonokami* ne volis rekoni tiun jam agnoskitan famon malgraŭ ĉio, kaj temis pri

tio, ĉiam amare diris:

"Mi, Sado, havas nenian kaŭzon por ricevi la klingon de Syuri. Mi havas nenian rilaton, kiu meritas tian repagon; tiom pli se temas pri tia frenezulo. Eble li murdis s-ron *Hosokawa* kun nenia kulo. Tia supozo pri la eraro por mi estas tro granda ĝeno. Por pruvi tion restas menciinda fakto ke li eĉ antaŭ la ĉefinspektisto babiladis tiel kaj ĉi tiel pri kukolo, mi aŭdis, ĉu ne? Do, povos esti ke li murdis lin misprenante lin kukolo".

Ilio Calabresi:

LAULONGE DE LA VOJO

I.

Laŭlonge de la vojo
mi iras kun laciĝo
en la suna oceano
el malkompata gloro

Ĉio silentas ĉirkaŭe
duflanke de la blanka
polva ebenaĵa strato
kun multnombraj kurbiĝoj
dezerta lando estas

argil' blueta ŝtonoj
kaj malamikaj rokoj
ĉie kontraŭ stariĝas
ĉio malamikadas

Al mi sangon havanta
ĉe la piedoj nudaj
ĉio estas malpora
Ha naturo naturo
ĉiama fipatrino!

II.

Kaj estas mi en la dezerto sola
kiel en la gleb' dezerta de l' spirito
Blanka serpento jen min altiradas
al nekonata lando
kaj ĝia spiralo forte tenas min...
Kial kurbiĝoj se la tuta vojo
neniam grimpas aŭ malsupreniras?
Ho terur' de ĉi ebena strato
inter mortaj montetoj
kaj sub la ĉielo nebarita regiono
de l' malrespekta dio
kiu ĉiutage senkompate atakas
velkintan amikinon
en malĉastega kuniĝado!
Ne arboj estas ĉie ombrofarantaj
nek freŝaj herboj nek malgajaj veproj
nek fuska nub' aŭ l' diskreta nebulo
nur estas ĉi brilanta terurego!

Nun jam mi estas la homo falonta
jen nun mi perdis l' esperon de l' alteco
fine mi falas kaj la sekaj lipoj
jam kisas la maldolĉan polvon
Sur strata bordo mi kuŝas finfine
finfine venos tien la nigra dio
finfine nigra....
Kaj ci verda fadeno
vane stariĝos
inter ŝtonoj kaj sablo
vane leviĝos ĉielen
Kaj ci restos en dezerto sola

glebo = terbulo; ankaŭ la terparto en kiu kadavro estas sepultita; ankaŭ ĝenerale (per metonimio) kampo.
fuska = malhela, precipe rilate la kolorojn.

MIHAIL SADOVEANU

MALNOVA HISTORIO

Iam, en bela vetero aŭtuna, mi estis survoje al la malproksimaj vinberejoj de Băiceni. La suno ne ardis, ĝia ora lumo estis dolĉa; la vento milde blovetis, jen kun forta odoro arbara, jen kun la malseka parfumo de stoplejo.

Mi estis kun maljuna advokato kiu estis koninta la malnovan tempon, la jaron 48. Mi sidis komforte en lia larĝa kaleŝo kun elastaj risortoj, "kun risortoj taŭgaj por maljunaĝo", kiel kutimis diri sinjor' Stefano Leu. Du blankaj ĉevaloj frapadis la ŝoseon kovritan de silikoj, nek tro rapide, nek tro malrapide. Ankaŭ la veturigisto sur sia kondukseĝo estis maljuna, proksimume samaĝa kun oĉjo Stefano. Li havis lipharojn lino-blankajn kaj li daŭre parolis al siaj "drakoj". Kiam la vojo estis ebena, li konsiladis ilin, kiam ĝi supreniĝis, li ilin kuraĝigis, kiam ĝi descendis, li riproĉis ilin.

La maljunulo apud mi rigardadis enpensiginte kaj ridetante la lokojn kiujn ni preterpasis. Ni alproksimiĝis al la distrikta ĉefurbo. La tago estis taŭga por kaleŝveturado, ĉe niaj piedoj troviĝis korbo plena kun bongustaj manĝaĵoj, do ni ambaŭ ekemis ne plu aliri la urbon.

— Ni ne plu iras al la urbo, Eliaso! kriis de sia loko oĉjo Stefano.

La koĉero skuis la bridojn kaj kapjesis je signo de kompreno.

Ni tiam supreniris malkrutan, ŝajne senfinan monteton, lasante la urbeton malantaŭ ni, maldekstre, en ĝia kaŝo. Subite ekaperis je nia dekstra flanko, inter la montetoj, larĝa ebenaĵo. Ĝi estis loko sovaĝiĝinta, plena de dornarbetoj, el kiuj eliĝis kelkaj nanaj prunujoj, torditaj kiel pro doloro. Malantaŭe, sur la deklivo de monteto, du ŝtonaj krucoj kliniĝis al la bruligita herbo. Aro da perdrikoj subite bruleviĝis apud la vojo, disiĝis, poste la diketaĵoj rondaj birdoj flugis super la arbetoj, super la prunujoj, kaj tiam ili ekglitis kun etenditaj, iom kurbigitaj flugiloj al la ŝtonaj krucoj.

— Kial tiuj prunujoj ĉi tie kaj la krucoj? mi demandis. Ŝajnas ke iam estis ĉi tie tombejo.

— Estis, respondis la maljunulo turnante al mi sian blankan barbon kaj la blujajn okulojn, sed ne kiel vi imagas. Ĉi tie estis iam la pendigejo de la distrikto. Mi ankaŭ vidis la faman Gavril kiam li pendigis virinon. . . . Mi bone memoras tion. . . .

Poste iuj bonuloj plantis kelkajn arbetojn kaj restis ankaŭ du krucoj, sed la loko pli kaj pli sovaĝiĝas kaj post kelkaj jaroj ĉio forkadukiĝos.

Mi turniĝis pli atenteme al la iama punejo. La arbitaro estis trankvila kaj dezerta.

— Mi rakontos al vi ĉi tiun historion, subite ekparolis la maljuna Stefano Leu; ĝi estas interesa kaj mi memoras ĝin bonege. . . . Tiam mi estis fraŭlo kaj, havante iun oficeton ĉe la registaro, mi ĉeestis.

Vidu. . . . Tiun knabinon, kiun ili pendigis, ŝiaj gepatroj edzinigis al iu fraŭlo maljuneta, sed cetere bonstata kaj vilaĝestro. Ŝi ne volis, ŝi kontraŭstaris, sed kion ŝi povis fari? Ŝi diris ke ŝi amas iun alian, ŝi aldonis Dio scias kion, — ŝia patro bone batis ŝin kaj poste ili festis la geedziĝon kun granda bruoj.

Nu, ĉion ĉi tion mi poste eksciis. Kion vi pensas, sinjoro, eĉ unu jaro ne pasis kaj kiam post la foiro de Sankta Eliaso la vilaĝestro — kiu nomiĝis Georgo Timofte — revenis hejmen kun sia edzino, el la arbitaro aperis iu ŝafisto ĉi tie, ĉe la deklivo, saltis en la ĉaron kaj jetis sin sur la viron. La virino alsaltis, kaptis la hakilon de la ŝafisto kaj frapis la kapon de la vilaĝestro. Mi ne scias kio okazis poste, sed li estis morta. Ili lasis la ĉaron kaj la mortinton tie kaj forkuris. Dum du semajnoj ili ĉirkaŭvagis, poste ili estis kaptitaj ie, en monta kabano ĉe la piedo de arbaro.

La juĝo okazis ĉi tie, en la urbo. Unue oni enketis. Ĉe la enketo mi ankaŭ ĉeestis ĉar mi iom oficetis, kiel mi jam diris al vi. Mi bone memoras tion. Mi nun estas maljuna, sed aferon similan mi neniam vidis.

Unue la juĝisto veniĝis Anica, Anica de Timofte, la edzinon de la mortigito.

Ŝi estis virino eta kaj vigla, juna — apenaŭ dudekjara — kun vizaĝo nigreca, kun dikaj brovoj iom kuntiritaj. Kiam ŝi parolis, la nazloboj tremetis. Ŝi surhavis brunan jakon, jupon ruĝan, portis kaptukon el verda lano kaj ŝuetojn el delikata ledo, kun latunitaj kalkanumoj.

Ŝi ekhaltis antaŭ la juĝisto kaj rigardis rekte en liajn okulojn, ŝi metis la dekstran manon sur siajn okulojn, poste faligis la manplatojn kun kroĉitaj fingroj.

La maljuna Gîcu, la juĝisto (li antaŭlonge jam mortis), rigardis ŝin atente, vidis ŝin tiel bela kaj vigla, kun nigraj okuloj tiel fajraj kaj inteligentaj, ke li malfacile povis kredi ke tia knabino povis mortigi iun.

— Diru, Anica, sed diru la veron, ĉu vi mortigis vian edzon?

— Mi kisas vian dekstran manon, via moŝto, mi lin mortigis.

— Kaj kial vi mortigis lin? Kion li faris al vi?

Ŝi rigardas momenton ĉirkaŭ si, poste ŝia manplato denove tuŝas la okulojn.

— Mi mortigis lin, viaj moŝtoj, ĉar mi ne plu povis vivi kun li... Mi amis iun alian.

Kaj ŝiaj nazloboj vibregis kiel en febro. Ŝi eble regis sin por ne ekplori; ŝiaj brovoj pli forte kuntiriĝis.

— Bone, sed kial vi tiam edziniĝis al li?

— Mi ja ne volis edziniĝi al li... Mi tuj diris ke mi amas Ionica Spataru. Sed paĉjo kaj panjo nenion volis aŭdi. Ili alterigis min kaj bategis; kion mi povis fari post tio? Ili diris ke ili mortigos min, ke ili tranĉos mian gorgon... Tiam mi diris: laŭ la Dia volo!... kaj mi sekvis Georgon Timofte. Kaj Spataru foriĝis al iu ŝafejo pro ĉagreno kaj doloro.

— Kaj — ĉu kun via edzo vi ne bone vivis?

Ŝi nun fiksis sian rigardon al la tero.

— Diru, Anica, ĉu vi ne bone vivis kune? Ĉu li batadis vin? Kion li faris al vi?

— Mi kisas vian dekstran manon, — mallaŭte flustris la virino, — mi malŝategis lin! Mi ne povis vivi kun tia ulo sub la sama tegmento. Li estis malbela kaj maljuna. Nokte li tusadis. Neniul mi povis elteni lin... Mi ne konsentis...

— Kion vi ne konsentis? demandis la juĝisto.

— Mi kisas vian dekstran, diras Anica, nur post la geedziĝa festo; tiam mi estis ebria kaj tiam li faris kion li volis... Mi konsciis nenion. Sed poste mi faris ĵuron en mia koro kaj mi ne plu allasis... Kaj post tio Georgo Timofte komencis batadi min. "Kial mi ne volis esti lia edzino?!" Mi diris al li tiel: lasu min, lasu min iri mian vojon, mi amas iun alian... Li diradis tiel: vi estas mia edzino. Mi mortigos vin. Venu ĉi tien!

— Mi ne volis iri al li!...

Ni ĉiuj estis silentaj. La maljunulo rigardis ŝin fikse. Anica rigardis flanken per siaj nigraj kaj humidaj okuloj kaj tordadis siajn manojn.

— Kaj kiel tio okazis poste? Diru la veron! Ĉu Spataru frapis per sia hakilo? Diru la veron!...

— Ne, ne Spataru frapis. Mi vidis Ionica en la foirejo kaj mi ekhavis ian kapturŝtonon... Mi diris al Timofte: ni foriru nun... Li ne volis. Ni do plu restis. Poste, vesperiĝe, ni ekiris hejmen... Ni iris, iradis kaj kiam ni alvenis en la arbaro, jen aperas Ionica Spataru kaj saltas en la ĉaron sur Timofte... Tiam mi diris tiel: lasu lin, Ionica! Kaj mi prenis la hakilon per ambaŭ manoj kaj mi frapis mian edzon... **Mi** mortigis lin!...



Mihail Sadoveanu, naskiĝinta en 1880 en Norda Moldavio, estas la plej elstara prozisto de la moderna rumana literaturo. Ekde 1900 li publikigis proks. 150 volumojn: romanoj, noveloj, historiaj rakontoj, rememoroj. Ili formas veran epopeon de la rumana popolo, kies kutimojn, pensmanieron kaj folkloron li eternigas per majstra priskribado. La plej elstaraj okazaĵoj el la nacia historio kaj ĉiuj sociaj klasoj trovas sian lokon en lia ampleksa verkaro. La diversspecajn pejzaĝojn de sia patrujo li amas kaj amigas. Liaj herooj, ofte malriĉaj kamparanoj, metiistoj, etoficistoj, vivas kaj suferas la maljustaĵojn de sia sorto. Lia sincera homamo montriĝas ĉie.

La apuda rakonto estas la unua el la kolekto titolita ankaŭ Malnova Historio, kiu aperis en 1908.

— Ĉu vi frapis? Diru la veron! Ĉu vi havis tiom da forto por fendi la kapon de viro? Ĉiuj diras ke Spataru devas esti la mortiginto.

— Ne, viaj moŝtoj, **mi** mortigis lin. Mi frapis lian kapon kaj mortigis lin...

Parolinte tiel firme, ŝi faris krucosignon kaj subite turnis sian rigardon al la juĝisto.

— Kaj poste?

— Poste, — tio estis ĉio. Poste mi sekvis mian vojon kun Ionica. En la tuta mondo nur li estis al mi kara kaj mi iris kun li.

Tion mi ĉeestis, daŭrigis mallaŭte sinjor' Stefano Leu, dum la ĉevaloj suprentrotis malrapide la deklivon, — kaj tio estis ĉio.

Kiam eniris la ŝafisto, bela junulo, rekta kiel pinarbo, ŝi nur etendis la manojn al li kaj kriis:

— Diru ankaŭ vi, Ionica, jen vi estas ĉi tie. **Mi** mortigis lin! Mi frapis lin per la hakilo...

Kaj ŝi rigardadis lin per siaj nigraj okuloj, ne palpebrumante, kun pasio kaj kun tremantaj nazloboj. Kaj Ionica Spataru komencis viŝi malrapide siajn larmojn kaj rigardi al la tero.

Lin oni kondamnis je dek jaroj da punlaboro; kaj Anica ili kondukis al la pendumilo. Tiel ili decidis. Kaj kiam venis Gavril Buzatu kaj starigis tie la forkegon sur la ebenaĵo, amasiĝis ĉiuj el la urbo kaj el la ĉirkaŭaj vilaĝoj kiel ĉe foirejo. Inter ili eĉ por pinglo ne estis loko. Soldatoj kun kaskoj, laŭ tiama kutimo, malhelpadis la amasiĝon per siaj bajonetoj. Mi vidis ankaŭ la maljunulojn, la gepatrojn de Anica. Ili ankaŭ venis, la kompaktindaj. La patro kun festotaga ŝafpelta jako, kun ĉemizo pura, lia edzino kun lanrobo kaj kaptuko. Ili ambaŭ ploris kiam oni portis Anica sub la pendnodon. Nur tiun knabinon ili havis. Kaj ŝi estis bela kaj pli svelta ol ĉiuj virinoj kaj knabinoj ĉeestantaj.

La pastro alvenis kaj benis ŝin — aŭ faris al ŝi mi ne scias kion, kaj jen, kvazaŭ ankaŭ nun mi vidas Anica: kun ŝia bruna jako, ŝia ruĝa jupo, verda kaptuko kaj delikataj ŝuetoj kun latunitaj kalkanumoj. Ŝi turniĝis, rekta, al la amaso kaj levis siajn manojn. Ŝi diris tiel:

— Karaj bohuloj, pardonu min!

Ĉiuj respondis: "Dio pardonu vin!"

Kaj la maljunuloj komencis plorplendi:

— Anica, Anica, kion vi faris? Kiel vi povis havigi al ni tian honton en ĉi tiu mondo?

Tiam ŝi turnis sin kaj rimarkis ke ankaŭ ŝiaj gepatroj estas tie. Ŝi komencis tremi dum la ekze-

kutisto preparis por ŝi la nodon kaj ŝi kriegis al ili kun malamo, ŝi malbenis ilin:

— Dio donu ke vi neniam mortu! ĉar vi enmondigis min por tia puno!

Kaj subite fariĝis profunda silento. Kaj ŝi kriis denove kun voĉo amara:

— Ah, mi ankaŭ ŝategis vivi en ĉi tiu mondo, sed tio ne estis al mi donite

Kaj ŝi levis ambaŭ manojn al siaj okuloj. Nur tiom daŭris ŝia ploro: kelkajn momentojn. Ĉiuj staris ŝtoniĝintaj. Kiel fajra blovaĵo estis pasintaj ŝiaj paroloj super la kapoj.

Tiam la ekzekutisto metis la nodon ĉirkaŭ ŝian nukon. Ŝi faligis siajn manojn kaj rigardis ĉirkaŭ si senmove, kun iom kuntiritaj brovoj.

Kaj la ŝnuro estis tirata.

Sinjur' Stefano Leu silentis. Iom poste li diris milde:

— Haltu!

La ĉevaloj haltis.

Ni turnis nin tie, sur la kusenoj de la kaleŝo. Malantaŭ ni videbliĝis inter la montetoj la soleca ebenaĵo kun siaj nanaj kaj torditaj arboj super la forgesitaj tomboj. Super tiu soleco kaj super tiu melankolio de komenciĝinta aŭtuno glitadis vulturo kun senmovaj flugiloj.

El la rumana lingvo tradukis: **S. PRAGANO**

F. Szilágyi:

Kun Fido


Dediĉita al Magda Carlsson, kiam ŝi festis sian 60an naskiĝtagon.

Post gutoj gut' — moment-akuto,
sekundoj sesdek — kurta minuto.
Minutoj sesdek — nur unu horo
— temp-meteoro?

Senĉesa gut' — al marĉo aŭ maro?
El la sekundoj momenta jaro:
sur supro de l' tero — era poro.
Sen rememoro?

Nin hardas ardo en jarĉeno — strek',
vol' tornas volon, kaj ĉe la sesdek
fiera flamo varmigas nin pro
l' ekstera vintro.

Privenkas spacon flugo de aglo,
samtempon sekvi: dia miraklo.
Kun fido pli alten, kun kredo por —
Excelsior!



JUGISTO

Rabindranath Tagore

Post vico da perfidaĵoj de la sorto Kŝiroda, atinginta sian tridek okan jaron, vidis, ke la viro, ĉe kiu ŝi estis trovinta trankviliĝon, forlasis ŝin kiel foruzitan vestaĵon. Kaj ŝi komprenis, ke estas netolereble humiliga afero, pro panpeco denove serĉi vivŝirmejon.

Kiam finiĝas la junago, en la vivon de la homo venas aŭtuno, plena de trankvileco kaj beleco. Niaj streboj rezignas pri la nealirebla mondo de vizioj kaj trompaj esperoj kaj revenas inter la mallarĝajn murojn de precize mezuritaj fortoj. Tiam la bildo de la nova ano ne allogas nin kaj la malnova fariĝas pli ŝatinda; tiam ni ne esperas en tio, kio ne estas donita al ni, ni ĉesas malĝoji pro tiuj, kiuj forlasis nin, ni pardonas al tiuj, kiuj trompis nin kaj lernas ami niajn proksimulojn, kreante al ni esperigan neston ĉe la daurema, elprovita malnova amikeco kaj rezignacie forlasante ĉiajn pretendojn kaj sopirojn. Sed tiuj, kiuj estas sortodestinitaj ĉe la malsupreniĝo de la vivovojo ĉiam ankoraŭ erarvagi kaj zorgi por mongaĵoj, por konatuloj kaj necertaj ligoj kun homoj; tiuj, kiuj ĉiam ankoraŭ ne preparis al si ripozejon; tiuj, al kiuj ne estas lumigita la vespera lumigilo ĉe la hejmenreveno — ili estas efektive plej malfeliĉaj el la malfeliĉuloj.

En la tago, kiam Kŝiroda, vekiginte en la mateno, vidis, ke ŝia edzo malaperis, kunprenante ĉiujn ŝiajn juvelojn, ŝi konvinkiĝis, ke estas nenio, per kio ŝi povus pagi la luprezon kaj aĉeti lakton por sia knabeto. Kiam ŝi ekpensis pri tio, ke je sia tridek oka jaro estis neniu, kiun ŝi povus konsideri sian proksimulon, kaj ŝi ne havis hejmon, en kiu ŝi povus vivi kaj morti; kiam venis al ŝi la penso, ke nun, forviŝinte siajn larmojn, ŝi devas denove nigriĝi siajn brovojn, meti ruĝigilon sur siajn lipojn kaj siajn vangojn kaj kaŝante per ĉiaj ruzaĵoj sian efektivan aĝon, kun gaja rideto kaj senfina pacienco denove jetetendi siajn retojn, por kapti novajn korojn, ŝi fermis la pordon kaj jetkuŝiĝis sur la plankon, kie ŝi pasigis la tutan tagon sen manĝo, samkiel mortanto.

Venis la vespero. En la nelumigita ĉambro la krepusko iom post iom densiĝis. En tiu tempo iu eksadoranto proksimiĝis al la pordo kaj ekfrapis, vokante ŝin laŭnome. Kŝiroda, simile al furioza tigrino jetis sin al la pordo kun la balailo enmane kaj malfermis ĝin, sed la neinvitita gasto, ne supozante tiaspecan akcepton, rapide foriris.

La bruo vekis la knabeton, kiu, longe plorinte

de la mallumo, ĝi ekkriis per apenaŭ aŭdebla voĉo: "Panjo! Panjo!"

Tiam Kŝiroda prenis la infanon kaj forte preninte ĝin al sia brusto, fulmorapide eliris el la domo kaj jetis sin en la puton de la najbaroj. Aŭdinte la ekplaŭdon, la najbaroj alkuris kun lumigiloj kaj eligis ilin. Kŝiroda estis en senkonscio kaj la infano estis morta.

En la malsanejo Kŝiroda baldaŭ restariĝis. Sed la juĝisto malliberigis ŝin kiel mortigintinon de sia infano.

II

Oni nomas la juĝiston Mohita Mohan Datta. Li kondamnis Kŝirodan al pendigo. Advokatoj provis savi ŝin, tamen vane. La juĝisto agnoskis nenion, kio povus moderigi ŝian kulpon, por kio li havis siajn motivojn. Vere, li nomis la hindinojn diinoj, tamen tio ne malhelpis al li kaŝnutri grandan malkonfidon kontraŭ ĉiu virino. Por komprenigi tion, ni devas rakonti unu eventon el le tempo de lia junago.

Kiam Mohita estis en la dua klaso de la kolegio, lia ekstero kaj liaj manieroj tute ne similis al la nunaj. Tiam li estis dudekjaraĝa belulo, kun ora nazpinĉilo, kun lipharoj kaj barbeto. Li kombis sian hararon anglamode, estis postulema koncerne siajn kostumojn kaj ne evitis la vinon kaj ties similaĵojn.

Apud lia loĝejo loĝis familio, kies filino, nomata Hemaŝi, estis vidvino. Ŝi estis ne pli ol dekkvar- aŭ dekkvinjaraĝa.

Se vi vidas je la mara horizonto bordon kun bluantaj arbaroj, similan al miraĝo, vi sciu, ke estus signo de troa konfido aliri ĝin sen ia antaŭa ekzameno. La vidveco de Hemaŝi malproksimigis ŝin de la vivo je tioma distanco, ke la mondo ekhavis ŝajnon de ia mistera, sorĉohava arbaro je la transa flanko de la maro. Ŝi ne sciis kiel implikita kaj malfacila estas la mekanismo de ĉi-tiu mondo kiel la feliĉo kaj la prospero estas miksitaj kun sufero kaj malespero. Ŝajnis al ŝi, ke ĉiuj ĉi-teraj vojoj estas liberaj kaj facilaj, ke la tuta mondo malantaŭ ŝia fenestro spiras feliĉon kaj la senĝoja malgajo estas la sorto nur de ŝia sopiranta koro. Guste en tiu tempo ŝian animon alblovigis la vento de la juneco. La ĉielbluo estis belega kaj la tero, simile al milda ruĝa lotuso, etendis ĉiufanken la folietojn de sia bonodoranta mistero.

Plurvespere ŝi vidis, ke la fenestroj de Mohita estas bele lumigitaj kaj de tie estis aŭdataj la tintado de la braceletoj kaj virinaj kantoj. Ŝi pasigis longajn noktojn ĉe la fenestro, observante per avida rigardo la fojfoje montriĝantajn ombrojn. Ŝia turmentita koro, simile al birdo enkaĝigita, senkviete baraktis en ŝia brusto.

Matene kaj vespere ŝi vidadis la preterpasantan Mohita Mohan-on, fieran kaj parade vestitan. Li ŝajnis al ŝi plej feliĉa kaj plej bela el ĉiuj viroj. Ŝajnis al ŝi, ke tiu belege vestita kaj bela junulo povas akiri ĉion, kion li ekdezirus. Tiamaniere, ornamante Mohita-n per ĉiuj imageblaj perfektaĵoj, Hemaŝi kreis el li dion.

Samkiel la fajro allogas la papiliojn pro sia simileco kun la steloj, por Hemaŝi la lumigitaj fenestroj kaj la muziko, venanta elinterne, kunfandiĝis en iun paradizan vizion. Ŝi sidadis solece en la frua nokto, teksante en sia imago ian sorĉohavan regnon el tiuj lumoj, ombroj kaj sonoj kaj el la sopiro de sia koro. Sur ĝian tronon ŝi sidigis sian idolon kaj ŝi diservis al li en sia dezerta, silenta templo, adorante lin kun miro kaj ekstazo. Kaj anstataŭ incenso ŝi bruligis sur la karboj de la amoro sian junecon, feliĉon, estantecon kaj estontecon. Ŝi ne sciis, ke malantaŭ tiuj misteraj fenestroj flagris la malserena, veneniga flamo de la malvirto. Estante malproksime, ŝi ne povis vidi, ke en tiu sendorma nokta brilo estas plenumata la senkora, kruela, mortiga ludo de la satano.

Hemaŝi estus povinta longe pasigi tagon post tagoj tiele, en soleco, ĉe sia fenestro, enreviĝinta pri tiu vizia paradizo kaj pri sia fiktiva dio. Sed, ho ve, la dio kompatis ŝin kaj la paradizo surteriĝis. Apenaŭ tuŝinte la teron, ĝi malaperis subite kaj la virino, kiu dum ĉiuj-ĉi tagoj nutris ĝin per sia imago, kunfandiĝis kun la tera polvo

Ni ne rakontos detale pri tio, kiel tiun ekstazeman junulinon ĉe la fenestro trafis la rigardo, la erarvaganta rigardo de Mohita, kiel li skribis al ŝi kelkajn leterojn kun la subskribo "Binod Ĉandr" kaj responde ricevis timeman, malkvietan, ardoplenan leteron kun multaj ortografiaj eraroj, kia tempesto de animluktoj ekestis, alportante ĝojon, timon, dubon, senesperon, kiel poste ĉio-ĉi turniĝis ĉirkaŭ ŝi en la ebriiĝo de la pereco kaj iom post iom fandiĝis en senkarnan ombbron kaj kiel, fine, la turniĝanta rado de la mondo forĵetis ŝin malproksimen per sia kruela centrifuga forto.

Dum unu malfrua nokto Hemaŝi, forlasante patron, patrinon, fratojn kaj domon, sidigis en kaleŝo kune kun Mohita, kiun ŝi konis sub la nomo "Binod Ĉandr". Sed kiam la dio malkovris al ŝi sian tutan surteran mizeron, Hemaŝi eksentis deziron morti pro honto. Plorante, ŝi ĉirkaŭprenis la krurojn de Mohita kaj diris:

— Mi petas vin, lasu min hejmeniri!

Mohita surprizite ŝtopis ŝian buŝon kaj la kaleŝo ekrapidis antaŭen. Ŝia dio, eĉ ne aŭdante ŝiajn parolojn, enirigis ŝin en vagonon, plenan de bruo

kaj radkrakado kaj ili direktiĝis al la paradizo, pri kiu ŝi tiel multe revis.

III

Ĉi-tie ni okupiĝis pri ununura evento el la junaĝo de Mohita.

Nune necerte iu rememoras la nomon "B.Ĉ." Mohita fariĝis respektinda kaj pia. Ĉiutage li plenumas la riton. Siajn infanojn li edifas severe kaj liaj edzinoj estas enfermitaj en ĉambrojn, nealireblajn por la suno, la luno kaj la vento. Kvankam li mem plenumis vicon da krimoj kontraŭ la virinoj, li opinias, ke oni devas kruele puni ilin pro iliaj krimoj.

Tri tagojn post la eldiro de la verdikto kontraŭ Kŝiroda la juĝisto decidis viziti la ĉelojn; li estis scivola ĉu Kŝiroda pentas pri sia krimo. Nome pro tio li eniris ĉe la malliberulinojn.

Jam demalproksime aŭdigis sin krioj. Enirinte en la ĉelon, li vidis, ke Kŝiroda kverelas kun la kontrolistino. Mohita ekpensis kun rideto: "Jen estas la virina naturo! Eĉ antaŭ la morto mem ŝi ne preterlasas la kazon fari skandalojn! Tiaspeculino eĉ en la regno de Jama provokos kverelojn!"

Li decidis pentigi ŝin per riproĉoj kaj edifoj. Apenaŭ li alpaŝis ŝin, kiam ŝi ĵetis sin surgenuen kaj kuniginte siajn manojn pete, ekparolis per kortuŝa voĉo:

— Sinjoro, kompatu min! Diru al ŝi redoni al mi la fingroringon!

Pridemandinte kio okazis, li eksciis, ke la kontrolistino hazarde vidis fingroringon, kaŝitan en la hararon de Kŝiroda kaj ekvolis depreni ĝin de ŝi.

Mohita denove ekridetis. Je tiu virino antaŭstaras mortpuno — li diris al ŝi — tamen ŝi ne povas rezigni eĉ pri tiu ludilo! Vera estas, do, la diraĵo, ke por la virinoj la ornamaĵoj estas pli karaj ol la vivo mem.

Tiam li diris al la kontrolistino:

— Vidigu al mi la fingroringon!

La kontrolistino donis ĝin al li.

La juĝisto tremrepaŝis, kvazaŭ li prenis ardantan karbon.

Sur la interna flanko de tiu fingroringo, sur ebura fono, estis pentrita miniatura portreto de juna homo kun barbeto kaj lipharoj kaj sur la ekstera flanko estis skribita per oraj literoj: B.Ĉ.

Tiam, levinte siajn okulojn desuper la fingroringo, Mohita ekrigardis Kŝiroda-n kun atento kaj antaŭ li elnaĝis la larmosurverŝita, brilanta pro tenero kaj ardanta pro honto vizaĝo, la vizaĝo, kiun li vidis antaŭ dudek kvar jaroj.

Mohita denove ekrigardis la fingroringon kaj iom poste, kiam li denove suprenlevis siajn okulojn, tiu senmoraligita, krimema virino en la rebrilo de la malgranda ora fingroringo ekbrilis antaŭ li kiel ora skulptaĵo de diino.

Okaze de la centjara datreveno de la aŭtoro — tradukis: Il. Petrov ("Lipert")

Hjalmar Gullberg

Tercinoj kun Cirkelo

Perfide loze iu reton metis
kaj trafis nin en nia kern' cirkele,
kaj, ĉar sektoron svage desegnetis

l'alia pint', forgesas ni leĝere,
ke stretas la are' de nia ago.
Libero nia foras ie, stele.

Limigis eĉ la aventura vago
de la kuraĝa, ruza Odiseo
ĉe klifkolonoj en arkipelago.

Inventu, hom', fendadon de nukleo;
en kurba spaco manku di' beata :
vi restos tamen en l'enigma veo.


Sed por moment', kiel etern' sentata,
leviĝas el la sang', el korpo kripta,
flugila pens' — delfeno ŝaŭmlevata.

Ho ŝvebhezito de l'cirkelo dikta !
Mi volbon vidas, post la ploro, ĝemo,
de ĉielarko super kadro strikta

de vag' homera for de nia memo.

El la sveda : Magda Carlsson.

(Enkonduka poemo de la poemaro "Tercinoj en la tempo de ne-arto", 1958).



Guillaume Apollinaire

AL LA PLEJ GRACIA PARTO

Vi kies ridon fermas zipo
Kaj fronte montras dorsinformojn
Vi ŝajnas esti bela ŝipo
Kun larĝa vel' kaj kiajn dormojn

Promesas neĝa ĉi globuso
Kun roza neĝo de Stopido
Ĉu mi revidos Mars' Venuso
Ĉi plumkusenon de Kupido

Ho graciplena kaj belpuga
Postaĵoj ĉiuj estas vento
Ĉiujn la via venkas luda
Diin' kun montoj el arĝento

Arĝent' sed ankaŭ krem' fabela
Kaj dolĉvelura rozfolio
Mi amas vin sidkarno bela
Kun sola zorg' via gracio



Max Švabinský

Paradiza Sonato

LA PONTO MIRABEAU

Sub ponto Mirabeau defluas Sejno
Kaj nia am'
Memoras mi sen peno
La ĝojo ĉiam venis post ĉagreno

Ĉu venas nokt' aŭ hor,' sonoras
La tagoj pasas for mi staras

Kun man' en man' ni restu front' ĉe fronto
Dum pasas sub
Ĉi brakoj niaj — ponto —
La pro l'eternaj vidoj laca ondo

Ĉu venas nokt' aŭ hor,' sonoras
La tagoj pasas for mi staras

Forfluas am' kiel ĉi akvo kura
Forfluas am'
Aĥ vivo lantvetura
Kaj kiel estas la Espero dura

Ĉu venas nokt' aŭ hor,' sonoras
La tagoj pasas for mi staras

La tagoj pasas semajn' post semajno
Nek jama temp'
Nek am' revenas ajne
Sub ponto Mirabeau defluas Sejno

Ĉu venas nokt' aŭ hor,' sonoras
La tagoj pasas for mi staras

KREPUSKO

Dum ombroj de mortintoj mildas
Sur herb' kun lum' krepuske luda
L'arlekenin' sin igis nuda
Kaj korpon en laget' rebildas

Paradas ĉarlatan' nokteca
Pri la trukaro tuj surpriza
Kaj svarmas en ĉielo griza
Stelaro pala kaj lakteca

Sur stabloj l'arleken' palvelka
Salutas tuje al spektantoj
Al magiistoj Bohemlandaj
Sorĉistoj kaj feinoj kelkaj

Li unu stelon dekroĉinte
Manovras ĝin per brakagito
Dum piedtakte pendumito
Cimbalojn resonigas tinte

Infanon lulas invalido
Cervino pasas kun cervido
La nan' envirigardas trista
Al l'arleken' trismegista

el la franca tradukis : **Roger Bernard**

Vilho Setälä:

KIEL LERNI NOVAN LINGVON

Mi havas amikon, mondfaman scienciston kaj malnovan esperantiston, kiu memstare lernis la anglan lingvon. Li prenis la Bibliion, eklegis ĝin kun komparo al la propralingva traduko. Tiel li kompreneble ne povis lerni la prononcon, sed baldaŭ li akiris sufiĉan konon de la lingvo por legi kun kompreno la sciencajn verkojn, kiujn li bezonis.

Persone mi ricevis mallongan kurson pri la elementoj de la angla lingvo en lernejo, sed nur post paso de preskaŭ du jardekoj fariĝis al mi aktuala la studo de amerikaj verkoj por profesia laboro. En ĉi tiu kazo ne estis trovebla alilingva traduko por kompari, sed kuraĝe mi eklegis la tekstojn fotografajn kaj teknikajn, divenis la sencon de la novaj vortoj laŭ tio, kiom mia kono pri la fako permesis. Se iu vorto restis nekomprenita, plej ofte ĝi ne estis esence grava, kaj mi lasis ĝin. Nur malofte mi konsiliĝis en vortaro, kaj baldaŭ mi preferis tian kun anglaj klarigoj. Rezulte, iom post iom mi povis sen malfacilaĵoj legi fakajn verkojn en angla lingvo. La beletristiko tamen restis ankoraŭ nefacila.

Konklude mi pretendas, ke la plej agrabla kaj inteligenta maniero por plenkreskulo, lerni novan lingvon, estas kuraĝa eklego de ĝia literaturo. Kaj precipe de la beletristiko. Evidente, se oni jam lernis kompreni romanon, estas tre facile vastigi sian konon al kiu ajn fako, kiun oni mem posedas ĝis certa grado, dum la kontraŭa vojo ne facile kondukas al la celo.

Estas tamen granda baro al la uzo de ĉi tiu metodo. La komenco estas treege malfacila. Kompreneble, oni povas unue serĉi infanan fabelaron aŭ alian tre facilan tekston, sed kiam sur la unuaj paĝoj la nombro de nekonataj vortoj nur malrapide malleviĝas de 100 ĝis 50 procent, kaj la tuton ankoraŭ miksas la "necesaj" duoblaj aŭ multoblaj formoj, neregulaĵoj, kutimaj ĝuste ĉe la plej multe uzataj vortoj, la tento forlasi la penon estas granda. Des pli, se la lernota lingvo apartenas al tute fremda grupo de lingvoj. Ekzemplo el propra sperto: en la romano "Edziĝo de Loti" de Pierre Loti estas longa vico da polinezia lingvo, kun apuda traduko. Kun granda intereso mi komencis studi tiun, por iom ekkompreni la ekzotan lingvon en ĝia strukturo. Sed malgraŭ la apudmetita traduko mi ne sukcesis ekkapti la sencon de eĉ unu sola vorto.

Aliparte, kiam la kvoto de fremdaj vortoj malaltiĝis ĉ. 10 procent, oni komencis ĝui la legadon. Kun iom da peno oni divenas la sencon de la plej multaj novaj vortoj, kaj se temas pri beletristiko, oni povas trankvile transpasi la nekomprenitajn vortojn, eĉ tutajn frazojn, kaj eventuale relegi la tutan verkon post la unua travadado, kun nova, pli profunda kompreno.

Samideano nature tuj konkludas, ke ĉi tiu metodo de lernado estas kvazaŭ elpensita por la konkero de la internacia lingvo. Ĝi povas fariĝi ne nur eleganta sed eĉ tre facila metodo, se oni ricevas proponon de gradigita legaĵo. Kaj ĉe tio oni povas tute rezigni pri gramatiko. Sed kial ne ankaŭ pri vortaro?

Per tio mi ne volas kondamni la uzon de vortaro. Sed mi konsideras ĝin kiel fonton por enprofundiĝi en la sekretojn de la lingvo. Ĉe la lernado de la elementoj ĝi estas nur ĝeno.

Grandan disvastigon kaj favoron ricevis en la Nordaj landoj tn. "naturmetoda" kurso de angla lingvo. Malgraŭ abundo de diversaj rilate malmultekostaj kaj bonaj lernolibroj konkurantaj, ĝi ricevis pli grandan disvastigon ol ĉiuj aliaj, spit'al la prezo (ĉ. 400 steloj). Ĉi tiu fakto incitis min provi la samon al Esperanto.

Mi ne volas ĉi tie kritiki kaj noti mankojn en la "naturmetoda angla"; sufiĉas nur noto pri tio, ke ĝi ne plenumas ĉiujn postulojn kiujn mi, ĉe mia laboro, antaŭmetis al mi.

Kiel celon de la libro mi konsideris instruon de nia lingvo ĝis tia grado, ke la lerninto povas sen malfacilaĵoj komenci legadon de ordinara beletristiko esperanta. Konsiderante la fakton, ke la internacieco de la vortradikoj en Esperanto rapide kreskas paralele kun ilia malofteco, mi venis al la konkludo ke kvoto de 3 novaj radikoj en teksto el 100 vortoj jam signifas lingvoscion sufiĉan por nia celo. Tiun oni atingas en Esperanto per la kono de ĉ. 1400 lingvaj elementoj (mi aludas al mia artikolo en Esperantologio I, 1). Aliparte ŝajnis al mi, ke dum la lernado la kvoto de 8 novaj radikoj el 100 ne estas tro malfacila, kaj donas al la lernanto konvenan ekzercadon de sia memorkapablo — tro facila la lernado ja ankaŭ ne estu, se ĝi restu interesa — kaj el tio rezultas libro kun teksto kiu ampleksas 17500 vortojn.

Por la praktika efektivigo aperas sekvaj principoj: De la komenco oni zorgu pri tio, ke la kvoto de novaj radikoj ne transpaŝu la dekonon. Tio signifas, oni ripetu sufiĉe ofte la lernitajn vortojn por malhelpi tro densan aperon de novaj radikoj.

Tamen, la teksto estu kiom eble plej natura kaj kontinua. Oni evitu donon de vortlistoj, kaj celu al formado de frazoj, kiuj sence kaj logike sekvas unu la alian. Unuvorte: la teksto estu interesa legaĵo!

La novaj vortoj (radikoj) ja devas laŭ ebloj esti kompreneblaj sen vortaro. Por tio oni povas uzi klarigajn bildojn kaj figurojn, ankaŭ universale komprenatajn simbolojn, kiel la arimetikajn signojn. Iom progresinte oni ankaŭ uzos eksplikojn sur la bazo de jam lernitaj vortoj. Substantivoj estas facile illustreblaj, verboj malpli, adjektivoj eble ankoraŭ pli malfacile. Sed oni ne povas limigi sin je substantivoj, se oni volas formi frazojn. Eĉ oni bezonas absolute ne eksplikeblajn (per pli simplaj konceptoj) vortetojn, kiel 'se, sed, ankaŭ, do' kaj kelkaj prepozicioj. Tiujn oni devas komprenigi per la kunteksto. Kaj la sperto montris, ke tio ne estas malfacila tasko.

La ordo, en kiu la novaj radikoj aperas, estas grava. Ĉe elementa instruado oni devas eviti maloftajn vortojn, sed sklave oni ne povas sin bazi sur la vortstatistikoj. La elekton multe limigas tio, en kiu ordo la vortoj neilustreblaj estas eksplikeblaj unu per la aliaj. La konformigo de tiuj postuloj faras el la tuta planado de la teksto kvazaŭ ŝakludon, kie estas nepre necese statistike sekvi la jam uzitajn radikojn. Des pli malfacile estas samtempe atenti pri interesa enhavo de la legaĵo! Por mi la solvon de tiu problemo prezentis la uzo de ŝatataj bildserioj, kiuj donis freŝan karnon al la tutaĵo, ĉirkaŭ la skeleto de la vortstatistikaj postuloj. Pri tio mi do ŝuldas dankon al la ilustristo Asmo Alho kaj liaj ĉarmaj bestoj, simboloj de homaj infanoj. Kontente mi povas konstati, ke ĉi tiuj atingis la simpation kaj amon de diverslandaj samideanoj, junaj kaj plenaĝaj.

Mia libro, *Privilegia vojo al lingvoscio*, aperis je la fino de 1958. En la fino de 1959 samideano L. Friis pretigis korespondan kurson sur la bazo de similaj principoj. Ĝi konsistas el 50 lecionoj kaj ampleksas 4 ĝis 5-oble tiom da teksto kiel mia libro. Principe ĝi diferencas de la mia ĉefe en tio, ke Friis ne konsideras kiel novaj la internaciajn vortojn, kiuj estas familiaraj al danoj (kaj evidente al multaj eŭropaj popoloj), kion mi ne povis fari, ĉas mi konsideris antaŭ ĉio popolojn, kies lingvo ne apartenas al la hindo-eŭropa familio.

El la kritikoj, kiujn mi ricevis, plej interesa estas

tiu de samideano Enrique R. González, el Argentino. Li diras, ke la Privilegia Vojo ne tute adaptiĝas al hispanlingvanoj, ĉar la hispana lingvo havas trajtojn, kiujn la instruisto devas atente konsideri. Nome: Vortkombinoj kaj akuzativo mankas al ili, kelkaj afiksoj esperantaj ne estas familiaraj al ili, pluraj prepozicioj havas alian signifon, hispana lingvo havas tri verbojn por "esti", kaj verboj 'sidi, stari kaj kuŝi' ne ekzistas. Ĉio tio kaŭzas malfacilaĵojn al verkisto de lernolibro por hispanlingvanoj.

Al tio mi devas diri, ke mi bone komprenis la fakton, ke estas malfacile verki lernolibron, kiu estas sen aldonaj helpiloj bona por ĉiulingvanoj. Tamen, ŝajnas al mi ke s-ano González troigas la specialajn malfacilaĵojn de hispanoj. Eĉ mi kuraĝas diri, ke evidente Esperanto estas tro facila al hispanlingvanoj, el kio sekvas ke kelkaj el ili deziras ĝin lerni tute senlabore, kaj ofte ekuzas ĝin pli frue ol ili enprofundiĝis en la spiriton de nia lingvo. Tion montras ekz. la uzo de hispanaj vortoj, kiujn ili kredas esperantaj.

Privilegia vojo estis sukcese uzata por finnoj, kiuj ne havas konon pri alia lingvo. Tamen, finna lingvo havas multajn malsimilecojn kun Esperanto, eble pli multajn ol la hispana lingvo. Ekzemple mankas artikolo, mankas aparta pronomo por la du seksoj (li kaj ŝi), mankas tute prepozicioj, kaj kvankam sufiksoj estas multaj, prefiksoj plene mankas. Precipe estas malfacila la prepozicio 'de'; finne oni povas nur diri 'ties libro', sed nek 'libro de patro' aŭ 'lia libro' (sed kvazaŭ 'patres libro, lies libro'). Se hispanoj havas tri verbojn por 'esti', finnoj tute ne havas la verbon 'havi'. Se Esperanto havas akuzativon, finna lingvo uzas tri diversajn formojn anstataŭe, kaj unu el ili facile kaŭzas erarojn jene: se oni rajtas diri 'mi havas librojn' kaj 'mi vidis librojn', finno devas lerni, ke ne estas ĝuste diri 'tie estas librojn', ĉar en ĉiuj nomitaj okazoj finno uzas saman kazon, kiu reprezentas parton de la uztereno de akuzativo. Se ni aldonas, ke el la radikoj kun granda ofteco nur 'sama' estas simila en finna lingvo, kaj ke la frazstrukturo ofte estas malsimila, ni vidas, ke preskaŭ ĉio en Esperanto estas nova al finnoj. Kaj tamen ne estis necese atente konsideri ĉi ĉion — ĉar novan lingvon oni devas lerni laŭ la principoj de tiu lingvo mem.

La leganto certe jam komprenis, ke ne temis pri verkado de kompleta lernolibro de nia lingvo. Privilegia Vojo prezentas nur enkondukon en la lingvoscion, kiu profundiĝos fine per diligenta studado kaj ĝuado de literaturo. Ĉar tio tamen estas la plej inteligenta kaj plej interesa metodo konkeri al si novan lingvon.

MALLONGA INTERPAROLO KUN JETIO

Antaŭ ĉio: li estas verdblue-verda kaj kiam ekkoleras, lia koloro iĝas roze-malpurruĝa, simila nesufiĉe bakitan brikon.

Principe mi opinias lin estaĵo preskaŭ plaĉa kaj proksima, ĉar spite al malfacilaj kondiĉoj de ekzistado — li pensas parence al la homo, kaj eble eĉ pli penseske, estante jam denaske kontemplema.

Nepras ankaŭ ĉi klarigo, ke ekkontaktiĝo kun li postulas ne nur tempon, ĉar la tempo laŭ ĝia esenca valoro ne kalkuleblas ĉi kaze, estante nur ia apogpunkto por serĉadoj kaj migradoj — sed postulas ankaŭ multan internan kuraĝon.

Mi tamen avertas, ke la ekkontaktiĝo mem, la momento de ektrovo — povas kaŭzi siaspecan skuigon aŭ ŝokon. Ni konsideras ebla, ke la estaĵo, kiun ni estas renkontontaj, foras de ĝenerale akceptitaj formoj, ke ĝi diferencas de ni mem tiel per reagmaniero, kiel per preferoj kaj kutimoj.

Cetere estas malfacile difini tion, kio nin diferencigas de li. Unu estas certa afero, tio nome, ke li mem pli timetemas kaj rezervemas ol ni kaj nur la kapablo ĝuste procedi ebligas samniveligi la diferencojn, kiuj nin dividas.

Tiatipa renkonto apartenas al la travivaĵoj, kiujn oni neniam forgesos, sed ni retraktos tion pli poste.

Ni eniru nun la arbaron, tra kiu oni devas traŝi per longdaŭra kaj laciga penirado. Estas facile malvolontiĝi dum tio kaj nur obstinemo kaj konsekvenca sekvado de unu, ununura pado, povas nin atingigi la celon. La pado mem ne ekzistas kaj neniam ekzistis kaj nur nia imago povas montri al ni ĝian ĝustan direkton.

La arbaro, tra kiu mi penetradis, estis arbaro antaŭhistoria aŭ eĉ antaŭbiblia, estis arbaro je neniam kaj nenie renkonteblaj formoj.

Ĝi kaj timigis kaj esperigis min, kaj samtempe ĝi vokis min en sian nepenetreblan profundon, kiu post ĉiu plia paŝo pli kaj pli heliĝis. Malantaŭ mi, je nur unu paŝo posten, regis densa, tiriĝanta krepusko, antaŭ mi skiziĝis helo. En tiu ĉi situacio, la timo pelis min antaŭen, kvankam mi paŝadis ĉiam malantaŭen je centoj da jarmilonoj.

Estas afero indiferenta, kiam ĝi okazadis, pensante laŭ la kategorioj per kiuj ni kalkulas niajn semajnojn, monatojn, jarojn. Tiujn ĉi perceptojn oni devis forjeti. Ili pli povas domaĝigi ol helpi.

Malgraŭ ke la tempo ĉesis ekzisti, kvankam mi konsciis pri tio, mi komencis perdi la senton de miaj ĝisnunaj imagoj kaj ekpaŝante en la sferon de obtuza malbruo kaj okulŝire akra lumo, mi ekatingis la celon. Antaŭ mi staris Li, kliniĝinta super la densaĵo de pigmeaj, lilaj arbustoj — facile gratante en la tero kaj serĉante ion, kio evidente estis al li bezona.

Mi mute ekstaris, senkonsciigita kaj skuita de tiu ĉi vidaĵo. La ĝojo pro ektrovo de la celo de mia migrado, la ĝojo pro malkovro de tiu ĉi unusola vero de jarmilonoj, estis la travivaĵo, kiun neblas priskribi.

Li turnis sin laca per la movo de homo, kiu scias, ke atendas lin ia neatendata kaj neplezura peno. Li ekgratetis sian pintforman orelon kaj komencis rigardi min. Liaj etaj, sed penetremaj okuloj — enajligis en min sen ia ajn esprimo, kio ne estis tro plezura; mi do eksentis iaspecan embarasiĝon kaj honteton. Fine li profunde ekspiris, kaj poste ekridetis al mi per ia trista grimaco, sed tiam mi sciis kaj sentis, ke li ne koleras je mi, ke li ne pretendas je mi.

Evidentiĝis, ke Li konas la tiel nomatajn kondutformojn, ĉar li esprimis ĝojon pro nia renkontiĝo, substrekante, ke li fartas escepte bone, ke li ne deziras, absolute sub nenia preteksto — iajn ajn ŝanĝojn, ke li scias pri kio temas, kaj petas lasi lin tia, kia li estas.

Li ankaŭ montris plejan konon pri la nuntempaj niaj problemoj, substrekante, ke li vidas nenian eblon de ia ajn formo de kunagado, ke li intencas fari eĉ ne unu paŝon en la direkto al ni.

— Ne gravas — li tiam diris, grimacante kun malbongusto — ke mi ekzistas kaj vivas, ke mi ekzistas en la mezo mem de viaj aferoj, venkoj kaj faloj, ke mi estas kaj enestas en vi mem, sed mi ne volas, ne povas kaj tutsimple ne scias ŝanĝi miajn preferojn nek kutimojn. Mi bone sentas min sola, mi havas kvieton, kiun mi esceptege ŝatas, mi ankaŭ vivas per propra vivo, feliĉa kaj kontenta — kaj vi?

Kaj ĝuste tiam, parolante pri ni kaj nia vivo, li komencis alikoloriĝi. Komence mi ricevis impreson, ke ĝi estas la rezulto de leviĝo de unu el la sunoj, sed alrigardinte pli proksimen, mi konstatis kun

mirego, ke lia defenda verda koloro ŝanĝiĝis en la flavan, poste en apenaŭ ruĝetan, solvigante fine per brike-ruĝa.

Mi malgajiĝis, ĉar mi tuj komprenis la kaŭzon de tiu ĉi stranga ŝanĝo de l'agordo. Mi staris kiel ŝtoniĝinta, mi fiksis la okulojn en ĉi tiun tiom evidentan manifestiĝon de nekontento aŭ kolero — kaj tiam, sen unu vorto, li forturnis sin de mi, descendante inter arbojn.

Tristo? Ĝi ne estis nur tio. Mi ekmalesperis. Ekŝajnis al mi, ke mi perdis ĉion, kion nur eblas

perdi, kaj nur revene irante mi trafis la unuan esperfajron, ankoraŭ feblan, sed jam dislumigantan la malplenon kaj sombregon.

Ĉiokaze indas tamen entrepreni tian migradon.

tradukis Jerzy Grum

Noto pri la aŭtoro: Witold Holcgreber estas debutanta novelisto kaj inter la vroclovaj beletruloj plia simpatianto al nia Esperanta literaturo.

ĵetio = legenda himalaja homo, neĝhomo.

La Persa Versio

Robert Graves

Veramaj persoj pensas sen impono
Pri l' bataleto apud Maratono,
Kaj la teatran grekan tradicion,
Kiu prezentas la ekspedicion
Ne kiel simplan milit-esploradon,
Tri marŝbrigadojn kaj ĉevalbrigadon,
(Kies maldekstron ŝildis eta roto,
Malnovaj ŝipoj for de l' ĉefa floto),
Sed kiel grandan provon laŭdestine
Venki Grekujon — traktas malestime;
Kaj kontraŭdiras flanke nur iomon
De l' greka pled', montrante la renomon
Kiun akiris reĝo kaj nacio
Persaj per ĉi potenc-demonstracio:
Malgraŭ defendo firma kaj vetero,
Perfekte kunlaboris ĉiu ero.

el la angla: **W. Auld**

Min la gepatroj gardis


Stephen Spender

Min la gepatroj gardis de krudaj infanoj,
Kiuj ŝtonvortojn ĵetis kaj portis ĉifonojn.
Tra l' ĉifoj vidiĝis femuroj. Kuris kaj grimpis
Ili kaj sin nudigis ĉe ruraj riveroj.

Pli ol tigrojn mi timis la ferajn muskolojn,
Tiremajn manojn, genuojn al brako premitajn.
Mi timis la salan fingromontradon de knaboj
Kiuj deposte imitis al mi la lispon.

Viglegis ili, elsaltis de preter heĝoj
Por boji pri mia mond'. Ili ĵetis koton
Dum flankenrigardis mi, ŝajnigante rideton.
Mi volis pardoni, sed ili neniam ridetis.

el la angla: **W. Auld**



NORVEGA LITERATURO VIVAS ANKORAŬ

Rigardo al atentindaj romanoj

De lektoro Johan Hammond Rosbach

El Norvegujo venis al la tutmonda publiko literaturo el la plumoj de Ibsen, Hamsun, Undset. Aliaj el la gigantoj estas — kvankam eksterlande malpli konataj — Bjørnson, Duun, Falkberget.

Kiu, en fora lando, povas nomi aliajn norvegajn aŭtorojn? Kiu el niaj legantoj, eĉ en proksimaj landoj kiel ekz. Germanujo aŭ Francujo, konis ĉiun el la ses nomoj? Mi supozas, ke mi ne eraras dirante, ke eĉ literaturamantoj, eĉ profesoroj, ne konas ilin ĉiujn!

Kaj tamen ili estas la plej grandaj nomoj en norvega literaturo, se ni ne kalkulas ankaŭ la poetojn Wergeland kaj Welhaven, kiuj apartenis al la pasinta jarcento, aŭ eĉ Holberg, kiun ni norvegoj devas posedi kune kun la danoj.

Do: ĉu la moderna, hodiaŭa, norvega literaturo estas sensignifa? Neniel! La rikolto de romanoj en 1959 estas la plej bona pruvo. La norvega romanliteraturo de tiu jaro montras konsiderinde riĉan bildon-tamen sen granda partopreno en aktualaj filozofio aŭ eventoj, do sen la intelekto, kaj sen la ritmo, kiu karakterizas la modernan literaturon eksterlande tiel forte, ke tio estas ĝia plej esenca trajto. Eble tial la norvega nuntempa literaturo ne vere atingas eksterlandan legantaron. Kaj ĝuste tial estus bone iomete informi pri ĝi.

El la ses aŭtoroj menciitaj komence de ĉi tiu artikolo, Falkberget estas la sola, kiu ankoraŭ vivas, kaj — inter parentezo — li estas membro de la Patrona Komitato de la Zamenhofa Jaro, kaj forte simpatias kun la Esperanto-movado.

D-ro Johan Falkberget, kiun mi havas la ĝojon kalkuli inter miaj personaj amikoj, naskiĝis en 1879. La granda evento en la norvega literaturo en 1959 estis lia romano *La vojoj de amo*, kiu aperis ĝuste al la 80-a datreveno de la naskiĝtago de la verkinto. *La vojoj de amo* estas la kvara kaj lasta volumo de la cirklo *La nokta pano*, kiu ampleksas preskaŭ du mil paĝojn, kaj kiu okupis sian kreanton dum dudek jaroj. Ĉi tiu lasta volumo ne-

niel estas malpli valora ol la antaŭaj, sed kontraŭe eble la plej bona, kaj ĝi en brila maniero kronas la longan serion de romanoj el la plumo de Falkberget, kiu komencis sian karieron per tute sen signifaj skizoj kaj rakontoj el la vivo de malriĉuloj.

Efektive la malriĉeco ĉiam estas ĉefa trajto ĉe la romanoj de Johan Falkberget, malriĉeco, laborego, ŝvito, malsato, espero, sed ĉiam novaj mizeroj sekvas la esperon. La historio, kiun Falkberget rakontas, okazas en la 17-a jarcento, ĉirkaŭ kuprominejo kelkdek kilometrojn norde de la hejmo de la aŭtoro. La bienetuloj, revante pri la ora tempo de abundo, forlasas siajn verajn valorojn, laboras en la mineja entrepreno, laboregas, malsatas, atendas la salajron. Ĉi tiu estas la situacio, kiun la aŭtoro kapablas majstre prezenti al ni, en tia maniero, ke la vere unutona mizero kaj malsato, neniam fariĝas unutona en la timiga senco de tiu vorto, sed, male, per longega vico da konkretaj okazaĵoj li vivigas kaj vigligas la verkon. Samtempe Falkberget forĝis el sia lingvaĵo mirindan ilon por sia verkado: la loka dialekto parolata de la mizeruloj, la baroktempa danan lingvon parolas i.a. la pastro (Norvegujo estis tiam dana provinco), germanaj metiistoj parolas germane — kaj eĉ latinan lingvon oni trovas, — sciu, ke Falkberget, per ada diligento, instruis al si mem germanan kaj latinan lingvojn, kaj studis ankaŭ la historion de la epoko, kiun li pritraktis, tiel ke la tempa karaktero estas ĉiam ĝusta. Johan Falkberget ja ankaŭ akiris *honoris causa* doktoran titolon ĉe stokholma universitato.

Longa vico da personoj vivas en la paĝoj de la romano, sed la plej vivanta el ĉiuj estas la juna knabino An-Magritt, la bela ĉefpersono de la tuta ciklo. Ŝi naskiĝis en mizero — kaj en honto — ŝi maturiĝis en malmilda laborego, ŝi vivis sian vivon el ŝvito kaj senespero, veturigante, kune kun krude blasfemantaj laboristoj, kuproercon per sia bovo, ĉiam mokata pro sia deveno el senedzeca interrilato, pro kiu ŝia patrino devis lasi la vivon. Meze en tiun vivon de senespero kaj krudeco

Kvankam ni mendis tiun ĉi artikolon antaŭ kelka tempo, ni opinias, ke ĝi ankaŭ nun restas aktuale interesa. — Red.

Falkberget metis kontraste tiun anĝelon — kiu efektive, se oni aŭdas ŝin blasfemi al siaj mokantoj, ne estas anĝelo! — tiun liberan, feliĉan homon, kiu havas kredon, forton kaj de la volo kaj de la korpo, kaj kiu havas ankaŭ revojn. La amo al la nobla germano Johannes kreas el ŝiaj bonaj ecoj veran personecon — personecon, al kiu, siaflanke, la aŭtoro donis sian amon. Ĉar la amo estas, por Falkberget, konkreta realaĵo, la plej grava.

Mi ŝatus transiri de la maljunulo Falkberget, kiu debutis jam en 1907, al debutantino de 1959, *Elisabeth Dored*, kiu verkis bonegan romanon, treege interesan. *Mi amis Tiberion* estas la titolo, kaj la ĉefa persono estas Julia, la filino de imperiestro Aŭgusto. Ni konas ŝin el la historio kiel morale koruptitan virinon, pro kies skandala vivo la patro ekzilis ŝin. Elisabeth Dored provas, per sia libro, doni al ni tute alian kaj aŭdacan koncepton pri Julia. Mi devas rapide aldoni, ke tio ne estas ia fantaziaĵo de la aŭtorino, kontraŭe, multjara eminenta esplora laboro estas solida bazo de la nova bildo pri Julia. Ankaŭ la priskriboj el la Aŭgusta epoko estas abunde riĉaj. La aŭtorino sukcesis plekti en la romanon kolorigajn detalojn. Jen libro, kiu nepre havas intereson ne nur por norvegoj, kaj kiu meritas tutmondan legantaron.


Magnhild Haalke (prononcu: *Holke*) estas aŭtorino, kiun la norvega publiko jam ŝate konas, kaj kiu per sia nova romano *En monato majo* denove pruvas sian riĉan talenton. La temo de ĉi tiu libro estas la vivo de du fratinoj, de ilia ok-naŭ-jara aĝo, ĝis proksimume dek kvar. Unu el tiuj knabinoj estas "mi" en la libro, tiel ke la tuto estas vidata per infanaj okuloj, kompreneble ankaŭ la plenkreskuloj. La romano ne estas nur ĉarma priskribo de knabina animo, sed ankaŭ bona rakonto pri industria loko, kun rigardoj tiel al la riĉa vilao

de la industriestro, kiel ankaŭ al la malriĉeco de laborista hejmo. *En monato majo* estas tre leginda.

Alia romano, kiu estas ankaŭ plena de ĉarmo, kaj kiu ankaŭ medias en malriĉeco, estas *Stjernøy* (*Stelinsulo*) de la juna, lerta stilisto *Terje Stigen*, kiu montris konsiderindan kreskon de verko al verko. La insulo, kie ni troviĝas, estas roka kaj tiel situanta, ĉe la marbordo de Norda Norvegujo, ke ventegoj ĉiam blovas. Sur tia insulo ne multo okazas, kial la aŭtoro ja, malrapide promenante, montras al ni unu post alia la malriĉajn dometojn, vizitas kuirejon, vizitas iun fojnejon, kie iuj estas iel okupitaj en la fojno, vizitas ankaŭ la paroŝan domon, - prezentas al ni revojn - kiel ĉe Falkberget revojn pri riĉeco kaj pri amo. Kaj ĉio en plej glata, agrabla, ĝuinda stilo.

Mi ŝatus fini ĉi tiun malgrandan rigardon al temoj de modernaj norvegaj romanoj per ankoraŭ unu debutantino, *Sissel Lange-Nielsen*, kies libro *La semisto* estas sentoplena rakonto pri somerdaŭra amrilato inter knabino el la lasta gimnazia klaso kaj multe pli aĝa artpentristo, inter sana kaj inteligenta junulino kaj malforta, cedema viro, ambaŭ klare desegnitaj, kaj vivantaj inter aliaj vivplene prezentitaj homoj en urbeto medio.

Mi esperas, ke mi sukcesis per ĉi tiuj malmultaj ekbriloj montri, ke la norvega romanliteraturo daŭre posedas talentojn, kvankam neniun Ibsen, neniun Hamsun, neniun Udset, kaj ke ĝi meritas atenton de eksterlanda publiko, unuavice de danoj kaj svedoj, kiuj povas senpere kaj sen traduko legi norvegan lingvon, sed ankaŭ de aliaj nacioj, ke, fine, multe da interesa kaj valora literaturo nur atendas tradukon en la Internacian Lingvon, kies literaturo devas ĉiam pli riĉiĝi, kaj kies leganta publiko havas la sanktan pioniran devon ĉiel ebligi la riĉiĝon kaj la kreskadon.



PUDRITA PERUKO

Willy Smit

La atmosfero en la koncertejo estas preme varma.

Ĉu tion kaŭzas la sennombraj kandeloj, lumigantaj podion kaj salonon?

Sinjoro Azenul tion demandas sin, viŝante sian frunton per silka poŝtuko.

Aŭ ĉu li ne povas toleri la varmecon pro la pezo de tiu pudrita peruko, je kiu li, moderna homo, ankoraŭ tute ne al kutimiĝis?

La velura frako, silka veŝto kaj punta ŝaboto ĝenas lin, kaj ĉiam denove li panike sin demandas kiamaniere li, Albert Azenul, firmano de la firmo Azenul kaj Azenul, Florstrato 46, venis ĉi tien, en kandeke lumigatan salonon, plenan je homoj, vestitaj laŭ la modo de la "peruka epoko".

Ĉu, okaze de ia festo, la ĉeestantoj ŝerce surmetis tiujn nekutimajn kostumojn? Akre ekzamenante la vizaĝojn sub la blankaj perukoj, li tamen ne sukcesas trovi konatajn trajtojn.

Kion do tio signifas? Ĉu li subite forĝesis ĉion antaŭe pasintan? Ekzistas ja kompatinduloj, suferantaj pro tia subita perdo de memoro.

Ne, io tia certe ne okazis al li! Sinjoro Azenul klare memoras ke antaŭ nelonge li estis sidanta en sia oficejo, diktante leteron al fraŭlino Marjo, sia sekretariino.

Marjo, juna kaj eleganta, kiun li, mezaĝa fraŭlo, sekrete admiras, Bela Marjo, al kiu li, ekster la oficejo, ne kuraĝus diri eĉ unu vorton, ĉar li legas mokon en ŝiaj bluaj okuloj. Ho, tiuj malbenitaj timemo kaj manko de memfido, kiuj neniam forlasas lin rilate al virinoj!

Marjo, do Marjo, indiferece la diktitajn frazojn tajpante; tiun bildon li klare memoras. Kaj tuj poste li troviĝas inter ŝercvestitaj homoj, kun pudrita peruko sur la kapo!

Li pinĉas sian brakon, por certiĝi ke li ne sonĝas. Kia netolerebla situacio!

Lia najbaro, maljuneta sinjoro, sin direktas al li.

"Mi scivolas pri la programo", li babilas; "oni ne enuigu min per moderna muziko! Kion vi opinias pri la modernuloj?"

Sinjoro Azenul, ĝoja ĉar li havas okazon al iu paroli, kaj tiel eble akiri iom da klarigo, konfesas ke ankaŭ li ne komprenas la modernajn komponistojn: "Stravinski, Hindemith, Bartok..."

Lia najbaro senkomprene rigardas lin.

"Tiujn nomojn mi ne konas", li diras mirigite; "mi celis Mozart".

"Mozart!! mi... mi ne komprenas..." balbutas Sinjoro Azenul.

Samtempe eleganta homparo sidiĝas sur seĝojn antaŭ li, salutante lin per gracia kaplino.

Sinjoro Azenul responde salutas, kvankam li tute ne konas la paron.

"Jen la fiero patro", ŝerce diras la sinjorino, rigardante malantaŭen kaj adresante Sinjoron Azenul; "sendube vi malpacience atendas!"

Antaŭ ol la alparolito havas okazon respondi, ŝia edzo aldonas: "vi prave rajtas esti fiero; hieraŭ Majstro Lorenzo rakontis al mi ke via Feliks estas lia plej talenta lernanto!"

"Ĉu vere?" murmuris Sinjoro Azenul, ludante la rolon de modesta patro.

La sinjorino, ventumante sin per ebura ventumilo, daŭrigas: "Via edzino do bedaŭrinde ne povas veni pro vizito al sia malsana patrino; ni tamen aŭdis ke la malsano feliĉe ne estas grava; ŝi brulvundis la manon, ĉu ne?"

"Jes", respondas Sinjoro Azenul, kompatante sian nekonatan bopatrinojn; "malgravaĵo, tamen doloriga".

"Kompreneble; ŝi ĝojos pro la vizito de Anita!"

Sinjoro Azenul, tiamaniere informita pri la nomo de sia edzino, sentas kvazaŭ li vere povus amuziĝi pri la komedio, en kiu li vole nevole estas partoprenanta, se ne daŭre turmentus lin la demando: "kion signifas ĉio ĉi?"

"Feliks estos numero tri", diras la sinjoro; "ĉu vi volas rigardi mian programon?"

Danke Sinjoro Azenul akceptas ĝin, kaj scivole esploras la enhavon. Sur dika papero, en malmodernaj presliteroj, staras:

PROGRAMO DE LA KONCERTO,
PREZENTOTA DE LA LERNANTOJ DE MAJSTRO
LORENZO, REĜA MUZIKISTO,
EN LA URBA KONCERTEJO, LA 20an
DE MARTO 1782

Avide liaj okuloj serĉas numeron tri:
GAVOTO DE CORELLI, LUDOTA DE S-RETO
FELIKS MARINO

Redonante la programon al ĝia posedanto, Sinjoro Azenul miras ĉu li do estas identa kun iu Sinjoro Marino? kaj tiu dato 1782? Ĉu ŝerco? enigmoj kaj enigmoj!

Iom post iom la babilado en la salono malpliigas; du sinjoroj kaj unu sinjorino estas venintaj sur la podion. La sinjorino sidiĝas antaŭ la piano; la du sinjoroj, sidante unu kontraŭ la alia, agordas siajn violonojn. La kandela lumo orumas la rozkoloran, silkan robon de la virino, la ruĝan kaj violetan veluron de la viraj frakoj.

La programo anoncas la koncerton por du violonoj kaj piano de Bach.

Dum eksonas la unuaj sonoj de la konata muzikaĵo, Sinjoro Azenul sentas rimarkindan ŝanĝon: liaj muskoloj komencas malstreĉiĝi; komfortiga trankvilo ripozigas lian konfuzeĝintan cerbon. La panika sento estas for; li nun povas trankvile akcepti la enigmon de tiu ĉi stranga travivaĵo, fidante ke iamaniere ĝi klariĝos.

Li nur pacience atendu.

Dum liaj oreloj kaptas la elizean melodion de la dua parto, estas al li kvazaŭ la esenco de la muziko, eterna en sia beleco kaj superanta ĉion teran, levas lin el la ĉiutaga vivo, tiel havigante al li la ĉion klarigantan komprenon.

Li vidas sin en la ĉambro de magnetigistoklarvidanto Sinjoro Herbert, kiun li konsultis antaŭ kelkaj tagoj pro atako de reŭmatismo.

Post kuraca tuŝado de la doloranta kruro, Sinjoro Azenul interesplene konversaciis kun la magnetigisto pri ties klarvidkapablo.

Je lia miro Sinjoro Herbert tiurilate rakontis, ke li, estante en tranco, povas vidi antaŭajn surterajn ekzistadojn de siaj pacientoj.

"Ĉu ankaŭ mian?" scivole demandis Sinjoro Azenul.

La klarvidanto brovsulkigante enpensiĝis; post kelka tempo li malkontente kapskuis.

Malklare, tre malklare; mi estas tro laca. Tamen mi vidas vin en la peruka epoko".

"Ĉu mi estis viro?" demandis Sinjoro Azenul, sciante ke la homoj dum siaj diversaj surteraj ekzistadoj ja ne ĉiam havas la saman sekson. Li simple ne povis imagi sin en jupo, trikanta!

Jes, viro; ankaŭ tiam, diris la klarvidanto; "sed, kiel mi jam diris, la bildoj tro malklare venas al mi hodiaŭ. Tamen mi faros promeson al vi: iun tagon, post bona ripozo akirinte freŝajn fortojn, mi denove pensos pri vi entrance, kaj tiamaniere transdonos al vi mem rigardon en vian antaŭan vivon. Tiun vivparton vi kvazaŭ denove travivos, kvankam laŭ nia surtera tempokalkulo ĝi daŭros nur kelkajn sekundojn...."

Vigla aplaŭdo vekas Sinjoron Azenul. Kliniĝinte al la publiko, la geludintoj forlasas la podion. Ekscitita kaj danka pro la liberiga kompreno kiun havigis al li la muziko, Sinjoro Azenul entuziasme aplaŭdas. Li sentas sin senzorga kaj ĝoja kiel

knabo.

Kio povus ja okazi al li? pasintan tempon li estas pasive travivanta; realecon kaj sonĝon samtempe; ho, kia miriga ebleco! Scivola li estas; jes, precipe scivola pri tio, kio okazos plu.

La duan numeron de la programo li preskaŭ ne konscie aŭdas pro eksciteco. Nun venos la tria; nun li vidos sian filon!

Stranga ideo.... havi filon. La ĉiam iomete kurbiĝinta dorso de Sinjoro Azenul plirektiĝas.

En streĉa atendo li rigardas la podion.

Venas svelta knabo, proksimume dekdujara. La mallerta maniero laŭ kiu li sidiĝas antaŭ la piano montras lian nervecon.

Li ne tuj komencas ludi; iom timeme la brunaj okuloj vagas tra la salono, kvazaŭ iun serĉante. Subite lia rigardo fiksiĝas sur Sinjoron Azenul, kaj samtempe rideto de ĝoja kamaradeco heligas la knaban vizaĝon. Kaj la novbakita patro sentas strangan emocion, ridetante al sia ido.

Feliks komencas ludi; la nerveco nun evidente forlasis lin; kun mirigaj certeco kaj rapideco liaj etaj manoj tuŝas la klavaron, dum lia infana vizaĝo esprimas la serenajn ĝojon, inspiritan al li de la muziko.

Kun siaj blanka peruko kaj punta ĵaboto li similas la portretojn de la juna Mozart, pensas Sinjoro Azenul, kiu katene aŭskultas.

Nur tre malklare li poste memoras ĉion kio sekvis: la viglan aplaŭdon, la komplimentojn de la antaŭesidantoj, la aliajn programerojn... li nur senpacience atendas la finon de la koncerto, la renkonton kun sia filo.

Sekvante la vicon de koncertvizitantoj al la elirejo, li sentas kun stranga certeco ke ankaŭ nun ĉio okazos al li kiel ĝi jam iam antaŭe okazis; same kiel filmo, jam antaŭ longe farita, sensange ripetigas sur la ekrano. Oni nun ja montras al li la filmon de lia antaŭa ekzistado surtera; filmo en kiu li tiutempe ludis la ĉefrolon!

Pordisto helpas lin surmeti la mantelon, kaj enmanigas al li la triangulan ĉapelon, kiun Sinjoro Azenul mallerte metas sur la perukon. Li estas certa ke li ridige aspektas!

"Ha, paĉjo", vokas gaja knaba voco; "mi jam serĉis vin! venu do, Petro jam atendas kun la kaleŝo".

Feliks, trabatinte al si vojon tra la homamaso, prenas la manon de sia patro kaj senpacience tiras lin eksteren, kie perukita veturigisto respektoplene salutas, malfermante la kaleŝan pordon.

Sinjoro Azenul eniras, sekvate de Feliks, kiu, en la veturilo, tuj kun knaba vigleco ekbabilas.

"Ĉu vi estis kontenta, paĉjo? Vi sciu, mi treege timis pro tiuj multaj homoj; mi preskaŭ ne kuraĝis komenci.... sed, ekvidinte vin inter la publiko, mi ne plu estis nerva. Estis kvazaŭ mi ludus hejme, en nia muzikĉambro; ĉu ne, paĉjo?"

"Jes, mia knabo".

"Mi nur bedaŭris ke panjo ne povis ĉeesti. Si

tamen baldaŭ revenos, ĉu ne?"

"Certe, Feliks".

La kaleŝo haltas antaŭ granda, aristokrata domo; Albert Azenul denove sentas tiun scivolemon, dum li, kun Feliks, suriras la altan peronon.

Evidente mi estas sufiĉe bonhava, li kontente konstatas.

Post kiam alia perukita servisto malfermis la pordon, ili trairas marmoran koridoron; dika tapiŝo mallauĝigas la sonon de iliaj paŝoj. La murojn ornamas valoraj pentraĵoj, multaj el ili portretoj. Maljuneta infangardistino kun afabla, patrino vizaĝo, venas renkonten al ili, kaj Feliks salte ĉirkaŭbrakas ŝin. "Aŭdu, Mina, mi bone pianludis! Paĉjo estis kontenta; ĉu ne, paĉjo?" "Ĉu vere?" La servistino ridetas al Feliks, kaj, alparolante la patron, diras: "Paŭlinjo jam dormas, sinjoro!"

Ŝi malfermas pordon al li, kaj Sinjoro Azenul eniras ĉambron, lumigatan de noktlampeto. En infanlito kuŝas, trankvile dormante, ĉarma knabineto, proksimume kvarjara. Brunaj bukloj kuŝas sur la kuseno; la eta brako ĉirkaŭprenas pupon.

Lia filineto! Enpense Sinjoro Azenul rigardas la trankvile spirantan infanon.

"Kial vi ne kisas ŝin, kiel kutime?" demandas Feliks. Klinante sin, li mallerte kisas la rondan vangeton. Tiam ankaŭ Felikson li kisas.

"Dormu bone, fileto".

"Bonan nokton, paĉjo. Post du noktoj panjo estos hejme, ĉu ne? tiam ni denove estos kvarope".

"Jes", diras Sinjoro Azenul; "tiam ni denove estos kvarope". Ankaŭ Mina, dezirinte bonan nokton, suriras la ŝtuparon, kaj Sinjoro Azenul troviĝas sola en la vasta koridoro. Tra vitra pordo, kondukanta al ĝardenteraso, la lunlumo enfalas, kaj mistere, arĝente lumigas la pentritajn portretojn en la koridoro, havigante al ili strangan vivecon. Precipe unu pentraĵo altiras la atenton de Sinjoro Azenul. Ĝi prezentas virinon kun klasike bela vizaĝo, sidantan sur kanapo, dum hundeto kuŝas je ŝiaj piedoj. En la rideto, en la brunaj okuloj li rekonas tiujn de Feliks; neniu dubo estas ebla: ŝi estas lia patrino. Anita, la nekonata edzino!

Danka, fiero sento kaptas lin; ĉu povas esti vere? ĉu li, kiu supozis esti malaminda, mallerta estaĵo, primokita de virinoj, do tamen estas amata? Ĉu iam tiu ĉi nobla belulino tiom amis lin, ke ŝi konsentis fariĝi lia vivkamaradino, patrino de liaj infanoj? Ho, kiel li sopiras renkonti ŝin!

Subita bruo interrompas liajn pensojn. La vitran pordon, malantaŭ kiu troviĝas la ĝardenteraso, oni malrapide kaj tre singarde malfermas; tamen la ĉarniroj iom knaras, kaj tio kaŭzis tiun eatenditan bruon.

Ektimigite Sinjoro Azenul rigardas malantaŭen, atendante ŝteliston, sed je sia granda surprizo li ekvidas junan virinon, kiu, konvinkiginte ke ili troviĝas solaj, sin ĵetas al lia brusto, frustrante kun nerva rapideco: "Nur kelkajn minutojn ni havas, karulo; la maljuna porkino ekdormis en sia seĝo, sed ĉiumomente povos vekigi kaj serĉi min! Aŭdu, Albert; morgaŭ ni havos okazon forkuri; Anita ankoraŭ forestas, kaj mi kredigis al la porkino ke mi bezonos liberan vesperon, ĉar mia avo fariĝos okdekjara. Ho, Albert, mia plejkara, mi ne povas vivi sen vi; morgaŭ ni forkuru — ne gravas kien, se ni nur povos resti kune por ĉiam! Albert, kial vi diras nenion?"

Ŝiaj brakoj forte ĉirkaŭprenas lin; ŝia al li leviginta vizaĝo estas tute proksima... en la lunlumo li rekonas la trajtojn de Marjo, la sekretariino. Indiferenta, mokanta Marjo, nun petegante, ke li forkuru kun ŝi...

En siaj plej kuraĝaj revoj li neniam povus imagi ion tian! Lia koro forte batas; li volas ĉirkaŭpreni ŝin kaj kisi, sed tiumomente aperas antaŭ liaj okuloj Feliks; Feliks, kun kamaradeca fido ridetante al li de sur la podio; image li aŭdas la knaban voĉon; "Ni denove estos kvarope!"

Fideleco al liaj infanoj, al la nekonata edzino, venkas en la lukto kun li mem. Tiu virino ne forrabis al li la ĵus akiritan feliĉon! Brute li forpuŝas ŝin.

"Foriru!" li krias spiregante; "mi ne volas, mi restas. Ĉu vi aŭdas? mi restas, mi restas!"

"Vi jam dufoje diktis tiujn du vortojn, Sinjoro", indiferece diras voĉo de malantaŭ skribmaŝino. "Pardonu", murmuris Sinjoro Azenul, konfuzite; "mi evidente eraris. Do, ni rekomencu: mi restas, sinjoroj, kun daŭra rekomendo, altestime, k.t.p. Tio sufiĉas, fraŭlino".

Dum la sekretariino elmaŝinigas la paperon, Sinjoro Azenul palpas sian jam kalviĝantan kapon, senperukan.

Prezentante al sia superulo la subskribotan leteron, Marjo petas, rigardante siajn ruĝajn ungojn: "Sinjoro, ĉu vi volas permesi al mi liberan vesperon morgaŭ? Mia avo fariĝos okdekjara".

Li sentas fortan inklinon krei: "Vi eta serpentino, ne supozu ke viaj mensogoj trompos min!"

Sed la pudrita peruko, kiu ornamis la kapon de Albert Marino, estas for; al Albert Azenul mankas la kuraĝo.

"Grava okazaĵo kia tiu ĉi valoras liberan vesperon, fraŭlino; vi povos havi ĝin".

Kaj dum fraŭlino Marjo, sur altaj kalkanumetoj, brue forlasas la oficejon, lia dorso lace kurbiĝas.

(Premiita en la Belartaj Konkursoj 1960)





Sir Patrick Spens

Balado 17-jarcenta

En Dunfermlin' la reĝo sidas
Kun vino ĉe la lipo;
"Kie mi trovos estron lertan
Por mia nova ŝipo?"

Parolas kavalir' maljuna,
Kiu apude sidas:
"Patriko Spens superas ĉiujn,
Li lerte ŝipojn gvidas."

La reĝo do leteron skribis,
Sigelis ĝin en ordo,
Ĝin sendis al Patriko Spens,
Marŝanta sur la bordo.

"Al Norvegujo tuj veliru,
Al Norveguj' transmara,
La reĝfilinon revenigi
Al ŝia hejmo kara."

Li legis la unuajn vortojn,
Ridegis li sen fin':
Sed kiam legis li la tuton,
Larmoj blindigis lin.

"Kiu min al la reĝ' meneiis,
Kaj kies la propono,
Ke li min sendu sur la maron
En tiu ĉi sezono?"

"Ekestu hajlo, neĝo, ŝtormo,
Al Norveguj' transmara
Ni devos iri revenigi
Sin al la hejmo kara."

La velojn lunde ili hisis,
Maren rapidi penis,
Malfruvespere en merkredo
Al Norveguj' alvenis.

Apenaŭ du semajnojn ili
En Norvegujo loĝis,
Kiam la lordoj de la lando
La skotojn ekriproĉis.

"La reĝan oron forkonsumi
Vi skotoj nun arogas."
"Mensogas vi; mensogas ĉiuj;
Senhonte vi mensogas!"

"Arĝenton portis ni por pagi
La tutan ŝipanaron.
Kaj ruĝan oron en la ŝipo
Mi portis trans la maron.

"Pretiĝu, ho ŝipanoj karaj;
Ni tie ĉi ne restos."
"Ho ve! ho mia kapitano,
Mi timas, ke tempestos.

"Hieraŭ en krescent' arĝenta
Kuŝis la lun' malnova:
Mi timas, estro, ke nin trafos
Fatalo katastrofa."

Apenaŭ kvar-kvin mejlojn ili
For de la lando krozis —
Ekblovis vento, mallumiĝis,
La mar' ekfuriozis.

Rompiĝis mastoj: la ventego
Forsiris ĉiujn ankrojn:
Martelis sur la ŝipon ondoj,
Frakasis ĝiajn flankojn.

"Ho! kie trovos mi mariston,
Kiu la ŝipon gvidos,
Dum grimpos mi al la mastpinto:
Eble mi teron vidos."

"Jen estas mi, maristo lerta,
Kaj mi la ŝipon gvidos,
Dum grimpos vi al la mastpinto:
Sed teron vi ne vidos."

Antaŭ ol li du paŝojn iris
Ekkapti la ŝnuraron,
Tabul' rompiĝis kaj enlasis
La furiozan maron.

"Portu al mi matracojn, velojn,
Kaj parton de l' ŝnuraro,
Por ŝtopi ĝin, sed enfluadis
La furioza maro."

Matracojn ili portis, velojn,
Kaj parton de l' ŝnuraro
Por ŝtopi ĝin, sed enfluadis
La furioza maro.



La skotaj lordoj malsekigi
La ŝuojn ne deziris,
Sed antaŭ la ludfin' la ondoj
Super la kapojn iris.

Multajn matracojn silkbroditajn
La mar' surbruste tenis;
Multaj nobelaj lordofiloj
Neniam hejmen venis.

La manojn la virinoj tordis,
La harojn ili ŝiris
Pro edzoj, filoj kaj amatoj,
Kiujn la mar' fortiris.

Ho! longe, longe la virinoj
Rigardos el la pordo:
Ili Patrikon Spens ne vidos
Veliri al la bordo.

Ho, longe, longe la fraŭlinoj.
Atendos en bonordo
Amatojn karajn pereintajn
En la norvega fjordo.

Cent klaftojn sub la marsurfaco
Ripozas la marpredo —
Patriko Spens, kun skotaj lordoj
Kuŝantaj ĉe l' piedo.

el la skota trad. John S. Dinwoodie

Henri Baupierre:

La Sankta Akvo

En malnova urbeto, forgesita meze de severa kastilia pejzaĝo, antaŭ tre longa tempo, kiam la akvodukto ankoraŭ ne ekzistis, la akvo fariĝis iam tiel rara, ke ĝin oni vendis en etaj kruĉoj ŝtopitaj per la vaksa sigelo de la Reĝo. Tie vivis kaj floris junulino, kiun ŝia virto same kiel ŝia beleco famigis en dekmejla radiuso.

Kvankam simpla dom-servistino, al ŝi ne mankis admirantoj, eĉ inter la viroj de la plej bona societo. De la humilaj akvoportistoj, kiuj ŝin renkontis ĉiutage dum la nobla praktikado de ŝia profesio, ĝis la plej riĉaj sinjoroj de la najbaraj kasteloj, ĉiuj laŭdis ŝian ĝentilecon, la dolĉon de ŝia voĉo, la gracilon de ŝia talio kaj la brilon de ŝia rigardo. Verdire, ŝi apartenis al la raso de tiuj virinoj, kies aspekto ne nur naskas la deziron, sed ĝin igas tuj adolta.

La plimulto de la junuloj venis al ŝia pordo por fervora amindumo. Aliaj, malpli aŭdacaj, kantadis ĉiunokte sub ŝia florumita balkono. Ridetante ŝi ĉiujn aŭskultis, sed al neniu konsentis favoron. Nur kelkajn donacojn la belulino volonte akceptis, nome kruĉetojn da akvo, kaj ŝiaj multaj vizitantoj fidele zorgis, ke tiajn plenaj ŝi neniam malhavu. Ja nekredeble multan akvon ŝi konsumadis. Sed, tuj kiam la nivelo malaltiĝis en la provizbarelo, ŝi jam havis per kio tiun replenigi ĝisrande.

Iun someran tagon, sin levinte frumatene, la juna servistino laŭkutime pasigis pli ol horon ĉe sia tualetejo, ĉar, kiel diris ŝia patronino Sankta Tereza, la pureco de la korpo nepre kondiĉas ankaŭ tiun de la animo. Poste, ŝi komencis malavare lavi la plankon de la domo, kiel la maristoj ferdekon. Apartan zorgon ŝi dediĉis al la kahelaro de la kuirejo kaj al la teleroj el blua fajenco, kiujn ŝi frotis, aspergis kaj briligis plej konsciencie, kvazaŭ el tio dependus la savo de ŝia animo.

Oni ĵus sonorigis por la unua meso, kiam Periko, la akvo-vendisto, envenis kaj donacis al ŝi tri plenajn kruĉojn por la unika plezuro vidi ŝin kaj konfesi:

— Margarita, mi ŝatus al vi proksimi, kiel la kalkoŝmiro al la muroj.

Ŝi lin aŭskultis frotante kaldronon, kiu restis ruĝa de konfuziĝo.

Post la meso, la studento Menendez, kiu ĉiusemajne venadis piede de Salamanko alporti al ŝi akvon, kiun li mem ĉerpis el la rivero Tormeso, ripetis al ŝi frazojn, kiujn li ĉerpis el libroj:

— Via amo similas al la akvo, kiun necesas pene ĉerpi el putro; mia amo similas al la fonto, kiu de si mem elfluas! Mia brako sopiras ringi vian talion, kiel la Tago Toledon! Ĉu vi scias, knabino, ke via nomo signifas "perlo"?

La respondon donis fortika frapo ĉe la pordo duon-apertita, kaj enpaŝis la peze armita Don Kiĥoto, kiu, logita de ŝia renomo, ŝin imagis Dulcinea, kaj migris longan vojon por aspergi la junulinon per deliraj laŭdoj. Surgenuiĝante por ĵuri al ŝi fidelecon, li faris tiel mallertan movon, ke sur la plankon verŝiĝis la tuta provizo da akvo. Rosinante kaj la azeno de Sanĉo ĝin avide perlangis ĝis la lasta guto. La embaraso de la malfeliĉa kavaliro afliktis la servistinon, sed Sanĉo ĵetis al li rigardon pezan de riproĉoj, kiujn la soifo igis ankoraŭ pli brulaj.

— Donu tamen al ili por trinki! bonkore ordonis la mastro, kiu verŝajne sidis sur malsupra branĉo de la genealogia arbo de Victor Hugo.

Tamen, la urbestro, kiun tia misuzo de akvo iom incitis, venis al Margarita kaj severe anoncis:

— Iun knabinon kun nigraj okuloj mi enkarcerigos morgaŭ! Sed vidinte tiujn okulojn, li daŭrigis pli milde:

— Nu, vi, brunulino, kaŝu la vizaĝon per vualo. Kvar algvaziloj lin akompanis. Post ilia foriro, la belulino rimarkis, ke ili forgesis plurajn plenajn kruĉojn en la kuirejo.

Posttagmeze, la Kapitano de la Gvardio, la Koregidoro, Lia Episkopa Moŝto mem, kaj multaj eminentaj personoj honoris ŝin per vizito, kaj alportis al ŝi sufiĉe da akvo por estingi ĉiujn ŝtiparojn de la Sankta Inkvizicio.

La dommastrino, Doña Luisa, virino seka kaj pi-afekta, prenis al sia ĉambro la kruĉojn donacitajn de la Monsinjoro, ĉar ŝi opiniis ilin plenaj de sankta akvo.

Vespere kaj ĝis malfrue en la nokto, junaj viroj venis unu post la alia sub la fenestro de Margarita por kanti langvorajn "solearojn":

"Se mian amon vi komprenus

al la fenestro vi nun venus..."

Fine, iu damo aperis ĉe la balkono, sed ŝi ne estis la servistino. Kaj en la nokto, kiun prilumis la lasta kvarono de la luno, lavango da kruĉoj trafis la malfeliĉan amanton, kiu rapide forkuris al la najbara preĝejo.

La morgaŭan matenon, balaante antaŭ la domo, la junulino trovis multajn rompitaĵajn pecojn de kruĉoj portantaj la sigelon de Lia Episkopa Moŝto. De tiam, pro tiu bapto, la straton oni nomas "Strato de la Sankta Akvo", kaj ĉiujare homoj kun malplenaj kruĉoj kaj boteloj pie pilgrimas tien por ĉerpi akvon el la fontano, kiun oni konstruis tuj post la solena inaŭguro de la akvodukto.

algvaziloj = hispanaj policianoj

RETORIKO

kun aparta konsidero al esperanta parolarto
de

IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita kaj kompletigita

Eldono de la aŭtoro

Prezo: 11.— gld. bindita
44.— steloj
9.— gld. broŝurita
36.— steloj

Mendu ĉe U.E.A.
aŭ ĉe la aŭtoro



Dezirinda posedaĵo por ĉiu esperantisto.

MALSATA ŜTONO

de Rabindranath Tagore

Tradukis el la bengala lingvo L. Sinha
Serio Oriento-Okcidento no. 1

En "The British Esperantist", sept. 1961 s-ro E. Ockey skribas pri la rakontoj:

"Ili estas el tiu speco, kiu restas eterne valora. Eble parte pro la bonega stilo de la tradukinto kaj kontrolintoj, ili ofte memorigas pri la homaranismaj ideoj de Zamenhof, sed aldenita estas milda ironio simila al tiu de Baghy, kvazaŭ iu puŝas en la ripojn per ridetanta fingro."

En letero al la eldonejo la administranto de "Esperantologio", ministeria sekretario E. Svane, skribas:

"Dankon pro via nova eksterordinare belega libro — kaj laŭ la enhavo kaj laŭ la vestaĵo — kiu pliriĉigis la Esperantan literaturon — kaj min! Laŭdon kaj gratulon!"

Eldonita de

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
sub aŭspicioj de U.E.A.

Prezo: broŝ. gld. 8.50, bind. gld. 11.50

Mendu ĉe UEA

Moderna lernolibro de Esperanto

POR LA TUTA MONDO

Natura metodo por memlernantoj kaj por kursoj — nur mallonga enkonduko nacilingve — ĉio cetera en Esperanto kaj per ĉarmaj ilustraĵoj

Vilho Setälä:

Privelegia Vojo

al lingvoscio: Esperanto

Kun instrukcio en A, Da, F, G, H, Ne, No k.a. lingvoj, laŭ elekto de la mendanto

Prezo 12 steloj + sendkosto

Kuneldoninto: U.E.A.

D-ro F. Szilágyi: "Mirinde logika konstruo."
F. Faulhaber: "La aventuroj de Keko kaj Riko estas vere originalaj, komikaj rakontoj, kiuj streĉas la atenton de eĉ plenaĝuloj".

J. R. G. Isbrucker, prez. de la Akademio: "Se mi ne jam sciis Esperanton, mi certe ŝatus lerni ĝin per tia libro".

Mendu ĉe U.E.A.

INFANOJ NE KONAS LIMOJN

Belega fotolibro kun teksto en Esperanto.
Eldonis BRUNA, Nederlando.

Sur kvin kontinentoj infanoj estas ĉarmegaj en siaj ĝojo ĉagreno, ludo kaj laboro Konvinkiĝu mem!

Prezo:
2,95 gld.
(11.80 steloj)

MENDU ĈE
U.E.A.



La Memorlibro

pri la

Zamenhof-Jaro

Monumento al la aŭtoro de la
Internacia Lingvo
Riĉa fotomaterialo

Elegante bindita en bonkvalita tolo kun
stampo en oro

Prezo : 12,50 gld.
50.— steloj

Havigu al vi ĉi tiun valoran verkon !

Eldonis C.E.D. Mendu ĉe U.E.A.
Eendrachtsweg 7 — Rotterdam

DANA ANTOLOGIO

Impona verko, kiu donas bonegan superri-
gardon pri la dana literaturo

260 paĝoj
38 ilustraĵoj pri la aŭtoroj

Konatiĝu kun la granda kulturo de mal-
granda lingvoteritorio

Prezo : 11.— gld bindita
8,50 gld broŝurita

Eldono : Centra Dana Esperantista Ligo
Mendu ĉe U.E.A.

ANGLA ANTOLOGIO

1000 - 1800

Redaktoroj :

AULD kaj ROSSETTI


kun multaj kunlaborintoj
320 p., bindita

prezo : 10 ned. gld. (40 steloj)

Unika verko pri grava literaturo

Eldona Fakto de U.E.A.

Mendu de U.E.A.



Prezo :
5.— gld.,
20 steloj

"Mi tre ĝojas, ke vi sukcesis pliriĉigi nian neabun-
dan fakan literaturon per ankoraŭ unu valora
popularscienca libro, kaj mi kore vin gratulas pro
ĝia bonkvalita enhavo. Ĝi estas tute distra legaĵo,
ĝuste el la speco, kiun ni tiel ege bezonas."
(D-ro Paul Neergaard (Kopenhago) en letero sen-
dita al la reverkinto la 4.1.1961.)

Eldoninto en okcidento : U.E.A.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam.